

BELARTO

ALDONO AL LA REVUO ESPERANTO

Enhavo

La fikcia universo. <i>W. Auld</i>	1
2056. <i>M. Boulton</i>	4
La hispanaj romanoj. <i>E. Hero</i>	8
La tento de Kul. <i>J. Francis</i>	11
Donna Klara. <i>Heine (Kalocsay)</i>	16
Miniaturoj. <i>P. Thorsen</i>	16
Johann Martin Schleyer. <i>P. Bisvan</i>	17
Fenikso. <i>M. Boulton</i>	18
Ludadi sur vulkano. <i>G. F. Makkink</i>	21
Kjarval, la islanda magiisto. <i>B. Ragnarsson</i>	22
Demoneto kaj sorĉisto. <i>P. Grand</i>	28
Poezia verko de Jaroslav Seifert. <i>J. Korinek</i>	31
La vivo estas pli forta. <i>J. Leser</i>	34
La tempo pasas. <i>R. de Castro (Hero)</i>	35
Sceno el „Faŭsto”	36
Pafo en mallumo. <i>D. Williams</i>	39
La miraklo de la esperanto-poezio. <i>E. de Kock</i>	42
Pri kvin panoj. <i>K. Capek (Huda)</i>	43
Tri poemoj. <i>A. Rimbaud (Bernard)</i>	46
Fenestro. <i>M. Hlasko (Grum)</i>	46
Stratbildo. <i>N. Ferlin (Carlsson)</i>	49
La fajrero. <i>V. von Helderstam (Carlsson)</i>	49
Nigraj kalenduloj (<i>Auld</i>)	50
Kelkaj lingvistikaj demandoj. <i>I. Lapenna</i>	51
Tiuj... <i>P. Thorsen</i>	63
Memnon. <i>M. Boulton—F. Merrick</i>	65
Drato. <i>T. Banas (Grum)</i>	71
Odo al Najtingalo. <i>Keats (Francis)</i>	72

ILUSTRINTOJ

<i>Benka, Martin</i>	47
<i>Grand, Palma</i>	29, 30
<i>Schaap, Jan</i>	12, 13, 15, 44
<i>Williams, Denis</i>	40
<i>Wilson, D. A.</i>	36, 37, 48

Kovrildesegno de Jan Schaap

REDAKTORO: WILLIAM AULD

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

EENDRACHTSWEG 7 - ROTTERDAM - C. - NEDERLANDO

LA FIKCIA UNIVERSO

Mi estas amato de tiu fako de la anglalingva literaturo, kiu nomiĝas „scienca fikcio”. Kvankam ĝi havas respektindajn radikojn en la pasinteco, ĝi ekfloris kiel populara legaĵo nur en la tridekaj jaroj de nia jarcento. Hodiaŭ la scienca fikcio akaparas al si pozicion en la socio. Ĝi kalkulas inter siaj adeptoj apaŝojn kaj intelektulojn: ĝi ne nur allogis la atenton de la filmindustrio, sed ankaŭ la plej altnivelaj gazetoj recenzas elstarajn verkojn en tiu fako.

La regno de la s.f. — kiel la adeptoj ĝin familiare titolas — estas preskaŭ senlima. Tra la tempo ĝi vagas, ekde milionoj da jaroj antaŭ nia epoko ĝis milionoj da jaroj post ĝi, tra la spaco ekde la interno de la Tero ĝis la plej malproksimaj limoj de la universo — kaj eĉ preteren. Mi rememoras unu rakonton, en kiu kompatinda spacoŝipo kun tri personoj iris tiel malproksimen, ke ĝi tute forpasis el nia universo! — konfesinde, la plivastiĝanta universo poste reatingis ĝin... Kaj unu el la klasikaĵoj de la ĝenro — verko ĉiurilate atentinda — prezentas detalan historion de la venontaj 2,000,000,000 jaroj! La s.f. havas tiom da facetoj, kiom ĝi havas aŭtorojn. La kvalito de la rakontoj kaj romanoj povas esti fuŝa, gurdita, aŭ ĝi povas esti beletre subtila, kun legitimaj sociaj komentoj. Kio okazus se 90% de la homaro mortus pro ia plago? Kio okazus post atommilito? Kiel sentus sin — sed jam estas konvene skribi: sentos sin — la unua homo, kiu atingus(-os) la lunon? Kio okazus se la homoj povus scii anticipe la precizan momenton de sia morto? El tiaj demandoj naskiĝas la s.f. La valoro de la verko dependas tamen, kiel en ĉiuj fakoj de la literaturo, de la talento de la individua aŭtoro: gravas ne la ideo, sed la prilaboro.

Malgraŭ — aŭ eble pro — la vasteco de la s.f. kampo, mi persone aparte ŝatas du specojn de rakonto: tiun, en kiu la interplaneda, interstela aŭ eĉ intergalaksia flugado estas akceptita fenomeno, kaj tiun, kiu pritraktas la ege malproksiman estontecon. Evidente, la du specoj tre ofte unuiĝas. Mi sentas min hejme en tiu fantazia etoso, en kiu oni vizitas diversajn mondojn kaj renkontas tute (aŭ ne tute!) fremdajn kulturojn kaj biologiaĵojn. Dum la frua periodo de la s.f., la verkistoj emis emfazi la strangaĵojn kaj teruraĵojn sur tiuj nekonataj mondoj, sed hodiaŭ ili scias krei versimilon per malpli krudaj rimedoj. Ni forgesu momente la iom melodramecan impreson pri la planedo Marso, kiun ni ricevis de la leg-instiga sed ne tre serioze taksinda „Princino de Marso” *), kaj rigardu tiun planedon per la okuloj de pli matura aŭtoro:

La konstruaĵo, kiu eĉ de malproksime aspektis strange formita, montriĝis ruino kiam oni pliproksimiĝis al ĝi. La bazo estis kvadrata kaj ornamita sur la flankoj per formalaj desegnoj, kiuj iam estis altreliefaj sed nun estis tiel glatigitaj, ke la pli delikataj estis perditaj. Iam ĝi subtenis ian turon, sed kiam oni povis nur konjekti, ĉar restis ne pli ol la unuaj dudek ŝutoj de la supra konstruo. Ankaŭ ĝi portis la restaĵojn de glatigita ĉizajo, kaj, kiel la bazo, estis konstruita el malhela ruĝa rokaĵo. Se oni staris proksimume cent jardojn for de la bordo, ĝia aspekto estis trompa, pro ĝia izoleco. La kvanton kaj amplekson de la misuzado, kiun tempopaso kaj adaptiĝo estis farintaj al ĝi, oni povis konstati nur post pliproksimiĝo.

Ambaŭflanke de tiu konstruaĵo, kaj pretere, kunpremiĝis kelkaj malgrandaj kampoj, sur kiuj nete vicigitaj kreskaĵoj staris freŝaj kaj verdaj inter mallarĝaj irigaciaj fosajoj. Apud unu muro de la

ŝtona kubo troviĝis enfermejo kaj kabano krude konstruita el neregulaj fragmentoj, kiuj eble estis partoj de la malaperinta turo. Malgraŭ sia mallerta aspekto ĝi estis nete prizorgita, kaj de ĝi aŭdiĝis de tempo al tempo la grunto de malgrandaj bestoj. En la proksima flanko de la kubo estis pordotruo, kaj ambaŭflanke de ĝi troviĝis nekvadrataj truoj, kiuj, kvankam senuitraj, ŝajne estis fenestroj. Antaŭ la pordo laboris virino, pistante grenon sur malalta frotpolurita roko per ia ŝtona pistilo, kiun ŝi tenis per ambaŭ manoj. Ŝia haŭto estis ruĝbruna, ŝiaj malhelaj haroj estis alte volvitaj sur la kapo, kaj ŝia sola vestaĵo estis jupo el malglata ruĝbruna ŝtofo, sur kiu estis ŝablone farita kompleksa flava desegnaĵo. Ŝi estis mezaĝa, sed ne okazis malstreĉiĝo de ŝiaj muskoloj aŭ degenero de ŝia ekvilibro. Ŝi levis la kapon kiam Bert alproksimiĝis, kaj ekparolis per la loka dialekto:

— *Saluton, Terulo, ŝi diris, ni atendis vin, sed dumlonge vi ne venis.*

Bert respondis per la sama lingvo.

— *Ĉu mi malfruiĝis, Anika? Mi neniam konas la daton, sed ŝajnis proksimume tempo, ke mi venu ĉi tien denove.*

Li lasis ŝali siajn valizojn, kaj deko da etaj banikukoj alkuris por esplori ilin. Senluziigite ili sin alpremis ĉirkaŭ liaj piedoj, pepante scivoleme, kaj turnante supren siajn simiecajn vizaĝetojn. Li disŝutis por ili manplenon da nuksoj el sia poŝo, kaj sidiĝis sur oportuna ŝtono.

Se ni esceptas la banikukojn (kaj ankaŭ ili havas rekoneblajn trajtojn), kio en tiu priskribo estas fremda al nia tera sperto? Kaj tamen ni ricevas fortan impreson de ekzotiko; per la amasigado de signifoplenaj detaloj: la „neregulaj fragmentoj“, la „nekvadrataj“ truoj, la jupo kun kompleksa ŝablona desegnaĵo, la mezaĝa virino kies muskoloj ne malstreĉiĝis — ĉio ĉi, kun la zorge konstruita impreso pri la antikveco de la scenejo, sumiĝas je io nefera — kaj, sekve, marsa. Per tiaj rimedoj ĉiu bona aŭtoro kreas sian fonon kaj sian etoson. La ĉefa afero estas versimileco kaj unueco. La s.f.-verkisto unuavide ĝuas plenan liberecon en tiu ĉi afero — kaj tiun liberecon plene utiligis precipe la fruaj adeptoj — sed fakte ili ne estas malpli ligitaj ol ĉiuj aŭtoroj, se ili esperas nin konvinki sur la plej alta nivelo.

Sed se unu aŭtoro en unu verko devas eviti kontraŭdirojn, nenio malhelpas, ke du diversaj aŭtoroj, aŭ eĉ unu aŭtoro en du diversaj verkoj (kvankam tio estas pli malofta), havu iom diversajn konceptojn pri la sama afero. Jen ekzemple la sentoj de unu spacvojaĝanto pri la planedo Venuso:

Poste li ŝajnis perdiĝi en la ĉiamfreŝa senkompara gloro de la alproksimiĝanta planedo. Ne malproksime sube kaj ĉiusekunde pliproksimiĝante po kilo-

metroj, la neĝe blankaj brakoj de Venuso traarkis pli ol duonon de la ĉielo. Tie sube estis vivo kaj varmo kaj civilizo — kaj aero.

Ne tiel idilia ŝajnis tiu bela planedo al alia heroo, kaj ni ne miru pri tio:

Ambaŭflanke kreskis la natura netuŝita venusa arbarego. Plejparte ĝi konsistis el palega kaj, por nespertaj okuloj, malsanaspekta grizverdajo. Ie-tie ĝin sporade moderigis la ruĝeto de la malagrabra plantajo, kiun oni nomis pseŭdorozo — ĝi prefere memoriĝis Berton pri pinglohava petalkovrita dalio, kiu puŝiĝis ĝis diametro de ok futoj. Eĉ pli disaj, sed donante iom da intermito, estis sporadaj strioj de vera verdajo kaj ardezbluaj makuloj. Bert, penseme rigardante la etendajon ekde la nebulkaŝata maro oriente ĝis la ombrecaj montoj okcidente, energie malamegis ĉiun unuopan akreon da ĝi.

Sed la aŭtoro ne nur devas krei al si novajn mondojn: li devas ankaŭ manovri sur ili siajn rolantojn. Kio entute okazas sur tiuj malproksimaj mondoj kaj la spacoŝipoj, kiuj vojaĝadas de unu mondo al alia? Nu, oni povas proksimume dividi la okazaĵojn en du grupojn: (i) tiuj, kiuj ne okazas sur nia tero en nia jarcento, kaj (ii) tiuj, kiuj neniel diferencas de la okazaĵoj sur nia tero en nia jarcento. Ni konsideru unuope la du grupojn.

La unuan ni povas priskribi per kelkaj vortoj. La metodo estas: supozi iun gravan, eĉ fundamentan, modifiĝon de iu apenaŭ trovita, ne plenkomprenata fakto de nia nuna scienco — aŭ eĉ modifiĝon de tia modifiĝo! — kaj el tiu modifiĝo tiru verŝajnajn rezultatojn. Ne tro facile moku tion, amikoj, — ĝi ne estas tiel simple farebla kiel vi eble supozas! Nu, jen ekzemplo:

Troviĝis gapa truo en la malantaŭa muro de la kaĝo. La truo estis tiel granda, ke kvin viroj estus povintaj sin traŝovi samtempe. La metalo aspektis kurbigita kaj havis multajn ŝiregojn. La truo malfermiĝis al alia koridoro.

— *Mi jurus, flustris Penonz tra la nefermita kapajo de sia spackostumo, ke tio estas neebla. La dektuna martelego en la maŝinejo ne povus pli ol kurbetigi kvar kolorojn da mikroŝtalo per unu ŝrapo. Kaj nur unu ni aŭdis. La atoma dispecigilo bezonus minimume unu minuton por fari la aferon, sed la tuta loko estus venenige radioaktiva dum almenaŭ pluraj semajnoj. Morton, tio estas superestajo!*

Mirinda estajo, certe. Sed klarigon oni rapide trovas:

— *Nenia miraklo, li diris. Kiel vi scias, tiajn kaĝojn oni faras en elektromagnetaj muldiloj, kaj ni uzas por tio subtilan metalan polvon. La umo uzis siajn specialajn potencojn por malhelpi la ŝrapojn, kiuj kuntenis la metalon. Tio klarigus la misfluadon en la telefluora potenckablo, kiun s-ro Pe-*

nonz rimarkis. La umo utiligis la elektran energion, uzante sian korpon kiel transforman motoron, transformis la muron, forkuris laŭ la koridoro kaj poste ĝis la motorĉambro.

Tia estas la unua grupo. En la dua grupo, ne gravas se la agado prezentiĝas sur mondo en tute alia galaksio, je tempo centmil jarojn post nia epoko: la leganto tuj rekonas la trajtojn de la okcidenta mondo dum la dudeka jarcento. Ekzemple:

Kulpigi Klejon Harbank, se vi volas, pri tio, kio okazis ĉe Stacio 563 de la Siriusa Sektoro; aŭ kulpigu Vilhelmon Peterboro, kiun ni nomis la Bubo. Mi neniun kulpigas. Sed mi estas viro el Dorsaj.

La ĝenajoj komenciĝis je la tago, kiam la Bubo aliĝis al la Stacio kun siaj viglaj manoj kaj sia vetludista menso, kaj kiam li trovis, ke nur Klej, el ĉiuj tieaj viroj, ne volis vetludi kontraŭ li — malgraŭ tio, ke li laŭpretende estis iam vetludema. Kaj tio daŭris dum kvar jaroj da kunservado. Sed la fino komenciĝis en la tago, kiam ili finis kune la tagdejon.

Ili estis ĉirkaŭirintaj da Limstacion, kiu entenis nin, dudekon da homoj, — esplorante la eksteran vezikajon por trovi eventualajn trapikojn aŭ likojn. Tio estas malrapida duhora marŝado, tiu deĵoro, eĉ ekster la stacio, sur la supraĵo de la asteroido, kie preskaŭ tute mankas la gravito; kaj ni en la distroĉambro, nedeĵorantaj, divenis laŭ la tono de iliaj voĉoj kiam la interna pordajo suĉmalfermiĝis, kaj reehis al ni tra la metala koridoro la brua knarado dum ili formetis siajn spackostumojn, ke la Bubo estis dum la tuta deĵoro provokinta Klejon.

— *Ankoraŭ unu tagon, aŭdiĝis la voĉo de Bubo.*

— *Ankoraŭ kvindek kreditojn. Kaj kiel progresas la ŝparkaseto, Klej?*

Oni ricevas la impreson, ke malgraŭ spackostumoj kaj asteroidoj la homa vivo estas malmulte ŝanĝiĝinta, kaj certe ne pliboniĝinta aŭ pliprofundiĝinta, dum la venontaj plurmil jaroj. Sed baldaŭ ni renkontas ion ekster niaj spertoj:

— *Mort, diris la Bubo, sidigante apud ni, kia estas Hiksabrodo?*

Tuj ĉesigis ĉiuj paroloj en la distroĉambro, kaj ĉiu turnis sian atenton al la Bubo. Ĉiuj fremduloj devis registri sin ĉe Stacio kiel la nia kiam ili transiris la limojn de unu el la ceteraj galaksiaj potencoj en homan teritorion. Sed pro la izoleco de Stacio 563, nur malofte unu el ili venis al ni, kaj kiam tio okazis, tio estis unikajo.

— *Rigida kiel fajr-agitilo, mi diris. Fiera kiel Lucifero, honesta kiel sunlumo, kaj malvasta kiel kamelo survoje tra la trueto de kudrilo. Kvazaŭ homoida, sed kun vizaĝo simila al tiu de ŝaĥhundo. Vi konas la hiksabrodan reputacion, ĉu ne?*

Iu en la fono diris, ke ne, kvankam eble li faris tion nur por plaĉi al mi.

— *Ili estas la unuaj kaj solaj dungeblaj ambasadoroj en la konata universo, mi diris. Hiksabrod-*

on oni povas dungi, sed estas neeble lin misinflui, subaĉeti aŭ lin devigi prononci ion ajn krom la malvarma vero — kaj, homo, la vero estas malvarmega tiel, kiel la hiksabrodo ĝin prononcas. Jen kial ili estas tiel ofte dungitaj. Se okazas ia ajn politika disputo, ekde planeda nivelo ĝis la nivelo de galaksiaj potencgrupoj, ambaŭ partioj estas devigataj dungi hiksabrodon por reprezenti ilin dum la diskutoj. Tiel ili scias, ke la alia parto traktas ilin honeste. La kontraŭanta hiksabrodo estas vivanta garantio pri tio.

Oni vidas la avantaĝojn — ne nur de la hiksabrodoj, sed ankaŭ de la malproksima estonteco kiel fono por siaj rakontoj. Sed ne tro rapide kondamnu tiun ĉi literaturan ĝenron. Ĉiuj jarcentoj kreis siajn fantaziaĵojn: kial ne la dudeka? Kaj en la scienca jarcento, la fantazio nature prenas sciencan formon. Ni memoru, ke la eternaj verkoj de Ŝekspiro leviĝis el la krudaj melodramoj de la populara, primitiva teatro. En kelkaj rondoj la s.f. estas severe malaprobata, pro siaj „eskapemaj“ tendencoj kaj pro la fakto, ke ĝi deturnas la atenton de la homoj for de la seriozaj aferoj de nia socio. Ĉiu literaturo estas eskapema. Kiel mi indikis supre, gravas ne la temo, sed la prilaboro. Jam nun multaj verkistoj utiligas la eblecon krei fantaziajn situaciojn kaj sociojn por fari trafan komentarion pri la socio en kiu ni vivas, por averti la homojn de la dudeka jarcento pri la eblaj sekvoj de ilia malsaĝeco, kaj por esplori realajn moralajn problemojn. Kial ili ne verkas „realisme“, sur fono de la propra tempo kaj mondo? Nu, estas fakto, ke la homoj pli volonte legas fantaziaĵojn ol seriozajn romanojn; per la s.f. oni eble atingas legantojn, kiujn oni alie maltrafus. Ne forgesu ankoraŭ, ke la majstroverkoj de Ŝekspiro estis verkitaj por la populara — ja popola — teatro!

Unu lasta vorto: ĉu la s.f.-fantaziaĵoj estas eble profetaĵoj? Ĉu ili prezentas eĉ proksimume la „formon de la venontajo“? Mi supozas, ke ne. Kaj tamen pri unu tia „profetaĵo“ ni certe ĉiuj konsentas. Temas pri rakonto pri la ne tro malproksima estonteco — ĉirkaŭ la jaro 2005 — kiu komenciĝas jene:

Jen estas la historio pri Rajsling, la Blinda Bardo de la Spacovojoj — sed ne la oficiala versio.

Vi kantis liajn vortojn en la lernejo. Eble vi kantis ilin en la franca lingvo, aŭ la germana. Aŭ eble en Esperanto, dum la ĉielarka standardo de Tero flirtis super via kapo.

Jes, tiun tagon la homaro nepre ĝisvivu!

William Auld

*) „Princino de Marso“ de Edgar Rice Bourroughs, en traduko de K. R. C. Sturmer. Eldonis The Esperanto Publishing Company.

Marjorie Boulton

2056

PERSONOJ:

SINJORO VERDO	— 120-jara
SINJORO GRIZO	— 95-jara
JULIO ALTMANN	— 20-jara
LIDIO MIRKOVIĆ	— 20-jara

SCENO: En belega publika ĝardeno. La reĝisoro devos iom uzi sian imagpovon por krei angulon de ĝardeno, kiu sugestos teknikan progreson. Plej malproksime, ni vidas parapeton; ĝi estas palverda kaj tre harmonias kun la sceno. Maldekstre, ronda lampo sur stango estas fiksita al la parapeto. Pli proksime al la aŭdantaro ni vidas duoblan benkon, laŭ tipo ofte videbla jam en parkoj, sed laŭ pli eleganta formo kaj ŝajne el iu nova materialo. Unu sidloko frontas la parapeton, unu la aŭdantaron. Laŭeble, la reĝisoro montru belajn florprenajn bedojn, arbojn, arbustojn kaj aliajn belajojn laŭ sia propra fantazio, kreante, ekzemple, novajn flortipojn kiuj ankoraŭ ne ekzistas. SINJORO VERDO kaj SINJORO GRIZO envenas de dekstre; ili argumentas amikece. Kvankam SINJORO VERDO estas 120-jara, li aspektas kiel nuntempa sana 70-jara viro, kaj la 95-jara SINJORO GRIZO aspektas kiel nuntempa 60-jara viro. La reĝisoro uzu sian propran fantazion por la vestaĵoj; sed la du maljunuloj portu riĉajn kolorojn, malhelajn, kaj aspektu iom imponaj. (La voĉoj ne estu malbele altaj kaj malfortaj, nur malfortetaj.)

SINJORO VERDO

Vi diras, ke mi estas Estontecisto nur pro sentimentaleco. Nu, mi honeste opinias, ke post centdudek jaroj oni ne plu povas esti sentimentala, amiko!

SINJORO GRIZO

Mi ne intencis diri, ke vi estas afektema; mi scias ke vi estas sincera, sed iom tro naive molkora. Ĉu ni sidiĝu?

SINJORO VERDO

Bone. (Li volas sidi kaj rigardi la parapeton.) La sunlumo estas ja tre agrabla.

SINJORO GRIZO

Pardonu mian stultecon, sed mi preferas ne rigardi la riveron. Mi konfesas ke la grandega alteco kaŭzas al mi kapturigo.

SINJORO VERDO

Laŭ via deziro — estas al mi egale! (Ili sidiĝas sur la benkoparto kiu rigardas la aŭdantaron.)

SINJORO GRIZO

Nu, vi scias ke mi ne estas Pasintecisto pri absolute ĉio ajn. Ekzemple, en la Referendumo de la 6-a majo 2035 mi ja voĉdonis por la Tutmonda Maljunula Sanvojaĝservo — kiun, fakte, ni ambaŭ nun uzas, vi el via terparto kaj mi el mia! — sed tiam mi tute ne voĉdonis, pensante pri estontaj avantaĝoj al mi mem!

SINJORO VERDO

Nur laŭ la principo, ke helpi plenan sanon pli utilas ol kuraci malsanojn, ĉu?

SINJORO GRIZO

Ĝuste tial. Mi neniam estis kontraŭ ĉiuj plifaciligoj de la homa surtera situacio. Sed vi Estontecistoj, laŭ mia opinio, penas eĉ tro faciligi la vivon, forpreni valorajn defiojn kaj stimulojn... Ekzemple, pri tiu baldaŭa referendumo (pri la pli granda fleksebleco de la reguloj pri junec-iniciado. Nu, pri la propono, ke oni rajtu iniciigi dum la dekdua jaro, kaj ke oni ne absolute devu iniciigi ĝis la deksepa jaro, mi povus konsenti; sed la propono ke la infanoj mem elektu la daton ŝajnas al mi tre malprobinda.

SINJORO VERDO

La lokaj iniciad-komitatoj havos la rajton rifuzi vere nematuran kandidaton, por ke neniu ajn infano petu seksan liberon nur pro scivolemo aŭ imitemo.

SINJORO GRIZO

Jes; sed mi timas ke tiu granda fleksebleco de la vivpostuloj igos la vivon tro facila; la vivo estas jam tre facila por la nuntempaj gejunuloj. Ili vere devas lerni toleri, atendi, akcepti la vivon kiel ĝi estas.

SINJORO VERDO

Oni parolis same kiam ni estis junaj — ni, kiuj edukiĝis per tredo kaj timo. Nuntempe la dudeka jarcento ŝajnas pratempo de barbara krueleco kaj nenecesa angoro; eble post alia jarcento oni miros, kiel la dudekunujarcentuloj eltenis!

SINJORO GRIZO

Se jes, la raso ja estos malfortiĝinta, kiel mi nun timas.

SINJORO VERDO

Nu, mi iom dubas pri la simptomoj de degenerado en niaj junaj submaraj vetkurantoj, niaj lunvojaĝemaj geknaboj, aŭ la multaj gelernejanoj kiuj proponas sin por sciencaj esploroj! La homo estas nature aventurema; kaj vera malfeliĉo povas pli malfortigi nin, ol iu ajn feliĉo!

SINJORO GRIZO

Sed kia deviga defio eĉ hodiaŭ proponas sin al niaj gejunuloj?

SINJORO VERDO

Nu, la iniciado mem postulas moderan kuraĝon kaj sinregadon.

SINJORO GRIZO

Konsentite! Sed poste, kio? Aŭ antaŭe?

SINJORO VERDO

Mi kredas, ke la vivo mem ĉiam portos al ili defiojn. La tero povas iĝi pli sekura, la socia ordo pli justa kaj milda; sed homoj restas homoj; ili ankoraŭ frontas amon, familian kunvivadon, labordevon kaj morton.

SINJORO GRIZO

Ni neniam interkonsentos! Tamen, la referendumo montros la publikan opinion. Mi havas rendevuon kun amiko el la Antarkta Regiono — interesa ulo kun multaj neordinaraj memoroj! (*Leviĝas.*)

SINJORO VERDO

Ĝis la, do! Mi restos ĉi tie kaj rigardos dum duonhoro la florojn. Eble mi havos nur kelkajn printempojn nun, kaj floroj ankoraŭ neniam tedas...

SINJORO GRIZO

Ĝis la! (*Foriras. SINJORO VERDO dum paŭzeto rigardas la florojn. Dum li meditas, JULIO ALTMANN envenas. Bela, sana, simpatia junulo en helkoloraj, simplaj vestaĵoj. Sed nun li estas preskaŭ frenezeca pro interna konflikto kaj doloro. Li kuras al la parapeto, kaj komencas grimpi, preta sin ĵeti malsupren. SINJORO VERDO vidas lin kaj stariĝas.*)

SINJORO VERDO (*milde kaj digne.*)

Ne.

JULIO (*respektive sed senespere.*)

Kial ne?

SINJORO VERDO

Eble jes, eĉ; sed pripensu iomete unue.

JULIO

Amiko, mi ne plu kapablas toleri miajn proprajn pensojn!

SINJORO VERDO

Do, neniu ajn rajtas postuli, ke alia homo, kiu havas netolereblan kaj neforigeblan doloron, gardusian propran ekziston. Sed la plimulto de niaj doloroj estas aŭ forigeblaj, aŭ tolereblaj per iom da saĝo. Venu ĉi tien. (*JULIO proksimiĝas heziteme.*) Ne timu; mi estas Estontecisto; mi deziras la feliĉon de la nova generacio. (*Iom pli aŭtoritate.*) Sed ankaŭ mi estas centdudekjara; tio signifas, ke dum dudek jaroj mi estis Memorgardanto kaj Popola Konsilanto, kaj vidante urĝan malfeliĉon, havas la rajton kaj devon pridemandi la kaŭzon. Akceptite?

JULIO (*kun klinita kapo*)

Jes, devige akceptite...

SINJORO VERDO

Se mi ne povos helpi vin, aŭ proponi al vi helpanton, mi ne plu ĝenos vin. Dume, eksidu. (*JULIO eksidas apud li.*) Bone; nu, sincere klarigu: kial vi promesplena civitano, volas mortigi vin?

(*LIDIO MIRKOVIC envenas, kurante, plorante. Ŝi estas bela junulino, arda, sincera, kaj portas helajn, simplajn vestojn. Vidinte JULIO'n ŝi ĵetas sin al la piedoj de SINJORO VERDO.*)

LIDIO

Julio, Julio, plej kara! Nur lasi por mi tiun teruran leteron? — Sinjoro, vi estas Konsilanto, ĉu ne? Altestimata, mi petegas vin, helpu mian karan, kion ajn mi mem devos fari aŭ trasuferi! Li ne mortu! La vivo povas esti tiel bela!

SINJORO VERDO (*karesante ŝin.*)

Jes ja; kaj bela knabino simbolas la belecon de la vivo.

JULIO

Lidio, ni ne povos solvi la problemon! Kial turmenti nin daŭre? Mi malekzistu; vi forgesu min!

SINJORO VERDO

Vi tute ne kverelis, ŝajne?

JULIO

Kverelis! Dum du jaroj en la Prova Domo ni neniam kvereletis; dum du jaroj en la Prova Domo nia amo kreskis! Sed nun mi vidas, ke tiu amo sankta, kiu lumigis niajn vivojn kaj donis al ni vivocelon, estas por mi fatala.

LIDIO

Julio, mi juras, ke se vi mortigos vin, mi sekvos vin!

SINJORO VERDO

Ni ne parolu pri la morto, sed pri la vivo. Vi du amas unu la alian per arda, sincera, sankta amo. Post du jaroj en la Prova Domo vi nepre

scias ke nek imitemo, nek frivola scivolemo, nek urĝa amoro, motivas vian rilaton. Nu do, vi du posedas ion, kiu estas inter la plej karaj trezoroj de la homaro; kaj Julio, ne povante portadi tiun ŝarĝon de ĝojo, volas sin mortigi. Ne! Diru, mi petas, la tutan veron.

JULIO

Ni kompreneble volas fari la Porĉiaman Promeson kaj akiri la rajton naski infanojn.

SINJORO VERDO

Des pli bone.

LIDIO

Ni estas ambaŭ sanaj, fizike kaj mense.

SINJORO VERDO

Kaj ĉu vi estas ambaŭ ĉiel liberaj?

LIDIO

Jes, sed...

JULIO

Mi havas tre fian heredaĵon. Ĝi estas tiel elstare fia, ke mi ne rajtas riski la transdonadon.

SINJORO VERDO

Ĉu oni oficiale forprenis de vi la rajton patriĝi?

LIDIO

Tute ne!... Eble tio estus por ni pli facila... Mi insistas, ke li estas tro skrupula; ke per bona medio kaj edukado ni povos forigi iun ajn inklinon al tiu heredaĵo...

JULIO

Sed, Lidio, mi mem ne toleras la penson, ke mi povus naskigi, kaj pere de vi, tian homon!

SINJORO VERDO

Ĉu vi konsultis genetikiston?

LIDIO

Jes; mi petegis tion. La genetikisto diris, ke oni ne povas esti certa, sed ke Julio nepre rajtas riski.

JULIO

Sed pere de vi, plej kara, pere de vi?

SINJORO VERDO

Mi komprenas; ju pli profunde amo validas, des pli ĝi skrupulemas, des pli ĝi hezitas pri sia propra merito. Kio estas tiu heredaĵo kiu obsedas vin?

JULIO

Mia patrino estis la filino de murdinto. Jes, vi ŝokiĝas; tio vere estas memoro, ĉu ne? Ŝia patro tre kruele traktis la patrinon; mi neniam konos ĉiujn detalojn; sed kiam mia kompatinda patrino naskiĝis, li tute ne amis ŝin; li kredis ŝin nur nova

elspezo kaj ligilo. Eble feliĉe, ŝi ne havas tre detalajn memorojn; sed laŭ la arkivoj... mia patrino avo, kiam mia patrino estis ankoraŭ bebino, mortigis la avinon en terura kverelo... batis ŝin sur la vizaĝo per granda vitra kruĉo ĝis ĝi dispeciĝis... tiom da sango frenezigi lin... li finfine strangolis ŝin... la policistoj alvenis ĝustatempe por savi mian patrinon, kiu edukiĝis en orfejo. Mia avo estis monstro, monstro! Tiu memoro ĉiam turmentis Panjon; kaj mi ne povas forgesi, ke tia monstra sango fluas en miaj vejnoj. — Kaj rigardu mian Lidion, kiun mi amegas; pli bone morti tuj, ol riskigi al ŝi la mizeron transdoni tian heredaĵon!

LIDIO

Julio, Julio! nur vin mi deziras! Kiel ajn!

SINJORO VERDO

Nu, la historio estas ja terura, kaj pli terura ol mi atendis. Sed viaj gepatroj estas normalaj ĉu?

JULIO

Ŝajnas ke jes... normalaj, eĉ banalaj...

SINJORO VERDO

Mi kredas ke vi tre troigas la riskon; ke, eble ĉar vi havas ian neracian kulposenton kaj kvazaŭ timas vian propran feliĉon, vi kreas por vi teruran himeraĉon. Vi tre serĉis en arkivoj, ĉu?

JULIO

Jes.

SINJORO VERDO

Ĉu vi trovis aliajn patologiajn tipojn?

JULIO

Ne. Tiu murdo okazis en 2011. Panjo edziniĝis kun Johano Altmann en 2034, kaj mi naskiĝis en 2036. Miaj gepatroj...

SINJORO VERDO

Altmann...?

JULIO

Mi pardonpetas?

SINJORO VERDO

Ne gravas. Mi ekpensis pri io. Viaj gepatroj...

JULIO

Ŝajne vivas feliĉe kaj normale. Mi ne trovis alian strangaĵon.

LIDIO

Kaj ni ne trovis monstron aŭ strangulon je la patra flanko.

JULIO

Ne; sed ĉiam banalulojn! Kiu scias ĉu tia ordinara morala forto ĉiam venkos la monstran inklinon?

SINJORO VERDO

Ej, mia amiko, monstro infera sin kaŝas en ĉiu homo; sed la plimulto de ni regas ĝin. (*Paŭzeto*). Sed... se vi ja scius, ke unu el viaj prapatroj estis neordinare valora homo... ĉu tio sufiĉus por re-trankviligi vin?

JULIO

Jes! Jes, se nur mi povus trovi ion por porti ekvilibron... jes, mi akceptus! Sed kiu proponus al mi tian scion? Mi mem traserĉis multajn arkivojn, kaj trovis nenion signifan.

SINJORO VERDO

Julio Altmann ...ĉu vi konas la nomon de via patra avo?

JULIO

Jes: Rudolfo Altmann.

SINJORO VERDO

Rudolfo... Nu... tion oni kutime ne scias, sed vi trafoliumis multajn dokumentojn, pelite per via obsedo... ĉu vi konas la plenan nomon de via praavo... de la patro de Rudolfo Altmann?

JULIO

Fakte jes; mi scias: Henriko Altmann, kiu naskiĝis en 1951 kaj mortis en 2015.

SINJORO VERDO

Henriko Altmann, pontinĝeniero, Nebenweg 45, Dresden?

JULIO (*ekstarante en mirego*)

Vi estas sorĉisto! — Tio estis la adreso de mia avo Rudolfo Altmann, ankaŭ! Mi vizitis lin, mi mem, estante knabeto! Mi ne bone memoras lin... nur kalvan bonulon... sed vi pravus pri la adreso!

LIDIO

Kiel vi scias pri li? Ĉu vi vere estas sorĉisto?

SINJORO VERDO

Ne... nur tre maljuna maljunulo. Julio, via praavo, Henriko Altmann, estis viro, kiu estis preta suferi mokojn, eĉ malhelpi sian karieron, perdi amikojn kaj protektantojn, elspezi, labori, pro absolute malegoista celo, kiel modesta helpanto en la liberigo de la homaro.

LIDIO (*ĝoje*)

Julio, Julio!

JULIO

Se nur mi certus pri tio... tio ja estus por mi savo kaj feliĉo!

LIDIO

Kaj tial, por mi ankaŭ!

SINJORO VERDO

Mi ne povas diri ke mi intime konis Henrikon Altmann; mi parolis kun li eble kvar-kvin foje... ni interŝanĝis bildkartojn kaj maloftajn leterojn dum eble dek jaroj... sed mi havas en la poŝo la pruvon, ke li havis ian neordinaran bonfaremon. (*Li elprenas libreton.*)

LIDIO

Kia stranga, antikva tipografio!

SINJORO VERDO

Jes! la libro estas nun kuriozaĵo; sed mi gardas ĝin, por memori min dum miaj sunsubiraj tagoj ke mi ne misuzis mian vivon. Ĝi estas la Kongreslibro de la granda Jubilea Kongreso de Esperanto, 1985. Jen. (*Li trafoliumas la libron.*) Jen Henriko Altmann; numero 283; via praavo. Li nepre havis kelkajn noblajn ecojn, eĉ elstarajn; li estis tre fervora esperantisto.

JULIO

Esperantisto? Sed kiel oni povas esti esperantisto — isto de lingvo? Kvazaŭ oni estus spiristo aŭ manĝisto...?

SINJORO VERDO

Jes, Esperanto nun ŝajnas al vi du natura kiel spirado; vi tuj uzas ĝin ekster via propra lingva regiono.

JULIO

Jes, hejme mi parolas la neoteŭtonan dialekton, Lidio — Lidio Mirkoviĉ — la panslavan; hejma dialekto estas iom... e... komforta...

LIDIO

Jes, komforta, kiel pantofloj! sed kompreneble ekster la hejmmregiono ni uzas Esperanton.

JULIO

Inter ni... sed kia besto estis tiu esperantisto — kvazaŭ Linjo estus panslavistino?

SINJORO VERDO

Se vi volas havi multajn detalojn, vi povos atingi mian hejmon per ŝtallibeto en duonhoru; aŭ iu ajn altgrada lernolibro pri lingva historio klarigos al vi; sed mi certigas al vi nun, ke Henriko Altmann kuraĝis uzi kaj propagandi Esperanton en 1985 — kiam la plimulto de la homaro ankoraŭ mokis, rezistis, eĉ malamis ĝin. Ĉu vi komprenas ke en 1985 nacienco (vi sendube konas la koncepton, el la enciklopedio?) —

LIDIO

Jes —

SINJORO VERDO

— ankoraŭ floris? ke homo, kiu celis interkomprenigi la homaron per neŭtrala lingvo, riskis

mokojn, kaj en multaj regionoj eĉ gravajn mal-
 agrablaĵojn? Jes, ni vojaĝas nun al la luno kaj la
 proksimaj planedoj, kaj malmulte pensas pri la
 oferoj de la pioniroj; ni ĉiuj flugas en ŝtallibeletoj,
 atomhelikopteroj aŭ raketoj kaj ne pensas pri iliaj
 martiroj; vi gejunuloj ne memoras, kiel mi, ke
 antaŭ nur duono de jarcento, oni histerie ridegis
 kiam la unuaj pioniroj preparolis la eblon fari
 ŝtofojn kiujn oni neniam devas purigi; kaj por vi,
 la mondo ĉiam havis unu lingvon. Sed mi memoras
 aliajn tagojn; dum pli ol cent jaroj, la homoj kiuj
 uzis Esperanton ŝajnis stranguloj, devis suferi,
 toleri, kaj nekredeble pacienci.

JULIO

Mi tre ĝojus, se vi montrus al mi viajn relikvojn,
 pri tiu stranga epoko.

SINJORO VERDO

Jes, mi ĝojos montri ilin al vi. Mi povos eĉ
 montri al vi kelkajn leterojn de Henriko Alt-
 mann... jes, esperantajn leterojn kiujn vi, Lidio,
 komprenos tuj; kaj vi vidos kiel li laboris... inter
 moko kaj malfacilaĵoj... por kontribui al la libero,
 kiun vi nun ĝuas en via generacio. Ni luan ŝtal-
 libeleton, ĉu? — Vi povas fieri pri via praavo,
 Julio; tiu sango povos neŭtraliĝi la sangon de
 patologia monstro, kaj doni kaŭzon eĉ por via
 sentema altruismo... via skrupulemo.

LIDIO

Julio, Julio! via praavo estis vere tre granda
 homo!

SINJORO VERDO

Ne, li ne estis „granda”; nek mi, kiu strebis
 simile; la plimulto de ni estis simplaj homoj... tre
 banalaj, eble... sed kun homamaj flamoj en la
 koroj, simplaj homoj povas preskaŭ fari mirak-
 lojn... Mia laboro nun estas finita; la tago kiun
 mi atendis, antaŭ longa tempo venis... mi konfesas,
 ke iasence mi eĉ sentis perdon! Sed la vivo ĉiam
 longiĝas, la mondo daŭre riĉiĝas; oni vidas ĉiam
 novajn perspektivojn por la homa raso; eble vi du
 estos alispecaj pioniroj... Vi ne plu emas enabism-
 iĝi, ĉu?

JULIO

Ne.

SINJORO VERDO

Do, ni trafu tiun ŝtallibeleton, kaj vizitu mian
 hejmon. Mi montros al vi miajn etajn trezorojn
 el forgesita epoko... Ne danku; mi ĝojos klarigi
 ĉion al vi... tiaj memoroj estas la ĉefaj plezuroj
 de maljuneco... ke ni faris ion por la homaro...
 kaj eble ĉe la vivofino nur tiaj memoroj ankoraŭ
 gravas... Ni iru do!

(*La kurteno falas dum ili foriras.*)

(La supra dramo estis premiita en la Belarta Konkurso '56.)

La Hispanaj Romancoj

Hazardo certe ludas rolon en la formigo de tio,
 kion kulturaj epokoj akceptas kiel la frua literaturo
 de iu nacio: ĉar dum la mult-jarcenta modifado
 per aldonoj, plibonigoj k.s. de la plejparte per-
 buŝa transdonado de kantoj kaj eposoj, el kiuj
 fruaj literaturoj senescepte konsistas, multo perd-
 iĝas, kaj la kapricoj de unu generacio povas decidi,
 kio restos. Sekve, povas okazi, ke kiam oni fine
 registras la restaĵojn, tiuj estas ne nur fragmentaj,
 sed ankaŭ jam perdintaj la krudan freŝon de siaj
 fontoj.

La invento de la preso certigis, ke multaj eŭro-
 paj bardoliteraturoj registriĝis en la formo, kiun
 ili atingis en la XVa kaj XVIa jarcentoj, kaj ni
 sekve trovas, ke multaj el ili jam evoluis en rafin-
 itajn, striktajn formojn, kiuj bedaŭrinde ankaŭ
 montras rafinemon de penso, kiu donas elegantan,
 idealistan, sed ne tre aŭtentikan bildon de la heroaj
 tagoj, kiujn ili pretendas priskribi. Ili estas unu-
 vorte „romantikaj”. Sekvantaj epokoj ofte intence
 emfazas la malrealajn afektaĵojn de tiuj verkoj
 tiel, ke la termino „romantika” fariĝis la antonimo
 de „realista” aŭ „klasika”.

La hispanaj historiaj romancoj, aŭ baladoj, ali-
 flanke ricevis sian definitivan formon en epoko
 unike konvena: epoko en kiu ili tre verŝajne atingis
 sian artisman apogeon, jam tajliĝinte en serion
 da koncizegaj historietoj konservantaj sian krudan
 realismon; sed epoko por kiu ili ankoraŭ estis tiom
 aktualaj, ke la imitaĵoj, kiujn ili tiam inspiris — la
 romancoj trobadoreskaj — estas de ili apenaŭ
 distingeblaj eĉ ĉe spertuloj, kontraste kun la baldaŭ
 sekvontaj romancoj fantaziaj kaj romancoj artismaj.
 Do la romancoj antikvaj reprezentas entute tre
 kontentigan fandiĝon de temo kaj stilo.

Oni supozas, ke tiuj romancoj origine devenis
 de la *cantares de gesta*, la plej frua hispana poezio,
 per kiu la trobadoroj kantis la heroagojn de la
 turbulenta epoko inter la maŭra konkero de Ro-

drigo, la lasta gota reĝo, en la VIIIa jarcento, ĝis la luktoj de la renoma hispana naciheroo, El Cid, kontraŭ la maŭroj en la XIa jarcento. La romanoj, estante scenoj kaj agoj speciale elektitaj pro sia aparta intereso, kompreneble montras rimarkindan dramatan efekton, kiu fariĝis des pli intensa post plurgeneracia polurado.

En la komenco la ritmo de la *cantares de gesta* estis sufiĉe kruda, baziĝante sur la deksilaba ritmo de la analoga *Chansons de Geste*, sed variante inter dek kaj dudek silaboj kun tre neregula cezuro rezulte, ke nur la asonanco, kiu daŭris tra ĉiu tuta sekcio, indikis la versofinon. Dum la XIIIa jarcento, tamen, la arto de la trobadoroj (*mester de juglaria*) cedis antaŭ la arto de la klerikoj (*mester de clerecia*) kun rezulta emo al pli striktaj formoj, ĝis la romanca verso fine atingis la ekstreman regulecon de la aleksandro kun dek kvar versoj strikte dividitaj en hemistikojn de sep silaboj. La natura reago kontraŭ tiu ĉi monotona perfekteco donis en la XIVa jarcento variaĵon de dek kvar kun dek ses silaboj, el kiu naskiĝis la finforma baza verso de la romanoj: dek ses silaboj kun forte akcentita cezuro post la oka silabo, kiel en

„La damoj maŭraj rigardas// de la turoj de l' Alhambra”

sed tiu ĉi verso estas ja pli baza ol regula.

La romanoj montras la karakterizojn de ĉiuj bardaj eposoj: zorga re-dirado de esencaj frazoj kaj nomoj, kaj senkomplika agado kun absoluta manko de analizo aŭ subjektiva emocio; ĉar iuj opinioj esprimataj venas de la buŝo de karaktero en la poemo, ne de la aŭtoro. Ili ankaŭ prezentas nude klaran bildon de sia naskolando kaj epoko, kies plej trafaj trajtoj estas la eterna luktado de la mahometana kaj kristana civilizoj, kaj la fierego de la nobeloj. Laŭ onidiro la hispanoj emas plendi kontraŭ la anglaj verkistoj, kiuj insiste prezentas ilin, kiel fierajn, sed vidu, kiel demonstras tiun fieron

La Romano de la Grafo Fernán Gonzalez

„Bona graf' Fernán Gonzalez, vin petas reĝa ordon',
ke vi iru la kortegojn, kiuj stariĝis en León;
se vi iros tien, grafo, vin premios ja trezor',
vin premios Palanzuela, ankaŭ Palencia la Mayor,
vin premios naŭ vilaoj, kun tiuj ĉe Carrión;
vin premios Torquemada, kaj la turo de Mormojón,
vin premios Tordesillas, kaj la turo de Labatón.
Bona grafo, se vi ne iros, vin premios pundolor'”.
Al tio respondis la grafo, kaj parolis per jena ton':
„Vi sendito estas, amiko, ne meritas kulpon, do;
ĉar mi ne timas al la reĝ', nek al tiuj ĉirkaŭ l' tron'.
Domojn kaj kastelojn havas, ĉiujn je mia ordon',
iujn mia patro lasis, multajn gajnis propra pov';
kiujn lasis mia patro mi donis al riĉaj homoj,
kiujn mi gajnis persone mi donis al homoj povraj;
al posedant' de sola bovo mi donis novan, ke estu duop';
al patro de fraŭlino donis mi tre riĉan don,
al kiu la mono mankadis mi helpas per pruntedon';
ĉiun tagon kiu aŭroras, ili mia porpreĝas do,
ne preĝas ili por la reĝ', kiu ne meritas tro;
li al ili trudas ŝarĝojn, kaj mi prenas tiujn for”.

Jen do fierego! Fierego, kiu ribelemas pro la nura povo ribeli, anstataŭ por eventuala rabaĵo, kaj tro dignas por puni la nuran senditon, kvankam tiu prezentas sian mesaĝon kun konsterna rekto. Tio ne estas la pufa aroganteco de la tradicia rabisto-nobelo; tio estas la digna aplombo de virego, kiu scias taksu la propran meriton. Notu la serenatan katalogon de personaj kvalitoj kaj, pli grave, havaĵoj. Tiu serena memsufiĉo, ne avareca rabemo, karakterizas la hispanan nobelon de la mezepoko, kiel li speguliĝas en la romanoj antikvaj. La memsufiĉo, kiu ebligas ilin invoki la helpon de „tiuj, kiuj manĝas mian panon” kontraŭ la reĝo, kiam tiu emas agi tro reĝece, sciante ke la helpo nepre venos.

Al la reĝo ili estis ĝenerale kontentaj cedadi la reĝan potencon, kondiĉe ke li lasis ilin trankvilaj, sed se la kompatinda reĝo ĝenis ilin, la preteksto pro lia suvereneco forĵetiĝis, kaj ili humiligis lin, ĉu per ribelo, ĉu per sinteno. Tiel la potenca kaj grandioza El Cid, ekzilita de la reĝo por unu jaro, respondas al tiu ĉi pundeĉo:

„vi min ekzilas por unu, mi min ekzilas por kvar, do”.

kaj ŝanĝas la ekzilvojaĝon en triumfan kavalkadon kun ĉashundoj por la distro de la cent distingitaj sinjoroj, kiuj akompanas lin.

La alian karakterizon de mezepoka Hispanujo, la samtempan ekziston en la lando de du civilizoj, mahometana kaj kristana, la romanoj ankaŭ spegulas, precipe tiuj nomataj frontoromanoj, plejparte komponitaj en la XIIIa kaj XIVa jarcentoj. Ekzemplo de tiuj estas la

Romano de la Perdo de Antequera

La matenon de San Juan, ĉe tempo de la sun-ekflagro,
festegon faris la maŭroj sur la kampo de Granada.
Turnadante la ĉevalojn kaj luktante je la lancoj,
riĉajn flagetojn tenante broditajn de la amataj,
riĉajn mantelojn portante teksitajn el or' kaj skarlato.
La maŭro, kiun am' posedas, simbolojn de tio montradas,
kaj kiu amoron ne sentas, ne estas tie nun skermanta.
La damoj maŭraj rigardas de la turoj de l' Alhambra;
la reĝo ankaŭ rigardas interne de la Alcazaba.
Venis maŭro laŭte vokanta sangante je la vizaĝo:
„Kun permeso, bona reĝ', mi donos perturban novajon:
la reĝido don Fernando Antequera'n sukcesis kapti,
multajn maŭrojn lasis mortaj; mi estas li, kiu eskapis,
kaj mi portas sep lancopikojn; la plej eta vivon ellasus.
Tiuj, kiuj kun mi eskapis, en Archidona sin kaŝas”.
Kiam la reĝ' aŭdis ĉi tion, la kolor' al li ekŝanĝis.
Li igis soni trumpeton, kaj voki ĉiujn al armoj.
Li igis kunsvarmi la siajn por sin formi en kavalkado.

La leginto certe rimarkis ne nur la monotonan ripetadon de la sama asonanco tra la tuta romano, sed ankaŭ, ke la hemistikoj staras kvazaŭ memstaraj versoj — tiel ili ja estis unue presitaj, kun asonanco ĉe la fino de ĉiu alterna verso. La rezulta reguleco emfazas la monotonon; sed oni devas memori, ke tiuj romanoj devis konveni por deklamado aŭ kantado en mezepokaj kasteloj kaj foiroj, kaj la trobadoroj tre verŝajne ĝojis tamtami tiujn formuligajn regulaĵojn, kiuj kvazaŭ legitimigis la

inspirecon de la verkoj. La abrupta kaj arbitra ritmo aliflanke kvazaŭ rapidigas la agadon, akordas kun la tradicia „lakona energio” de la romanoj, kaj reliefigas per kontrasto la glatemon de la oftaj ripetadoj, kiuj ne povas ne eĥi samajn ritmojn inter si, estante samaj frazoj, tiel ke ili fariĝas preskaŭ hipnotigaj psalmoj. Oni povas kontroli tion en la Romanco de Fernán Gonzalez rimarkante, ke post la fluo de la versoj katalogantaj la rekompencojn, kiujn li ricevos, venas la kvazaŭ perŝtone perturbita

„Al tio respondis la grafo, kaj parolis per jena ton’”

kiu tre efike atentigas, ke la jusa parolinto jam ne parolas.

Kompreneble, oni ne scias kiagrade, se iel, la „sinalefo” de la moderna hispana poezio, kiu povas fandi en unu eĉ ses vokalojn, ekzistas en la romanoj; sekve, estas iom riske teoriomadi pri ritmoefikoj; sed, ĉar spertula esplorado sugestas, ke ĝi preskaŭ ne ekzistis eĉ ĉe sinsekvo de samaj vokaloj, estas verŝajne, ke la supraj tradukoj redonas preskaŭ precize la originajn ritmojn.

Ankaŭ rimarkindas en la supra romanco la atentigo, ke „kaj kiu ne amoron sentas ne estas nun tie skermanta” ĉar ĝi simboligas la sentimenton de la dekadencaj „kavaliraĵoj”, kiujn Cervantes satiris kun murda ironio en sia unika verko; kaj, katalogante la necesegajn atributojn de vaganta kavaliro, kiujn don Kihote jam akiris, parafrasas la supran citon per

„...nenio restis al li, krom serĉi sinjorinon je kiu li enamiĝu, ĉar la vaganta kavaliro sen amata estas urbo sen folioj kaj sen frukto”.

Sed Cervantes satiris degenerintan kaĉon, ne la romanojn antikvajn, kiujn li fakte estimis, kaj ofte citis, kiel kiam Sancho Panza, sendita por venigi la ne-ekzistantan sinjorinon Dulcinea, diras senespere al si la vortojn de Fernán Gonzalez

„Vi sendito estas, amiko, ne meritas kulpon do”

Eble estas pro tio, ke la romanoj estas elektitaj kaj rafinitaj ĉerpoj el pli granda tuto, ke multaj el ili finiĝas laŭ maniero, kiu sugestas tuj sekvontan okazaĵon, kvazaŭ la bardo prefere al senkoneksa poemo deziras suflori la sekvontajn de sia kanto, kaj tial rafinigas en koncizegon — fakte en sian finan verson nur — la sekvan aventuron aŭ okazaĵon de la origina eposo. Tio donas agrable surprizan, ofte konsternan, pikon al la poemfino, kiu havas analogon en iu moderna poezio.

Tiel oni trovas en romanco titolita Doloro de Gonzalo Gustios antaŭ la kapoj de liaj filoj, ke la intensego de la fino komplementas la tutan antaŭan parton de la poemo. Temas pri la maŭra reĝo, kiu petas sian kaptiton, Gonzalo Gustios, ke tiu identigu ok kapojn de nobelaj malamikoj, kiujn la reĝaj soldatoj mortigis en batalo. Gonzalo Gustios konsentas, kaj forviŝinte la sangon de la unua kapo, rekonas sian filon propran. Sep fojojn

ankoraŭ li forviŝas la sangon de kapo, kaj ĉiun fojon rekonas filon sian. Liaj lamentadoj antaŭ la kapoj kortuŝas la tutan urbon de Córdoba, kaj la reĝo mem celas konsoli lin donante al li maŭran knabinon, fakte la propran fratinton, por ke li dronigu sian doloron en amoro. La romanco finiĝas jene:

Si al li venis en karceru kaj kun amor’ lin kuracis;
fratino estis de l’ reĝ’, fraŭlino mola kaj amarda;
kun tiu Gonzalo Gustios perdis finfine turmentadon,
ĉar de ŝi li generis al si filon, kiu venĝos al siaj fratoj.

Sume do la karakterizoj de la romanoj estas konciza kaj objektiva prezento ofte kulminanta en trafa fino, kaj bildiganta landon plenan de heroaj militistoj, kie la kompatinda reĝo ne povas ne memori la devojn de la trono havante regitojn, kiuj tre volentas anstataŭigi konsciencan al li. Oni nenie trovas tiujn atributojn pli nete kunfanditaj ol en la Romanco de Jimena Gómez, kiu pretendas rakonti, kiel la fama edzino de El Cid akiris sian renomajn edzon.

Romanco de Jimena Gómez

En Burgos la reĝo estis, kaj sidadis ĉe l’ vespermanĝ’,
kiam la Jimena Gómez al li venis por plendofar’;
portante vestojn funebrajn, kojfon el nigra tolaĵ’,
kun genuoj sur la planko ŝi komencis kun amar’:
„Sub provok’ mi vivas, reĝ’, kaj mia patrino eĉ same;
ĉiun tagon, kiu aŭroras, pasas la murdint’ de l’ patro:
kavaliro rajdanta ĉevalon, kaj kun la falko sur sia man’,
por min fari pli ĝenita paŝtas ĝin je mia birdar’;
per sang’ de l’ propraj kolomboj puncigis mia trenar’.
Donu, bona reĝ’, justecon, ne ĝin negu per ĉikaĝ’.
Reĝ’ ne agante kun justo jam ne rajtas pri la rang’.
nek ĉe l’ tablo manĝi panon, nek reĝinon ĝui ja”.
La reĝ’, kiam li aŭdis ĉi tiun, pensis tuj laŭ ĉi konstat’:
„Se mi kaptos aŭ buĉos al Cid, sin renversos la kortegar’;
sed se mi ĝin lasos sen plenum’, sekvos poste Didemand’”.
Parolis nun doña Jimena per jena notinda fraz’:
„Mi al vi sciigos, reĝ’, solvon de tiu ĉi ĝenaj’.
Retenu do la kortegojn, ne renversos iu ajn,
kaj murdinton de la patro, donu al mi por fianĉ’.
De kiu do malbon’ venis rezultos bono, iom da”.
„Mi ĉiam aŭdis laŭ onidir’, kaj ankoraŭ kredas pri ĝia prav’
ke la saĝo de la virinoj ja estas ekster ordinar’;
tie ĉi vi petas justecon, ja deziras lin por fianĉ’.
Mi do sendos leteron al Cid, mi sendos sen iu prokrast’”.
Preskaŭ antaŭ parolfino la letero iras jam;
la portinto de l’ letero estas ĝin doninta al la patro.

Dum la XVa jarcento italaj versformoj ekkonkuris kun la indiĝena, kaj en la frua XVIa ili enradikiĝis en la hispana poezio, dank’ al la laboro de Juan Boscán kaj, eĉ pli, al Garcilaso de la Vega. La suverena facilemo per kiu ĉi lasta manipulis la italajn formojn certigis ties venkon spite fortan rezistadon de pli konservativaj hispanaj poetoj, sed rilate la romanojn jam ne gravis la forlaso, ĉar la kruda forto de la romanoj antikvaj jam perdiĝis, kaj la lirikemon de la romanoj artismaj povis esprimi pli elegante, kaj sekve pli konvene, la lirikaj formoj de la italaj adeptoj. La romanoj antikvaj tamen restas la vera kaj neforigebla bazo de la hispana literaturo.

E. Hero.

La tento de Kul

JOHN FRANCIS

Tute ne atendite la Virino aperis antaŭ la ĉelo de Kul la ermito. Ŝi haltis ĉe la arbara rando, duonturnate por rigardi lian elvenon, kun krionta buŝo; sed krion ŝi ne eligis, kaj ŝia dekstra mano lasis la sagujon sur la maldekstra ŝultro ne tenante sagon. Momente ili rigardis sin reciproke antaŭ ol ŝi turnis sin kaj saltis en la densejon.

Heziteme Kul daŭrigis sian vojon al la apuda rivereto pensante pri la motivo kaj eventualoj de la vizito. Li estis maltrankvila.

Ĉerpinte akvon per ligna pelvo li reiris al la ĉelo, kie li miksis ĝin kun krude muelita faruno por baki kukojn el la pasto. Tiujn li englutis kun la restanta akvo, kaj genuinte provis preĝi; sed vane, ĉar scivolo pri la kaŭzo kaj signifo de la vizito perturbis lian penson, malhelpante la ekstazan fandiĝon de volo kaj emocio, kiu karakterizas komuniĝon kun la Eternulo.

Kial la Virino venis? Kiu sendis? Ĉu la Eternulo por elpruvi lian rezistemon? Ĉu Satano por delogi lin de la rekta vojo? Kia ŝi estis? Sovaĝa. Ĉu ŝi portis malmultan veston? Jes. Li estu singarda. Ŝi revenos. Eble baldaŭ. Eble ofte. Eble morgaŭ.

Sed la morgaŭan tagon ŝi ne revenis. Nek la postmorgaŭan. Tri tagoj pasis; ses tagoj; sed ŝi ne revenis, kaj Kul ekkredis ŝin halucinaĵo, kies daŭran maleston li fervore aklamas. Li retrovis trankvilon kaj kapablon preĝi, kaj skurĝadis sian korpon glorante la Eternulon.

La sepan tagon la Virino revenis, ĉi fojon nek

subite, nek hazarde, sed ruze kaj singarde. Ŝi spionis Kul tra la foliaro ĉe la arbarrando dum li ĉizis piajn aforismojn sur la klifa rokego apud sia ĉelo, kaj evidente ĉagreniĝis, kiam li ekvidis ŝin. Denove ŝi metis la manon al la sagujo, sed denove reprenis ĝin sensaga, kaj retirinte la vizaĝon enkuris la arbaron.

Post momenta hezito Kul faligis la ĉizilon, kaj, ne sciante kiacele, postkuris ŝin, direktante sin laŭ la frondoj skuitaj de ŝia trakuro, time anticipante renkonton, kiam fortaj tremoj sugestis ĵusan paŝon; domaĝante sian prokrastemon, kiam lia lanto trovis apenaŭ percepteblajn vibretojn por priflustris ŝian iron. La prokrastemo tamen fine venkis, ĉar la duboj, kiuj naskis ĝin, pli fortis ol la nebula desaponto, kiun kreis la nekupto. Kul reiris medite kaj malrapide al sia ĉelo, penante difini motivon kaj motivinton de lia ĉasemo, sed ju pli li meditis, des pli lia penso implikiĝis en kompleksa nodaro de necertoj kaj suspektoj.

Lia anima trankvilo denove forlasis lin, kaj retrovi ĝin estis pli malfacile ol antaŭe, ĉar nun ĝenadis scivolo, ĉu la Virino spionas ĉiam, kiam li okupiĝas ekster la ĉela ŝirmo, kaj la senĉesa lukto kontraŭ la emo gvati la arbarrandon malebligis intensan klopodadon super liaj dediĉaj taskoj. La konsciencaj riproĉoj tiel naskitaj sapeis lian volon solvi la re-starigitajn antaŭajn demandojn, kiuj sekve des pli turmentis, kaj Kul konstatis krizon.

Post tri tagoj li rezignis pri eksteraj laboroj, kaj preparis sin por persista esplorado pri la afero, konduke al mensa orientiĝo kaj kondutopravo. Etendinte sin nuda sur la malebenan rokplankon de la ĉelo, li strebadis izoligi la kernan problemon el konfuzo da demandoj, kiuj perverse ŝiradis la pensfadon en senkontinuaĵajn fasketojn. Dum horoj li kuŝis sen manĝo kaj trinko, foje grincante

la dentojn pro la intenso de siaj klopodoj ignori la disipajn flankdemandojn, kiuj insiste trudadis sin; sed ĉiu malsukceso ŝajnis malfortigi la volon, kaj postuli pli grandajn penojn por reapliko, ĝis tute subite laco ekkaresis la incitojn kaj samtempe la pensoj ekfluis konsekvence kaj serene.

Evidentis, ke necesos decidi, kiu sendis la Virinon, ĉu Satano aŭ la Eternulo, ĉar la motivo kompreneble dependas de la sendinto: ĉu Satano por delogi, aŭ la Eternulo por elprovi — aŭ, ĉu ambaŭ? Kiel fulmo la demando trafis, suflorante jeson je la nura eknasko. Kompreneble la Diablo provas delogi, kiel li provadas eterne, kaj la Eternulo permesas tion, ĉar mem li deziras elprovi sian serviston! Abortigante naskiĝontajn pensoseriojn koncerne ĉiopovon kaj la fonton de malbono, Kul ekdecidis kodon de konduto rilate la Virinon surbaze de la ĵus determinitaj motivoj.

Rezisti delogon necesas. Sed kiel? Ĉu per ignoro? Ignoro ne forpelos; kaj daŭra ĉeestado daŭre tentados. Permesi daŭran tentadon estas mem peko; sekve ignoro povas konduki nur al peko. Tial li devos elpeli ŝin, sed zorge por ne vundi. Ankaŭ vundi estus peko. Tiel Kul rezonadis, kaj rezoninte trovis relativan trankvilon.

La sekvan tagon li sidis antaŭ sia ĉelo manĝigante varion da birdoj, kiuj tute sentime sidis sur liaj ŝultroj, brakoj kaj unu eĉ sur lia fingro; ĉar ili jam tute kutimiĝis al la milda ermito, kaj trovis la ĉelan ĉirkaŭon sendanĝera kaj fekunda je kukeroj, ĉar ankaŭ la maloftegaj vizitantoj respektis la regnon de la piulo. Tamen, subite la aplombaj gastetoj are forflirtis kun alarmaj pepoj, kaj turnante la kapon Kul ekvidis la Virinon starantan nur kelkajn paŝojn for. Eksaltinte, li alkuris ŝin kun minacaj gestoj fidele al sia plano, sed anstataŭ forkuri la Virino per fulma rapido transmetis sagon el ujo en arkon, kaj kredante sin tuj pafota Kul haltis, sentime prezentante la bruston kontraŭ la morto.



„Viaj dioj estas ombroj...”

La Virino ne pafis, sed rigardis per sovaĝaj okuloj sub kuntiritaj nigraj brovoj rekte en la okulojn de Kul, daŭre celante lian bruston. Ekregis streĉa silento, kiun Kul fine rompis: „Pafu”, li invitis greklingve, distirante la veston ĉe la brusto, „mi ne timas la morton”. La Virino plistreĉis la pafarkon je lia gesto, sed ne pafis, nek respondis. Kul provis novan taktikon: „For, diablino!”, li ordonis, farante ekzorcajn gestojn, „je nomo de l' Patro, Filo kaj sankta Spirito, for! Reiru al la mastro konfesante fiaskon, ĉar nek logo nek morto venkos mian rezistemon. Mi staras sub la egido de la Plejalta, kaj mi spitas vin”.

Denove nur liaj gestoj provokis ioman reagon. La alparolito antaŭen klinetis sin, kvazaŭ por aldoni forton al la arka risorto, sed la ŝnuron ŝi ankoraŭ tenis, kaj Kul aldonis pli milde: „Kion vi volas ĉe mi, nura sentaŭga servanto de la Ĉiopova? Mi estas Paŭlo el Kibe”, li daŭrigis donante la baptonomon. „Miaj gepatroj konvertiĝis baldaŭ post mia naskiĝo, kaj zorge instrukciis min dum la junaĝo, rezulte, ke mi lasis mian hejmlandon, Paeonion, por trovi plej efikan metodon servi mian Savinton. Tiel mi atingis tiun ĉi lokon, kie mi provizore restas por adoradi la Plejaltan, kaj interpreti se eble lian volon. Kial domaĝi tion? Nur pacon mi volas; pacon proponas. Mi ne deziras al vi malbonon”. Lasinte fali la manojn li staris pasive atendente, ĝis la Virino parolis.

„La arbaron regas mi nuntempe, kaj vi riskas la morton se vi restos; ĉar ne licas, ke viro staru antaŭ mi dum mi ĉasadas. Sciuj: vi frontas pastrinon de Diana”, ŝi aldonis klarige per greka lingvo, kies regiona prononco estis tamen pli pura ol tiu de Kul la goto.

Ĉi lastan nun trafis nova eblo. Ĉu lia misio nun atingos gloran kulminon, la konverton de pagana pastrino? La okazo ja prezentas sin.

„Vi servadas ĥimeron, ho kompatinda mia fratino”, li diris milde. „Viaj dioj estas ombroj, halucinaĵoj el sovaĝa pasejo; sed nun la Vero envenas la mondon. Aŭskultu ĝin, kaj saviĝu”.

„Vi estas adepto de la nazaretano”, kvazaŭ akuzis la Virino.

„Li, kiu mortis por savi nin ambaŭ; por savi la homaron”.

„Mi scias pri via sekto. Vi nun abundas, kaj kredas vin mastroj; sed gardu vin: la arbaron regas mi nome de mia mastrino”.

„Ekzistas nur unu Dio. Li regas ĉion”.

„Gardu vin, mi avertas. Nur dutagan marŝon for al la sudo leviĝas Olimpio. Vi kredas vin potencaj, sed via Jahve nenion signifas en ĉi tiu regiono. Ĉi tie regas Zeŭso, kaj la sagoj de Diana”.

„Sed vi devas lasi tiujn mitojn, kaj agnoski la veron. Viaj dioj havas nenian efektivan ekziston, kaj taŭgas nur por la barbaroj de...”

„Barbaroj? Ha!” rikanis la grekino.

„Vi devas forlasi tiujn apokrifajn diojn”.



„For, Satano!” kriis la ermito . . .

„Neniam! La dioj de miaj patroj estas miaj dioj. La diojn, kiuj levis mian nacion al gloro mi eterne servados”.

„Sed ne licas tion fari. La beata imperiestro Teodosio dekretis kontraŭ adorado de paganaj dioj”.

„Zeŭson mi servas, ne imperiestron”.

„Ĉu Zeŭso promesas al vi paradizon? Ĉu Zeŭso oferis la propran filon por savi la homaron? Ĉu vi kredas, ke la sanktaj martiroj sin donis al la morto por kredo malpli taŭga ol la tiam oficiala?”

„Mi scias, ke Zeŭso tondras, kaj draste punas ateistojn. Mi avertas vin denove: lasu la arbaron. Mi devus mortigi vin jam nun, sed mi oferos al Diana ĉiujn miajn hodiaŭajn viktimojn, votante ankaŭ la morgaŭajn; tamen, forlasu tiun ĉi lokon, ĉar se kriinte mi renkontos vin, nenio povos savi vin de mia sago”.

Tion dirinte ŝi subite turnis sin, kaj enkuris la arbaron.

Meditante la viziton Kul sentis ioman ekzaltiĝon en si, kaj sukcesis pravigi tion per pluraj faktoj: unue, li opiniis, ke li sukcesis semi la unuajn dubetojn en la menso de la paganino; due, li nun scias sian devon; trie, frontante mortodanĝeron li povas malpli timi eventualajn spiritajn danĝerojn. Li bone sciis, ke la minaco ne estis blago; ĉar estas neevitebla devo de ĉasanta Dianpastrino mortigi iun, kiu ignoras ŝian avertan krion. Nun li sciis la devenon de la strangaj ululoj, kiujn li plurfoje aŭdis lastatempe.

Tiun vesperon li etendis sin sur sian duran kuŝejon atendente plenan ripozon, sed kvankam lia mensa trankvilo permesis tujan ekdormon, tamen li eĉ pli subite vekiĝis dum la nokta mallumo. Pluvegis ekstere, kaj tondro grumble agoniis, konfirmante la kaŭzon de lia veko.

Kul rigidiĝis pro teruro. Kion li faris? Kiel ofen-

dis la Eternulon? Ĉar jen estas nepra averto, ke koleras la Plejalta. Li pekis; lia memkontento estis senmotiva, kaj ofenda al Dio; sed kion li faris malbonan? kion devis fari? Fulmo momentis ekstere, kaj Kul haste ekgenuis dum la sekva tondroknalo por peti gvidon kaj pardonon; sed preĝi li ne povis; lia menso sendiscipline vagis eksteren en la violenton de la ŝtormo; liaj lipoj preterlasis kliŝajn preĝerojn, sed liaj pensoj fantaziis super ŝtormtaŭzita arbojmaro, kiu tapiŝis bizaran pejzaĝon kun fona montego.

Atinginte kulminon la ŝtormo grade forpasadis, sed la genuanto ankoraŭ vane penis atingi sian Mastron, konsciante lace kaj rezignacie la kreskantan abismon inter la Celo kaj la preĝoj mortantaj ĉelipe, ĝis fine li faletis flanken en maltrankvilan dormon. Kiam li vekiĝis, estis jam grize lume, kaj li ĝeme eklevis sin frotante la rigidiĝintajn muskolojn. Ne manĝinte li senhezite aliris la riveron, ĉar li jam decidis pri drasta rimedo purigi la animon, kaj trovi la veron, per punado de la karno; kaj elektinte lokon, kie la akvo profundas, li aŭdace envadis.

Estis ankoraŭ frua somero, kaj degelinta neĝo ŝveligis la fluon, farante tiun froste malvarma tiel, ke akraj doloroj kuntiris la krurajn muskolojn de la ermito, kiu tamen obstine pluenvadis ĝis la akvosupro atingis la talion. Tremegante li aliris grupon da rokoj, kiuj levis sin el la fluo, kiel nigraj dentegoj, kaj manovris la korpon en V-niĉon, kies pintoj leviĝis super la ŝaŭmanta surfaco, lasante sin grade subakviĝi ĝis nur la rokoj sub liaj akseloj malhelpis, ke la fluo forportu lin, kaj la subakva konverĝo de la V subtenis lian pezon. Angore suspirante li permesis la piedojn ekflosi kaj penis ignori la spasmajn dolorojn, kiuj torturis lian korpon, per persista aplikado de la menso al preĝo kaj meditado.

La akvo ŝaŭmis ĉirkaŭ la kapo, kaj la korpo senvole konvulsiis sub la turmenta vipado de la frido, ĝis ĉiu penso, ĉiu sento, cedis al nigra konstato pri netolerebla doloro, kaj la suferanto preskaŭ perdis konscion. Fine, tamen, la doloroj obtuziĝis, kaj la anastezita karno jam ne konstatis eĉ la premon de la subtenaj rokoj.

Nun li ekscios la veron; devas ekscii! Kial li ne povas pensi? Lia cerbo estas klara; la karno silenta. Tamen la spirito de la vero ekzistas ĉie, ĉiam. Nur necesas teni la menson preta, ĉar ĝi nepre venos. La tinta plaŭdado de la akvo nun ŝajnas pli dista: jen super la kapo; jen longe longe sube. La ŝaŭmo, kiel kremo, glitas super la ŝultroj; ankaŭ sube, sed tie nevideble. Ĉie kirliĝas ŝaŭmo; super la kapo ĝi vaporiĝas en nebulon, blankan nebulon. Sed necesas trovi la veron; koncentrigi ĉiun forton por akiri la veron. Urĝas. Nun. La okazo prezentas sin. Nun. Unike. Kapti, kapti. Pensi, strebi; ne dormi, ne revu. Kial la vero postulas tiom da peno? Sincero rajtas la veron. Facile. Demandi; aŭskulti; kom-

preni. Atingi la spiriton de la vero, kiu ŝvebas ĉiam apude... tiel!

La Spirito de la Vero manifestis sin el la blanka nebulo pendanta antaŭ liaj okuloj, distingante sin de la fono nur pro la ena lumo, kiu briligis la rozkoloran vizaĝon, ĉar la blankaj roboj fandiĝis difane kun la ĉirkaŭa nebulo.

Lace kontente Kul raŭkis:

„La Virino... ŝi estas tento?”

„Ŝi estas tento”.

„La karno? Malamiko de la spirito? La detruonto?”

„La detruonto”.

„Ekkono kondukus nur al peko?”

„Jes”.

„Ŝi estas ruza?”

„Ruza”.

La Spirito de la Vero ŝvelis ĝis monstra amplekso. Kul luktis por ne sorbiĝi en ĝin. La akvo plaŭdadis ĉe liaj oreloj.

„Ŝi ne estas pastrino de Diana?”

„Ne”.

„Sed sub tiu formo venas por detrui min?” Kul strebis ne enfali abismon, kiu oscedis malantaŭ li.

„Jes”.

„Ŝi estas... kiu ŝi fakte estas?”

„Ŝi estas Diana mem”.

Kul rekonsciigis kun sento pri ekstera varmo sed interna malvarmego. Li aŭtomate ekmovis sin al la fonto de la varmo, sed trovis, ke li povas eĉ movi la brakojn, kaj malfermante la okulojn rimarkis, ke lana kovrilo vindas lin, kaj fajrego krakadas kelkajn paŝojn for. Apud tiu sidis la Virino. Notante, ke li rekonscias, ŝi alparolis lin.

„Ĉu vi volas mortigi vin?” ŝi demandis skolde, „kuŝante en tiu rivero, kiam la frosto apenaŭ malaperis de la bordoj! Ĉu vi estas freneza?”

La vipeco en ŝia voĉo varmigis la korpon de Kul je stranga plezuro. Milde li respondis.

„Ne, mi forpelis diablojn el mia korpo trempante ĝin en la pura akvo”.

„Vi preskaŭ forpelis la vivon. Ĉu tiel vi honoras vian Dion? Per sinofero?”

„Ho ne, estas peke detrui la verkon de Dio. Mi tre dankas, ke vi savis min de memmortigo, kvankam tio estus senintenco. Mi... mi perdis konscion”, klarigis Kul baraktante feble por liberigi sin de la strikte vindita kovrilo. „Kio estas via nomo?”

„Esteza”, respondis la Virino malvolvante la kovrilon.

Kun honto Kul konstatis, ke li estas nuda, kaj provis rekovri sin almenaŭ parte, sed la Virino jam eklevis lian gracilan korpon en fortikaj brakoj por porti lin al la fajro. Nudo tiŝis nudon; karno karnon; Kul flaris la ŝviton de la ino, sentis ondantan mamon sub ŝia flanko, kaj kun subita naŭzo kontraŭ frido kaj aŭstero, ekkroĉis sin al ŝia korpo: al la volupto de la virino, al varmo kaj vivo, avide kisante ŝian kurban kolon, suĉante-mordante

la salan karnon, kiu ektikis je emocio; ĉar nun la Virino falinte surgenuen reciprokis lian furiozon per gapanta buŝo, per stringaj brakoj kaj gladantaj manoj — ĝis ŝia kubuto hazarde ektuŝis simbolon de perforto, detruonton de ŝia voto, kaj ŝi resaltis kun krieto.

Kul sterniĝis ĉagrenite dummomente ankoraŭ sub la pelo de volupto. Li ekrigardis la Virinon, kiu staris kun stranga esprimo: esprimo tenera kaj tamen timema. La vivo kvazaŭ retretis de li, kaj devo kaj aŭstero regajnis sian pozicion forpelante deziron el la koro de Kul per la frida konstato, ke li falis, falegis en la marĉon de lascivo. La katastrofa amplekso de lia peko trafegis lin, kaj li klinis la kapon al la kovrilo, kiun li jam altiris al si por kaŝi sian nudon.

„Ho Dio, Dio, Dio.” li singultis, „kiel mi kapablis tiel agi? Kiel, avertite, mi povis kun tioma volonto cedegi al la karno? Kompatu, kaj klarigu! Mi fariĝis besto, kaj ne estis ago mia, kiu savis min de la fina honto”. Li ekpaŭzis, kaj rigardis la Virinon, tamenevitante ŝiajn okulojn.

„Ho, diablino, kial vi ne plene ekspluatatis vian iniciativon?” li demandis. „Ĉu amuzas vin, ke mian restantan puron mi ŝuldas al la volo de paganino? Ĉu mi estas fakte malpli kulpa pro tio?”

„Incito venis neatendite, kaj finfine ni ne...” ekkonsolis la Virino rigardante la teron.

„For, Satano!” kriis la ermito. „For, ruzaj kaj facilaj vortoj! Ĉu mi ne scias la situacion? Ĉu mi ne dediĉis min al la servo de Dio armante min kontraŭ ĉiaj tentoj? Kaj jen: la unuan fojon kiam tento frontas — jen mi: sentaŭga, aĉa, mizera perfidanto de mia Mastro! — jen mi, kiu vante kaj fiere promesis pian kaj senmakulan servadon al la Savinto de Homaro, ĵus salivinta super virino kun malplia volforto ol kopulanta hundo! Iru do! Diru al via mastro, ke vi sukcesis faligi mizeran, sentaŭgan ermiton; sed diru ankaŭ, ke la spiriton li neniam posedos; ĉar nun mi pentofaros, invitos ĉiujn punojn, skurĝados mian karnon por kvietigi la justan koleron de la Plejalta. Jen via sola venko: vi devigis min suferi por akiri gracon! Iru! For! Mi devos pacigi mian patronon”.

„Kaj mi mian”, respondis Esteza, pastrino de Diana.

Dum la sekvaj tagoj la korpo de Kul ŝrumpis ĝis kadavra osteco sub la rigoroj per kiuj li afliktis ĝin, sed tiuj povis nek egali, nek kvietigi la turmentojn de lia animo; ĉar kvankam li kredis je la kompatemo de Dio indulgi lin post liaj sinceraj manifestoj pri pento, tamen li sciis, ke nun la situacio postulas nepran kaj pozitivan agadon. Nebblas pasivi ĉi tie apud minacanta tento. Li devos aŭ forigi ĝin, aŭ fuĝi ĝin.

La lasta alternativo ŝajnis unuapense malinda por piulo, sed eĉ pli malindus resti en la regiono de pagana pastrino ne provante konverti ŝin; tamen Kul ne povis forgesi, kiel la kolera averto de Dio

respondis lian antaŭan projekton tian, kaj preskaŭ jam decidis eligi sin el la dilemo per fuĝo, kiam nova cirkonstanco prezentis sin, aliigante lian decidon. Li ricevis averton.

Dum multjara restado en la ermitejo Kul renkontis malmultegajn vizitantojn pro la denso de la arbaro kaj la malproksimo de homaj loĝejoj, sed oni ja sciis pri lia ekzisto, kaj la nunajn avertantojn, du kamparanojn el apudarbara vilaĝo, li jam renkontis. Ili estis kristanoj, kaj alte estimis la ermiton.

Post salutoj la pli aĝa klarigis, ke ili venis por konsili Kul fuĝi. „Ĉar, ho sankta viro, la flavuloj reinvasas, kaj ĉifoje neniu povas kontraŭstari ilin. Ĉiuj fuĝas suden antaŭ ili. Ankaŭ ni faros; ankaŭ vi devos”.

Kul komprenis, kredeble pli bone ol la parolinto, la dezirindon fuĝi la „flavulojn”, ĉar dum la vivo de lia avo la Gotoj translokiĝis de ilia hejmo apud la Danubo en la imperion per eviti ĝuste tiujn samajn invadintojn, la hunojn. Lia avo ne sekvis la ceterajn, sed migris suden en Paeonion, kie la patro de Kul naskiĝis kaj konvertiĝis. Tiu decido de la avo de Kul certigis pacon por la familio, kiam la aliaj gotoj ribelis pro manko de vivrimedoj en la imperio, kaj tre verŝajne ankaŭ certigis la kristaniĝon de Kul. Li tiel decidis, ke ankaŭ li ne fuĝos, sed restos ĉi tie, fidante al Dio haltigi la barbaron dum li mem klopodos konverti la paganinon, rezonante, ke cetere la celo konverti ne povas esti



„Nur la karno restas ...”

alia ol bona; nur troa memkontento kaj necerto pri plano kun rezulta prokrastemo kaj ties sekvoj povas esti danĝeraj. La solvo al liaj problemoj subite montris sin evidenta, kiel neeviteblan devon.

„Verdiktu Vi, do, ho Plejalta! li preĝis. „Se mia konduto pravos, mi plene venku je via nomo! Se ne, akceptu mian spiriton, kaj ho indulgu mian stulton, netaŭgan servi vin”.

Lia decido alportis al li ioman trankvilon, kaj tiel preĝinte li atendis pacience sen manĝo kaj kun malmulta trinko, pretigante la animon por tre ebla eventualo. Fine la sono, kiun li atendis, atingis lian orelon, kaj preninte la lignan krucifikson, kiu staris apud lia kuŝejo, li eniris la sunlumon kaj ŝanceliĝis ĝis la arbara rando, kie li paŭzis aŭskultante.

Denove la ululo de la ĉasanta virgulino eksonis, kaj Kul celkuris ĝin, puŝante la malhelpajn frondojn per skeleta brako. La tero nun deklivis, kaj li plurfoje stumblis, sed persiste levis sin kaj devigis siajn tremantajn krurojn porti lin pluen. Post iom da tempo li denove paŭzis anhelante por direkti sin laŭ nova krio. Tio ne venis, sed li opiniis aŭdi kraketon de frondoj iom dekstre, kaj turnis sin tien, irante pli singarde por ne perdi la sonon, ĝis li venis al spaco inter la arboj. La sono venis de la kontraŭa flanko de tiu, kaj subite la Virino elsaltis el la ŝirmantaj arboj ululante. Samtempe Kul enkuris la spacon tenante antaŭ si la prazeŭsan simbolon de honoro, nun relevitan el la honto de jarcentoj, kaj kriis:

„Min ŝirmas ĉi kruco, egido de paco.. Agnosku ĝin, akceptu la veron, kaj ĝuu la pacon, kiu envenas...”

La Virino haltis, kaj rigardis lin surprizite, kiel ŝi faris je la unua renkonto, sed apenaŭ percepteblis la paŭzeto de miro, ĉar jam la dekstra mano transinte la bruston kun saluta rapido, resvinge portis sagon al la levita pafarko, kaj kun sama flua movo ekstreĉis la ŝnuron. Kun la facila kontinuo de longa ekzercado la pafonto samtempe vertikalis la arkon kaj disigis la piedojn; kaj, streĉinte la ŝnuron ĝis sia dekstra brusto, momente celis, kaj pafis.

Kun aŭdebla frapo la sago trafis kaj penetris la dekstran riparon de Kul, sternante lin sur la herbo, kiun li plukadis konvulsie, anhelante gargare kontraŭ la sango bobelanta en la gorĝo. Dume la Virino eniĉis la ankoraŭ vibrantan ŝnuron en novan sagon, kaj atendis senemocie ĝis ŝia baraktanta viktimo momente prezentis la bruston. Denove ŝi pafis; la siblanta sago trapikis sub la ripojn, kaj Kul eksaltis kun raŭka ĝemo antaŭ ol fali survizaĝen kun la mortaj membroj tremantaj.

La Virino paŝis al la kadavro, kaj staris longe rigardante ĝin. Poste ŝi levis la okulojn al la ĉielo.

„Atestu, dioj: la ombron de la herezulo mi sendis en la submondon fidele al mia voto. Nur la karno restas”, ŝi diris senespere.

H. Heine

Donna Klara

En ĝarden' vespera vagas
La alkald-filino, sola.
De l' kastelo tamburado
Bruas kun trumpet' sonora.

„Ah, min tedas jam la dancoj,
Amindumo galantmora,
Kavaliroj komparantaj
Flate min al suno glora.

Ĉio tedas min, de kiam
Kavaliro sub balkono
Al fenestr' en luna nokto
Logis min per liutsono.

Ho, li staris brave, sveltel
La okuloj sub la nobla,
Pala frunto fajre sagis:
Sankta Georg' en korpo propra!”

En ĉi pensoj Donna Klara
Nun okul-malleve dronas.
Okulleve — jen la belan
Nekonaton ŝi rekonas.

Ili iras en lunlumo
Kun manpremoj, flustroj dolĉaj.
La zefir' afable flatas,
Klinsalutas rozoj sorĉaj,

Klinsalutas rozoj sorĉaj,
Ardas kvazaŭ ampoŝ-porte. —
Sed, amata, diru, kial
Vi ruĝiĝis tiel forte?

„Kuloj pikis min, amata,
Kaj somere ĉi sangsorbajn
Mi malamas kiel judojn,
La longnazajn, la fikorpajn.”

Lasu kulojn kaj la judojn,
Li rediras karesloge.
De l' blankfloraj migdalarboj
Mil petaloj falas floke.

Mil petaloj falas floke,
Verŝas dolĉon de odoro. —
Sed, amata, diru, ĉu vi
Amas min el tuta koro?

„Jes, mi amas vin, mi juras
Je l' Savinto dornokrona,
Kiun la damnindaj judoj
Murdis kun insid' fripona.”

Lasu judojn kaj Savinton,
Li rediras karestone.
Blanke, en sonĝbrila lumo
Lulas sin lilioj fone.

Lulas sin lilioj fone,
Stelojn miras laktovoje. —
Sed, amata, diru, ĉu ne
False ĵuris vi ĉi-foje?

„Fals' ne estas en mi, kara,
Kiel nek eĉ unu sola
Guto el la sang' de maŭroj,
Aŭ de l' juda ras' fetora.”

Lasu maŭrojn kaj la judojn,
Li rediras karesloge,
Kaj al mirta laŭbo milde
Li kondukas ŝin kaŝloke.

Per la retoj de la amo
Li ŝin ĉirkaŭplektas mole.
Kurtaj vortoj, longaj kisoj,
Koroj transversiĝas bole.

Nupton kantas dolĉfandiĝe
Najtingal' el gaja gorĝo.
En la herb' lampiroj saltas
Kvazaŭ por la danc' de torĉo.

Pli kaj pli la laŭb' silentas.
Oni, sub la ombroj noktaj
Aŭdas nur, ke spiras floroj,
Interflustras mirtoj doktaj.

Sed nun de l' kastel' tamburoj
Bruas kaj trumpetoj voĉas.
Revekite Donna Klara
El brakumo sin dekreĉas.

„Jen, min oni vokas, kara,
Sed, mi petas, forironte,
Diru vian nomon karan,
Sekretitan tiel longe.

Kaj la kavalir' serene
Kisas fingrojn de la donna,
Kaj la lipojn kaj la frunton,
Fine diras li, responda:

Mi, sennora, via amato,
Estas fil' de l' grandioza,
Fama sciencul-rabeno,
Izrael de Saragossa.

el la germana: **K. Kalocsay**

Miniaturoj

Internacia juro

La internacia juro
estas sistem' de sekuro,
kies validoj tuj ĉesas,
kiam apliko necesas.

Esperanto parolata

Mia pordo kun pompo
portas ŝildon sen trompo:
Tie ĉi Esperanto parolata!
Dum jarcenta kvarono
venis unu persono
kun demando al tiu rilata.

Mi klarigis kaj montris,
ĝis la homo respondis:
„Ĉar mi nun vin atingis,
Do you also speak English?”

Persisto

Mia filo subite
en aĝo sepjara
komencas rapide
en vic' senerara
ciferojn aranĝi decide.

Ĉe mil ducent kaj kvin
mi diras: Ĉu laca?
Grumbas li kun obstino:
Lasu min paca!
Mi skribos ĝis venos la fino!

Utila ĉirkaŭvojo

Parolo senpera
el koro sincera
devigas min levi la ĉapon.
Sed pli mi admiras,
se l' vortoj trairas
survoje al buŝo la kapon.

Troa takso

Iu petis min fari refrene
parodion pri dancteksta sterko.
Mi publicis — kaj trovis ĉagrene:
Oni taksas ĝin mia ĉefverko!

Poul Thorsen

Johann Martin Schleyer

Aŭtoro de Volapük

La kvereloj inter esperantistoj kaj volapükanoj apartenas nun al la pasinteco. La „fuŝa romana dialekto“ Esp. montriĝis taŭga lingvo supera al Volapük nun tute senviva kaj ni povas nun agnoski, kiel nia Majstro jam en 1908, la genion de Schleyer kaj la grandecon de lia verko: „En Germanujo, nur dank' al la ne forgesbla granda merito de Schleyer, nia ideo ricevis sian unuan disvolviĝon kaj la unuan puŝon antaŭen.“

Neniam kontraŭbatalis la Majstroj, sed nur fanatikaj anoj. Grandioza atesto pri tio estas la letero de Schleyer al amiko: „Mi volis akceptigi ne mian Volapük, sed tute ĝenerale la ideon de mondlingvo. Se iam pereos mia sistemo, ĝiaj anoj aliĝu al sistemo pli bona aŭ sukcesa!“ Jen lia testamento tiel simila al la Zamenhofa modesteco.

Lia Vivo

La 18an de julio 1831 en Oberlaŭda (proksime al Würzburg) naskiĝis la unua el tri gefiloj al instruisto Johann Philipp Schleyer. Dekunujara la eta Martin ricevis lecionojn ĉe sia onklo en proksima Königsheim en la latina kaj muziko. Poste li kapablis ludi dek ses instrumentojn. Post la gimnazia tempo li studis teologion kaj filozofion en Freiburg gajnante la monon per orgenludo. Katolika pastro li iĝis en 1856 kaj estis sendita vikario al Baden-Baden. Tie, ĉe kolektejo de diversaj nacioj, li komencas lerni lingvojn svedan, rusan, gotan, ĉinan kaj rumanan unu post la alia. Li konfesis, ke li sin okupis dum sia vivo pri 88 diversaj lingvoj kaj dialektoj. En 22 el ili li verkis.

Nun li estis pastro en kelkaj vilaĝoj apud la Lago Konstanca, malproksime de la hejma tero. Kuraĝa ago dum la Bismarcka kulturbatalo al li havigis kvarmonatan malliberon. Grupo de Prakatolikoj sin estis apartiginta de l' papismo kaj dum enterigo de tia prakatoliko, Schleyer ĉirkaŭis la sonorilan frapilon per ŝtrumpoj por ke la sonoriloj ne povu aŭdiĝi. En fortikaĵo Rastatt li lasis kreski barbon, kiun li konservis sian tutan vivon kiel memorajon.

Post tiu epizodo sekvas la plej feliĉa kaj bela parto de lia vivo en la urbeto Litzelstetten ĉe Konstanz, kien li transloĝis en 1875. Idilia kaj pitoreska loko konvena al poeta animo, vido al la bela lago kaj freŝaj arbaroj. Kaj la pastraj devoj lasis tempon al verkado kaj pensado. Neniam plu dum tiu tempo lin lasis la penso pri mondlingvo. Dum unu-du jaroj li formis sian Volapük, unue nomitan „Pantiglossia“, kio estas la greka traduko. Li publikigis ĝin en 1879 kaj tuj sendis ĝin al la filozofiaj fakultatoj de ĉiuj eŭropaj universitatoj. Oni povas

aserti, ke entuziasma estis la akcepto. La popular-eco de Schleyer kaŭzis, ke la projekto eniris ĉiujn klasojn de la popolo. Estiĝis vera popolmovado. Amasaj kursoj. Kongresoj en Friedrichshafen (1884) kaj Munkeno (1887). En aŭgusto 1887 partoprenis delegitoj el 30 ŝtatoj. Laŭ la protokolo oni konstatis milionon da anoj, 300 klubojn, 1600 ekzamenitajn instruistojn.

Sed jam minacas la pereco, ne per ĵus naskita Esperanto, male ĝia ĝermo kuŝas en la lingvo mem. La aŭtoro aperigis sian lingvon ne matura aŭ kompleta jam post paso de unu-du jaroj, dum ke en la zamenhofa menso la mondlingva ideo fermentis preskaŭ 20 jarojn. Schleyer intencis, tuj fondi akademion de volapük, sed ja pruviĝis vera la opinio de Zamenhof: Kiel poemon ankaŭ lingvon ne povas verki komitato. Ĉar nun ĉiu volapükano tuj proponis plibonigon ja ofte rajtigitan, kaj, laŭ germana proverbo, multaj kuiristoj fuŝis la kaĉon. Mankis la normo, kiu estis por Esperanto la Zamenhofa stilo. En aŭgusto 1889 la volapük-kongreso montris la nehaltigeblan disfalon de tiu lingvo. Tamen Schleyer senlace provis plu savi ĉion sav-eban. Sed la manko je financaj rimedoj malhelpis la aperon de nova gramatiko, nova reordigo de la lingvo kaj movado.

Schleyer estis transloĝinta al Konstanz en 1893 post sia rezigno pri la pastra ofico. Poste donacis liaj amikoj modestan dometon en la Schottenstrato 3, kie li pasigis sian viv-vesperon. Eĉ nun ne ripozis lia senlaca menso. Estas ja ero de la ŝvaba animo okupiĝi kaj pensi pri ĉio. Li dediĉis sin al siaj ŝatokupoj astronomio kaj medicino kaj trovis tre atentindan muzikan leĝon. Li proponis novajn plibonigitajn notskribon kaj blindul-alfabeton.

Granda ĝojo estis por li, kiam en 1894 Papo Leo XIII lin eknomis Papa Sekreta Ĉambelano. Estis la 16a de aŭgusto 1912a kiam la morto forprenis la plumon el la diligenta mano.

Ĉiuj seniluziigoj ne povis senigi lin de la kredo al la venko de liaj ideoj. En la tombon li kunprenis ĝin. Kaj li pravis. Hodiaŭ la Esperanta lingvo atestas pri Schleyer same kiel pri ĉiu alia pioniro kaj nia fiera movado ĉiam rememoru, ke sen li ĝi ne estus povinta ĵeti siajn semojn en grundon jam plugebligitan iomete. Ni ekzemple ne forgesu, ke la unua grava Esp-organizo Nürnberg kun la „Esperantisto“ estis la Volapükklubo konvertiĝinta al Esperanto.

La Lingvo

Estas multaj paraleloj kun Esp pruvantaj ke alia solvo ne eblas. Volapük havas la samajn son-

ojn, krome ä, ö, ü, c (= ĉ), j (= ĵ), q (= ĥ), y (= ĵ), x (= ks), z (= c). La akcento estas sur la lasta silabo. Artikoloj ne ekzistas. La demanda vorto li- respondas al ĉu, la vorteto no al ne. La verbajn tempojn oni indikis per antaŭigataj vokaloj: älab-: havis; elab-, ilab-: estas, estis havinta; olab- havos ktp. Deklinacion oni faris per vola - de la mondo, vole - al la mondo, volí - la mondon. Pro tio necesis, ke ĉiuj vortradikoj nek komenciĝis nek finiĝis per vokalo. Schleyer ofte devis kripligi la vortojn ĝis kompleta nekoneblo: nim-animalo, niver-universitato, spod-korespondo.

Do jen la esenca diferenco: Dum ke Zamenhof alcelis plej fortan similecon kun la ekzistantaj okcidentaj lingvoj, Schleyer serĉas mallongecon, metodecon, kvazaŭ stenografian lingvon. Plej volonte li havis trilitrajn vortojn kaj tial li multfoje devis, por eviti samajn radikojn, elekti ilin el tute nekonataj lingvoj aŭ eĉ tute arbitre kiel la numeralojn ekzemple, kio tre malfaciligas ilian memoriĝadon.

Tamen kie vere necesus metodeco kaj konsekvenco, ĝi mankas. Oni ne konas afiksojn kun precize difinitaj signifoj. Ja estas centoj da ili, sed nur por uzo de l' aŭtoro, kiu arbitre ilin aplikas ĉe la kreo de nova vorto. Oni povas diri, ke la sistemo de vortfarado, kiu tiel helpas la esperantiston, ne estis evoluinta en Volapük.

Same nenecese estis, kiel Esp. montris, ke la verboj indiku la personon. Kaj pli da detaloj:

-S signifas pluralo, adjektivo finiĝas per -ik kaj adverboj per -(ik)o. Aldono de -um signifas komparativo, de -ün superlativo, de -öv verba kondiĉa modo. Verbo komenciĝanta per p- signifas pasivo. Kaj mallonga teksto:

Menade bal püki bal

Sis yels teltum tikäl menik
steifom püki kel kanom
palenadön e pagebön fa nets
valik demü nefikul oka.

Melak lölik bevü nets difik
Liö vemo panefikulomöv, if
pük sibinom-la, keli aním,
nen sesum, kanom lenadön
nes mütön vitimön mödi tima.

Al unu homaro unu lingvon
Ekde ducent jaroj la spirito homa
aspiras lingvon kiu povas
esti lernata kaj uzata de nacioj
ĉiuj pro la facileco de si.

La trafiko tuta inter nacioj diversaj
kiel multe estus faciligata, se
lingvo ekzistus, kiun ĉiu,
sen escepto, povas lerni
sen devi oferi multon da tempo.

Pietro Bisvan

FENIKSO

Marjorie Boulton

La okuloj de la astronomo ruĝis kaj doloris. Dum longa juvelita nokto li staris ĉe la teleskopo aŭ skribis en notlibro, faris etajn krucojn sur grafikaĵoj, komparis diagramojn. Li estis laca.

„Mi bezonas bonan tagplenon da dormo.” li diris. „Sed, unue, legi miajn leterojn kaj la matenan ĵurnalon.”

Li iris al sia skribotablo.

Miloj kaj miloj da astroj; milionoj da kilometroj; lumjaroj; orbitoj kaj sistemoj; temperaturoj kiuj vaporigas feron kaj solidigas nitrogenon; aliaj gravitoj, lafaj montoj, amoniakaj maroj; glacirokoj kaj drivanta polvo; vasta matematiko de longaj nulovicoj; ekkompreneti tiun lumtremantan vualon el nigra veluro, gembrodita, tra kiu aerolitoj ofte trenas longajn lumfadenojn; la konoj kiuj ĉiam kreskigas nian respekton al la kosma mistero; tio estis la vivo de la astronomo. Lumo; lumjaroj; kaj mondoj kiuj pro la nulovicaĵoj distancoj ŝajnas manoplenoj da brilega polvo ŝutitaj sur la vualon.

Nun la okuloj de la astronomo, tiel longe fokusiĝitaj sur lumjarmile foraj steloj, fokusiĝis sur paperpecoj, ĉe la skribotablo en la studĉambro. Li revenis al la planedo Tero.

Naŭzo kaj tremetoj maltrankviligis tiun eĉ pli malgrandan teron kiu estis lia korpo, tiun etetan sateliton, ligitan per gravito al la surfaco de planedo.

La leteroj ne tre urĝis, kaj li metis ilin sub sian paperpremlon. La paperpremlilo estas peco da fero: aerolito malgranda. La plimulto de la fera maso forvaporigis en la flugo antaŭ ol la aerolito trafis la teron. La objekto ne havis estetikan belon, sed ĝi plaĉis al la astronomo pro la profesia intereso kaj pro la mistero. Ĝi estis peceto de mortinta stelo, kiu traflugis grandajn vakuecojn kaj, esceptaĵo inter la matematikaj probabloj, renkontis alian stelon sufiĉe frue por ne tute elvaporigi.

La astronomo prenis la matenan ĵurnalon. Grandegaj majuskloj hurlis nervŝire.

Aŭtentikaj fotoĵoj de murdistoj kiuj portis man-

katenojn kaj generaloj kiuj portis brilajn ordenojn konkure postulis atenton. Ribeluloj, rifuĝintoj, protestaj procesioj, procesoj kun konfesoj, la konfesoj de kulpuloj kies vangoj estis kavaj kaj kies manoj senĉese tremetadis; filmstelinoj kun plane-daj mamoj, sennaciecaj perdituloj sen pasportoj, tiuj astretoj sen normala gravito; karikaturo sur kiu fumofungo kreskis en trietaĝa ŝpruco; fierigaj, konsolaj statistikoj pri tankoj, kanonoj, aviadiloj, atombomboj, hidrogenbomboj, kobaltbomboj; la lastmodaj aktualaĵoj de Dior kaj Schiaparelli (ŝikaj virinoj portos malpli longajn jupejn ĉi-jare; la harnodo eksmodiĝas kaj la lernejnaba bukloro iĝas lastmoda; drakosango estos la nova koloro por unglako); la plej lastmodaj aktualaĵoj de la laboratorioj (ĉiu ŝika registaro nun havas stokon da hidrogenbomboj; la senskalpa harstilo baldaŭ estos laŭmoda, ĉiuj modkonsciaj virinoj portos sterilecon sub la jupe kaj la lastmodaj jupeoj mem estos faritaj el forvezikiĝinta haŭto; homsango estos la lastmoda kolorilo por la manoj de la ministraj moŝtoj); epizodoj sur landlimoj kiuj perturbas multajn nervsistemojn kaj pro kiuj pluraj nervsistemoj ne plu funkcias; la astronomo legis la ĵurnalon kaj sentis tordiĝantan vermonodon sub la stomako.

Diplomatoj flugis tien kaj reen, ridetis por la fotoĝrafioj, frazis kave. Komentistoj serĉis signifon en la frazoj kaj represigis malnovajn mapojn kun novaj simboloj kaj novaj longiĝantaj, kurbaj sagoj. La edzino de fervojisto ĵus naskis kvaropon. Belegaj infanoj, ĉiuj kvar estis knabetoj. Oni vokis la knabojn naskitajn antaŭ dekok jaroj al la flago. Sed faru longtempan kontrakton kun la armeo por interesa, aventuroplena vivo. Ni havas la interesajn novajn armilojn. Flegistino riskis la vivon por savi akuŝantinon dum incendio en la hospitalo. La patrino kaj la bebo bone fartas. Niaj novaj tankoj montras grandegan teknikan progreson. Ili tiom deziris infanon, ke la edzino defiis kuracistojn kaj vetludis pri la vivo por naski. Tri kuracistoj avertis pri la danĝero de stroncio — 90 en la atmosfero. Deksesjarulino petis permeson edziniĝi: ni tiom amas unu la alian. Ni ne cedos eĉ centimetron de nia sankta teritorio. Mil cent dek kvar homoj proponis hejmon al la hundido trovita en la trajno. Ni devos esti fortegaj por defendi la pacon. Radioaktiva pluvo falis sur Pacifika insulo. Sciencisto forkuris orienten. Dancistino forkuris okcidenten.

La astronomo karesis la aeroliton, solidan objekton kiu jam forvaporigis laŭ la ordonoj de la sorto. Ĝi restos, li pensis. La aerolito, la rifuĝinto el alia sistemo, estis konsole solida, difinita objekto en timige disvaporigema mondo. La astronomo vespiris kaj ŝaltis la radioaparaton.

Sloganoj, generaloj, ĝeneraligoj, konfliktoj, debatoj, voĉdonoj, li denove vizitis la ĉefministron, la ambasadoro refluĝis al la ĉefurbo, ni ne cedos unu centimetron, ni defendos niajn rajtojn, la kvar

grandaj potencoj, la malgrandaj potencoj, la senpotencaj amasoj, nova provo pri la hidrogenbombo, tre interesaj rezultoj, stroncio — 90, uranio — 235, tre interesaj numeroj, la tiraneco de la bolŝevikoj, la militemo de la kapitalistoj, imperiismo, opresado, cenzurado, ŝtatperfido, spionado, la urbo estas kaptita per sturmo kaj oni portos malpli longajn jupejn ĉi-jare; ekspozicio pri novaj aviadiloj por varbi promesplenajn junulojn al la aerarmeoj; epidemio de poliomjelito la Ministerio de Publika Sano diras sterileco pro laboro inter radioaktivaj substancoj la Papo diras dudekmil novaj rifuĝintoj multaj vunditaj la Ruĝa Kruco diras striko inter la fervojistoj la Ministerio de Trafiko faras anoncon stroncio — 90 uranio — 235 hidrogeno kobalto ni ne cedos unu centimetron prestiĝo akuŝhospitalo tri grimpantoj mortis proksime al la pinto kaj jen la futbolrezultoj.

La astronomo malŝaltis kaj rerigardis la ĵurnalon. Li bezonis dormon, eĉ urĝe. Amaso da bildoj kaj konceptoj haosis en la kapo, pri mondo kiu havis ĉion por feliĉiĝi, sed ŝajne ne havis la saĝon por permesi al si feliĉon. Kio okazos finfine? li diris. Ni jam revas pri kolonioj sur aliaj planedoj kaj ne kapablas toleri unu la alian sur tiu ĉi bela, nature vivsubtenema planedo. Marso tradicie simbolas militon; tamen sur Marso troviĝas, eble ia verdaĵo, sed ne homoj.

„Mi enlitiĝos,” la astronomo diris. „Eble la mondo aspektos pli feliĉa kiam mia cerbo estas freŝe vigla.”

Sed, por konvinki sin pri solideco, li tenis la malgrandan aeroliton sur la manplato, kaj sentis kiel la centro de la tero allogas la premantan pezajon. La pezo estis iel konsola, kuraĝiga.

„Ĉiu rifuĝinto povus rakonti historion,” la astronomo pensis, kaj remetis la aeroliton sur la leterojn; sed li daŭre fiksrigardis ĝin, pro la inerteco de granda laco; la malgranda objekto komencis iom hipnotigi lin; ĝiaj konturoj iĝis maldifinitaj antaŭ la dolorantaj okuloj. Lia kapo ekzumis kaj la aerolito iĝis tremanta planedo, mondo en alia sistemo.

Al la astronomo, ĝi rakontis historion.

„Tie, kie nun nigras absolute vaka spaco, kie nek gasoj kirliĝas nek roko pendas sur gravitoretu, iam estis planedo, planedo kun tero kaj maro, poste kun vivantaj estaĵoj en la maro, poste kun vivantaj estaĵoj en la maro kaj sur la tero. Sur tiu planedo, kiun vi neniam vidis per teleskopo, troviĝis montoj kiuj lumis purpurete sub la radioj de la stelo, kiu estis la granda centro de tiu sistemo. Glaciriveroj malrapide fluis. Vivantaj estaĵoj spiris atmosferon malpli densan ol tiu de la tero, kun multe malpli da oksigeno. La gravitotiro estis malforta sur la malgranda planedo, kaj ĉiuj vivantaj estaĵoj havis piedetojn kun suĉteniloj. La plantoj marŝis serĉante la plej varmajn lokojn. La lumo estis tre forta pro la glacio kaj la neĝo. Ĉiuj vivan-

taj estaĵoj kiuj havis okulojn havis tre dikajn palpebrojn duoblajn; la travideblaj palpebroj kovris la okulojn ĉiam escepte dum la noktoj, kiam nur la astroj, inkluzive la Tero, estis videblaj, kaj la aliaj palpebroj ripozigis la okulojn.

La plej inteligentaj bestoj sur tiu planedo estis la *rjuiaoj*; ili estis kovritaj per mallonga, densega ora felo, kiu brilis sub la forta respegulita lumo. La pensa aparato estis en la plej malsupra parto de la korpo, pro sekureco kontraŭ neĝstormoj kaj hajlo.

Ĉio malsimilas al la plantaro kaj bestaro de la Tero; eble kosmaj memoroj malofte ĵetas detaleton de tiu planedo en vian menson dum sonĝo; sed teraj vortoj ne ekzistas por klarigi al vi la plimulton de tiuj detaloj. Lumo, koloroj, sonoj, substancoj, samis; sed ĉiuj kunmetaĵoj malsamis. Vi scias ke, laŭ la atestoj de la spektroskopo, la samaj elementoj, aŭ pluraj el ili, troviĝas ĉie... Sed alie, ĉio malsamis al la Tero.

Ĉu feliĉo povis ekzisti sur tiu planedo? Ĉar la spektroskopo ne povas trovi feliĉon. Jes; feliĉo povis ekzisti sur tiu planedo. La *rjuiaoj* kapablis elekti unu la alian kiel kunulojn, admiri unu la alian kaj zorgi unu pri alia. Laŭ la difinaj vortoj de la tero, Amo ekzistis inter ili; kaj familioj; kaj grupoj; kaj kiam ili pli evoluis, la grupoj grandiĝis. *Rjuiaoj* luktis kune, kontraŭ malvarmo, kontraŭ ŝtormoj; ili dresis plantojn por ke ili restu en bonaj lokoj; ili ebenigis montojn kaj trovis mineralojn en la grundo. Ili beligis sin per ametistoj kaj smeraldoj. Ili komencis regi la aliajn bestojn; kaj la aliaj bestoj iĝis pli grandaj, pli belaj, pli fertilaj.

Ili vidis similecojn inter kvarco kaj glacio kaj la okulaj lensoj de amata *rjuiano*; kaj alia provis rekrei la trajtojn de sia morta patrino sur roko. La arto naskiĝis.

Jarmiloj, kaj jarmiloj. Semi, konstrui, porti, komuniki, ariĝi.

Ĉu do malfeliĉo ekzistis sur tiu planedo, inter belaj, lertaj, fortaj bestoj kiuj tiom kapablas feliĉi kaj venki la naturon?

Jes, ankaŭ malfeliĉo povis ekzisti. La plimulto da *rjuiaoj* havis bonajn intencojn kaj nur eraris kelkfoje pro malforteco aŭ miskompreno; sed ĉiam kelkaj perceptis ke la plej rapida vojo al ĝuado estis forpreni la laborfruktojn de aliaj. Envio ekzistis inter ili; malpacienco kaj, tial, malamo.

Ili povis kvereli; ili provis distiri unu la alian per suĉiloj; poste ili lernis kiel ĵeti rokpecojn. Akraj glacipecoj... kaj poste ili trovis feron.

Ili ekregis fajron kaj kreis la domon, la hejmon. Ili poste eksciis ke fajro povas mortigi.

Jarmiloj kaj jarmiloj. Ariĝi pli strikte, venki distancojn, krei multajn belajn, komplikajn ilojn. Jarmiloj kaj jarmiloj.

Truante la teron por elpreni trezorojn, ili trovis multajn novajn substancojn. Sed en la truoj el kiuj ili prenis novajn substancojn, ili ne demetis

envion, malpaciencon kaj malamon.

Iam mi estis peco de stelo; kaj nur la silentaj steloj, sen vivaj estaĵoj kaj sen scio, estis la alrigardantoj senkonsciaj kiam la bela, riĉa, vivsubtenema planedo malaperis.

La *rjuiaoj* havis ĉion: amon, amikecon, hejmojn, ilojn, artojn, metiojn, lumon, atmosferon, akvon, plantojn, bestojn. Milmiloj da aliaj steloj havis nur gasojn aŭ rokojn. Sed ili brilis kaj beligis la noktojn, la diversajn noktojn de la diversaj ĉefsteloj.

La *rjuiaoj* havis senfinan variecon, kaj trovis novajn, strangajn substancojn; kaj komprenis kiel ili povos esprimi malamon plenplene, dum ili ankoraŭ, mallerte kaj vespirante pro la maladekvateco de esprimiloj, fuŝesprimis amon. La vasta plimulto de la *rjuiaoj* volis daŭre provi, volis vivi, eĉ maladekvate, sed vivi kaj vivigi kaj iel krei estontecon; sed kelkaj *rjuiaoj* volis havi ĉion tuj kaj iĝi tre gravaj.

Tial, ili eksplodigis la planedon.

La katastrofo estis nur malgranda en la kosmo; subite tre bela lumego; pluvego da aerolitoj; nigra vakuco. Nenio ajn; ĉar astroj ofte mortas.

Sed tiu planedo ne mortis nature; tiu planedo estis murdita. Amo, amikeco, hejmoj, iloj, artoj, metioj, tuj malaperis, ekmalestis. Milmiloj da belaj komplikaĵoj kaj variaĵoj ne plu estis. Sur tiu planedo ne plu ekzistis eĉ lumo, eĉ maro, eĉ atmosfero por rekomenci. Aerolitoj forvaporigis en belaj lumostriaj flugoj; poste, silento, nigro, vakuco, absoluta nenio."

"Fino," diris la astronomo.

"Ne!" diris la aerolito, kun fera firmeco. "Ne fino; nur perdego, malŝparego, murdo de planedo vivsubtenema, eksperimento finita multe tro frue."

"Lumjarojn malproksime de tiu nigra, silenta vakuco, troviĝis la suno. Ĉirkaŭ la suno diversaj planedoj orbitis. Kaj, dum la lastaj, plej grandaj pecoj de la hejmo de la *rjuiaoj* ankoraŭ forvaporigis en flugo, dum tiu efemera beleco orpluvis en la vastega volbo, mistera nova energio ekvibris super la akvoj de la Tero.

Kaj kelkaj etetaĵoj, unuopaj ĉeloj ekekestis en la akvoj sur la Tero."

La astronomo duone rekonsciiĝis.

"Rekomenci..." li flustris, kun tragika senpersona espero.

Kun fera firmo, la aerolito respondis:

"Ĉiam rekomenci... aŭ daŭri... daŭri kaj iri pli alten..."

"Aŭ daŭri... aŭ daŭri... aŭ daŭri... ritme pulsas la sango, brue en la lacegaj oreloj, kiam la kapo de la endormiĝinta astronomo falis sur la skribotablon.

"Sur alia stelo, se ne ĉi tie..." diris merlo en la ĝardeno.

"Aŭ daŭri... aŭ daŭri..." ritmis la homa sango.

(La supra novelo estis premiita en la Belarta Konkurso '57).

L
u
d
a
d
i

S
u
r

v
u
l
k
a
n
o

de G. F. Makkink

La apero de nova kvaronjara periodaĵo „The International Language Review” igas min skribi ĉi tie kelkajn vortojn, ne por honori tiun naskiĝon, sed por montri en kio speciale troviĝas la forto de Esperanto. La unua kajero (30 paĝa) enhavas 17 artikolojn: 9 en la angla, 2 en Interlingue (Occidental), 2 en interlingua (IALA), 1 en Monde lingua, 1 en Ido, 1 en Intersistemat kaj 1 en Latine sine flexione. Esperanto mankas, ne sekve de iu bojkoto aŭ rifuzo, sed pro la saĝo de nia samideano sinjoro Glenn P. Turner, kiu preferis diri siajn gravajn vortojn en anglalingva artikolo, kies tradukita titolo estas „Komuna lingvo nun: Esperanto”.

La redaktora artikolo far Floyd Hardin kaj Tom Lang malkovras la celojn de la gazeto: „... alporti certajn novajn valorojn por la esplorado en la kampo de interlingvoj; registri la historion de la internacilingva movado; konservado de la ĉiam ampleksiĝanta bibliografio; prezenti malferman forumon por la libera kaj sincera diskutado pri tiuj lingvaj elementoj kiuj devas karakterizi kaj determini la formon de internacia idioma, en kazo de apliko far lernejoj, registaroj kaj impona parto de

la homaro” (trad. G. F. M.). La redakcio forte akcentas krei okazejon por senantaŭjuĝa diskuto inter lingvistoj. Evidente ĝi ne timas inaŭguri novajn interlingvojn, ĉar en komunikado sur la antaŭlasta paĝo estas anoncigitaj tri novaj projektoj Auxil, Unial kaj Nove auxilia, kaj la redakcio „petas al ĉiuj aŭtoroj de internaciaj lingvoprojektoj sendi plenajn informojn al la oficejoj de International Language Review” (trad. G.F.M.).

Estas ĝojige ke la redakcio dekomence sin deklaras ne partia kaj la donitaj citaĵoj sufiĉe montras ke ĝi nur science okupas sin pri problemoj el la interlingvistiko. En tio tamen kuŝas grava manko: la redakcio neniel indikas ke ĝi celas enkonduki unu solan interlingvon en la mondon. Ĝi do haltas antaŭ la sociologia faceto de la problemo kaj preterlasas meti la esencan demandon: kiel forigi la lingvan haoson en la mondo? Evidente la redaktantoj kiel lingvistoj nur ŝatas studadi, eksperimentadi, ludadi kun lingvoprojektoj kaj eventuale mem plimultiigi ilian nombron.

Kun la plej honestaj intencoj la fondintoj kreis gazeton, kiu ne estas tute sendanĝera. La mondo ja atendas de la lingvosciencistoj saĝan decidon en la demando pri la solvo de la babelaj diversecoj. Se la lingvistoj nur emas diskutadi, fari pli da projektoj, dorlotadi siajn preferatajn lingvojn, la monda publiko povas reagi tiel, dirante: Se la interlingvistoj ne povas trovi la eliron el la labirinto, nu, tiam ni lasu nian sopiron pri internacia lingvo kaj kun bedaŭro ni deturnu nin de la afero. — Tio estus malbona, eĉ fatala reago, kiu farus grandan malutilon al la internacilingva ideo kaj al la progreso de la homaro. Tiu danĝero ne estas fiktiva.

Alia eblo estas ke la publiko diros: Nu, ni lasu la lingvistojn diskutantaj, ni bezonas tuj rimedon kaj ĉar Esperanto estas bonege funkcia, ni akceptas ĝin malgraŭ aŭ eĉ kontraŭ la lingvistoj. — Tiu respondo estus saĝa, ĉar ĝi finas la lingvo-haoson.

Estas evidente kiom grave estas ke la Esperanto-movado daŭrigas influon la publikon, speciale la gvidantan parton el ĝi, en la direkto de la dua respondo. Por tio necesas bonaj argumentoj, de konvinka forto.

Fakte la problemo de la internacia lingvo ne estas unualoke lingvistica problemo, sed sociologia. La nuna kaj estonta societa vivo en la mondo postulas unu solan lingvon kaj la demando estas por kiaj homoj, popoloj, sociaj klasoj ktp. tiu lingvo estas necesa. Estas klare ke ne nur diplomatoj, sciencistoj kaj aliaj intelektuloj bezonas internacian lingvon, sed ankaŭ la personaro de trafikiloj, hoteloj, butikoj ktp. kaj eĉ la homoj sur la strato! Do la internacia lingvo estu tiel ke ĝi taŭgu por homoj de ĉiuj sociaj tavoloj, de ĉiuj profesioj, de ĉiuj popoloj.

Dualoke la problemo de internacia lingvo ankoraŭ ne estas lingvistika, sed psikologia. La internacia lingvo ja devas taŭgi por certaj plenumoj de la aganta psiko. Tiuj unue estas la esprimado de siaj pensoj kaj sentoj antaŭ alia homo, unualoke en parolaj kontaktoj. Kvankam la lingvo devos ankoraŭ servi por skriba kaj dokumenta uzado, la postuloj de la buŝa interkomunikiĝado estas tre severaj. Rapide kaj senpere esprimi siajn sentojn kaj pensojn estas nur eble se la paroliga proceso estas ne ĝenata, se malfacilaĵoj, esceptoj ktp. ne bremsas la pensadon kaj sentadon. La vortoj devas laŭbezone tuj prezentiĝi; se ili ne elsaltas el la stokejo de la memoro ili senpene formiĝu laŭ plene aŭtomatiĝintaj skemoj de vortfarado. Se la konservejo de la esprimoj ne liveras sufiĉe rapide la deziratajn idiomaĵojn, la sana prudento aŭtomate funkcias por anstataŭi per elpensita logikaĵo.

Nur fine venas la lingvistika flanko de la problemo. La lingvistoj konfesu ke ili nur plenumu la sociologiajn kaj psikologiajn postulojn, kiuj enkorpiĝas en la ecoj: simpleco, reguleco, skemeco, kaj klareco. Esperanto plene kontentigas la postulojn kaj estas la geneco de Zamenhof kiu efektivigis precize la bezonojn de vere taŭga interlingvo.

Por la uzado tute superfluas, ke vorto montras sian devenon, aŭ ke ĝia formo plej perfekte respegulas sian originon. Neniu etimologo dum la parolado prikonscias el kiu lingvo iu vorto originas aŭ en kia grado ĝia formo devias de sia originalo. En la uzado nur gravas la praktika taŭgeco: la aŭda distingeblo, la elparola certeco, la nocikovreco, la regula kombineblo de la eroj.

Legante la anoncitan revuon oni konvinkiĝas ke la redaktantoj nek konscias la limigitan taskon de la lingvosciencisto koncerne la lingvoproblemon, nek konscias sian respondecon. La interlingvistoj estas la servantoj de la homaro, ne male la homaro la servanto de la lingvoscienco! Multaj lingvistoj tiom zorgis pri la natureco de siaj lingvoprojektoj, pri la plenumo de lingvosciencaj deziroj, ke ili forĝis la plej fundamentajn postulojn, kiuj estas kiel ni diris de sociologia kaj psikologia karakteroj. Kaj plie: ili forĝas ke la tempo urĝas, kiel montris nia samideano Glenn Turner. Li diras: „Se la mondo havus senliman tempon por labori pri la solvo de la interlingva problemo, multo povus esti dirata pri plua elprovado kaj perfektigado de la diversaj proponoj antaŭ ol akcepti iun. Sed nun kiam la sciencistoj donis al ni la eblon detrui la mondon en nova milito, la tempo por perfektigi la interlingvon, laŭ mia opinio, mankas.” „Kaj tial mi proponas Esperanton nun. Ĉar se ni ne akiras komunan lingvon ebligantan mondunion nun, ni eble neniam bezonos pli bonan lingvon ol Esperanto.” „Se ni malsukcesos fini Babelon, nun kiam Unesko donis al ni la verdan signalon, ni havas bonan ŝancon ke la nova milito faros ĉiun internacian lingvon superflua.” (trad. G.F.M.).

Kjarval,

La Islanda Magiisto

Jóhannes Sveinsson Kjarval, la plej granda pentristo islanda, naskiĝis en 1885. Kiel junulo li pasigis kvin sezonojn sur fiŝboato, kaj mem li diras, ke ŝipoj inspiris lin pentri. Ŝipoj aperas en liaj verkoj sur ĉiuj stadioj de lia evoluo. Sed lia ŝipo tamen ne estas tiu de realo, sed la Magia Ŝipo de folkloro kaj mito: la ŝipo, kiu sumas ĉiujn ŝipojn kaj tamen ne estas ŝipo. La du mondoj — la reala kaj la mistika — komencis lukti jam en liaj plej fruaj verkoj, fenomeno, kiu poste fariĝis la ĉefa trajto de la artisto.

Ankoraŭ juna Kjarval fariĝis disĉiplo de la du islandaj pioniroj pri pentroarto en la komenco de la jarcento: Thórarinn Thorláksson kaj Asgrimur Jónsson, kiuj studis en Danujo. Estas vere, ke tiuj artistoj ne sekvis la modernan skolon, se oni rigardas Parizon ties distingilon, sed kvankam ili ricevis sian edukon laŭ la skandinava skolo, ilia arto signifis grandan progreson por Islando. Ne havante la subtenon de enlanda tradicio ili diligente komencis krei bildarton por Islando. Ili serĉis inspiron en la romantika naturpoezio de la 19-a jarcento, surtolaĝigis la terecan gloron, kiun la vizia kaj sentema poeto, Jónas Hallgrímsson kaj liaj sekvantoj, instruis al la popolo taksu super ĉio:

*La land' estas bela kaj brila,
kaj blankaj la montaj glacioj,
serenas la blua ĉiel',
briladas ŝaŭmanta la mar'.*

Antaŭe oni vidis nur timigojn kaj bizarojn en

tiu kruda lando, en la okuloj de la tiamuloj montoj kaj glaciejoj estis malbelaj kaj danĝeraj, rifuĝejoj por elpelitoj el la socio, kiuj solaj ilin laŭdis. Sed dum unu sola generacio la artistoj transformas la malbelon al belo, la fortimigecon al allogeco. La ekjarcentaj pentristoj faris la finan tuŝon por la transformigo de la Naturo en la konscio de l' popolo, komencita de la romantikaj poetoj. Ili eĉ faris paŝon plian levante la nudajn rokojn al akompano de dioj dum la poetoj estis kontentaj glori la belojn de l' valoj kaj la vivon de l' kamparo.

„Ĉio estis blua, strange, ravege blua”: jen la komencaj vortoj de tiutempa islanda novelo. Alia verkisto forĝis frazon poste famiĝintan: „Malproksimo faras la montojn bluj kaj la homojn grandaj”. Se la diraĵo havas sencon, „blua” kaj „granda” devas sami. Tiel la blua nebuleco, la malproksimeco de aferoj, identas ne nur kun sia beleco, sed ankaŭ sinonimas la sublimecon. Ĉi tiun komprenon klare rivelas la bildoj de montoj de la unuaj islandaj pejzaĝ-majstroj: bluaj montoj, blua ĉielo, blua maro, la blua koloro simbolo de ĉio granda kaj bela. Sur la Kjarvalaj tolaĵoj el la tempo de la studperiodo antaŭ 1912 superregas la bluaj masoj. El tiu tiraneco de „blu-konscio” startis Kjarval: el la kiamo de la neevitebla devigeo, ke pli ol duonon da pentraĵo devas konsistigi blua maso.

Sed venis la tempo, kiam la montoj ne plu estas bluaj, — ĉu tio signifas aŭ ne, ke la homoj ne plu estas grandaj. Ĉu blueco ne plu estas bela aŭ subluma? Unu certas, se oni povas fari konkludon laŭ la masiva volumeno de la verkaro de majstro Kjarval: blueco ne plu regas Islandon; la lando ne plu dormetas en senvojaj lontanaj; la multkolora realeco de la proksimeco vivas kaj regas en liaj bildoj; kaj ĉu bluo belas aŭ ne, ne plu

incitas pripenson; nur proksimeco ĉeas, nia propra proksimeco sur la loko, kie ni staras en la pasanta momento. Kiam la montoj ne venis al Kjarval, li venis al la montoj, — kaj ili ĉesis esti bluaj. Pejzaĝo de li ne plu estas bildo el la fora distanco; la lando malaperis, kaj kio restis, estas nur malvasta ero da Naturo, ĉe-bildo de la tero disvolvita laŭ komplika desegno de bunta maso; deklivo, intermonto, etendaĵo de likenoj, vulkana formacio, roko, altaĵo aŭ ŝtono, makulo de herbo. Liaj koloroj najbaras la skalon de minoro, intime interplektitaj kaj ofte inklinas sombrecon, fremdaj al la gajaj kolor-modeloj de moderna arto furora en la Eŭropa sudo, sed des pli similaj al la ekstera aperaĵo, kiun Islando mem povas porti tutajn jarojn ĝis fino. Tiuj, kiuj plej familiaras kun la vastaj, simplaj kolor-masoj de diversaj tipoj en moderna arto eble trovas en la komenco la pentraĵojn de Kjarval grizaj kaj sombraj, sed pli intima rigardo rivelas la virtuocon kaj riĉecon de koloro, kiu kuŝas kiel ĉe la radikoj, kiel la koloroj kaŝitaj en islanda rokaltaĵo, kvankam la tago eble estas nuba kaj malklara. En tiaj bildoj la peniko malkaŝas sian funkcion; detaloj estas zorge kaj lerte ellaboritaj, iafoje kvazaŭ inspiritaj tehniko de delikata brodaĵo, iafoje de pontilismo. La artisto pograde evitas la facilaniman metodon okupi duonon de la tolaĵo per blua ĉielo; la ĉielo preskaŭ tute malaperis malantaŭ la monton; la dividlinio inter tero kaj ĉielo, la horizonto, tiom sin levis en la bildo, ke nur videtebles la ĉielo tra truoj inter la plej altaj pintoj de l' pejzaĝo, — kaj estas nur escepto, se la ĉielo estas blua. Eĉ la maro ne plu estas blua, la maro estas preskaŭ forgesita. Alivorte, la tolaĵ-spaco fariĝis tiel valora, ke ne plu estas loko por maro aŭ ĉielo. La gloro de la bluaj distancoj, la karakteriza trajto de islanda arto komence de la jarcento, estas for; la artisto



Kjarval: Revenis mia ŝipo (1934).

sin trovas en la mezo de l'aferoj, lia vojo lin gvidis el transtuŝa malproksimo al ĉemana maldisto.

Kiel la grandaj transiraj pentristoj en la historio de mondarto, Kjarval eterne militas rilate ĝustan sintenon al la farota tasko: kio estas propreca, permesebla kaj eĉ farebla en pentraĵo; kaj ankaŭ, kompreneble, kio supozeble estas efika; estas interese vidi, kiom diversajn metodojn li uzas donante vivon al siaj temoj. Nenio tiom trivialas, ke ĝi ne povas impresi post liaj tuŝoj; ĉe li la nuda roko fariĝas la propra imago de ĝuo — pro la Vivo mem; eĉ la dezerto iĝas bela en liaj bildoj, ĉar estas tiel ĝoje vivi. La senripozeco de la artisto, lia serĉado kaj eksperimentado, tiu sinteno natura al majstro: dubi ĉion konvencie akceptitan kaj serioze konsideri la plej fantazian kaj neprobablan, — jen estas la stimula elemento en la arto de Kjarval.

Kjarval ĉiam havis du proprejojn, unu en la vid- ebla mondo, la duan en la sekreta mondo de si mem. Tiuj du mondoj efektive influas lin varie; iafoje ili aperas praktike sendepende unu de alia sur la sama tolaĵo, en parta aŭ plena kontraŭ-

eco; eble „greka” harpo subite sin trudas sur la fasadon de islanda farmbieno. La alesto de tiu dua mondo en realeca bildo povas krei efikon simi- lan al tiu de kakofonio en muziko, elvokante emociojn de miro kaj maltrankvilo en la observan- to; du malparencaj bildoj ŝajnas esti pentritaj unu sur alian. Sed ne malkonsilindas memori la vortojn de Braque: „Pentraĵo, kiu ne elvokas maltrankvilon en la observado, kia fenomeno estas?” Ambaŭ mondoj, la sentebla kaj la mistika, forte premas; estas vere, ke ofte la artisto sukcesas eksterigi la duan, — kaj tamen, eĉ en la malmol-materia pejz- aĝo oni neniam povas esti tute certa, ĉu bildo de feo ne sin ie kaŝas. Pri tio diras la islanda poeto Jakob Jóh. Smári en sia poemo pri Kjarval:

*„En arto vi revas pri transa mister’
pri postvespera tagoro.
Vi ĉiam sonigas en ŝarboaper’
allogojn for el ĉimonda Ter’
kaj vokas l’ animojn silentajn al Sfer’
de l’ Forta kaj Sankta Gloro”.*

Foje ambaŭ mondoj estas intermiksitaj per tioma



Kjarval: Printempo kantas (1939).



Kjarval: Ene kaj Ekstere (1933)

(Helgafell, Reykjavik)



Kjarval: La arto labori (1948).

zorgo, gusto kaj lerto, ke la observanto senkondiĉe kapitulacas al la magio de la bildo tuj akceptante ĝian validecon kiel ferakonton atestitan de notario. Ofte estas klare, ke la Naturo, la tero kaj la montoj, tute alie koncernas la artiston ol provizi lin per materialo por pentri pejzaĝon: pejzaĝo eble stimulis kaj inspiris lin sed iom post iom ĝi malpligraviĝas, aliaj interesoj kaj senparenca materialo elpelas ĝin tute aŭ surmetas ties veston dum li laboras. Bona ekzemplo estas la bildo „Ene kaj Ekstere”, kie la artisto uzas pejzaĝon kiel pretekston por organizi la tolaĵon en kompliko de diversaj desegnoj. La faro de tia artoverko estas intense persona kaj originala; aliflanke estas apenaŭ imageble, ke islanda artisto povas adapti tian metodon sen influo el sudeŭropa teĥniko. Eble oni povas serĉtrovi malproksiman influon el kubismo, tiu fruktodona movado, kiu leviĝis en la Sudo iom post la komenco de la jarcento kaj inaŭguris multajn novaĵojn en moderna arto. Estas preskaŭ vere nomi multajn el tiaj pentraĵoj de Kjarval pejzaĝoj

kamuflitaj kiel supernaturaj estaĵoj (vd. „La Arto Labori”). Tiaj artverkoj, plenaj de sendependa, personeca kreado de formo, rajtas postuli esti konsiderataj kiel unikaj en samtempa arto.

Kjarval estas unu el la plej grandaj artistoj de Islando. Tiom vasta kaj grandioza estas lia laboro, ke se li estus la sola islanda pentristo de tiu ĉi jarcento, Islando tamen meritis lokon inter la nacioj de la mondo en arto, simple ĉar li vivis kaj laboris tie. Kaj ankoraŭ li vivas kaj laboras kiel ĉiam ajn. En la okuloj de Islandanoj li estas la ĉiamfreŝa magiisto, kiu prenas sian ekipaĵon en la sovaĝejon por vivi tie sola tagojn kaj semajnojn en malgranda tendo en variaj veteroj, aŭ elaste paŝegas, alta kaj svelta, tra la ĉefstratoj en Reykjavik, ĉiam originala, ĉiam kreanta. Eble neniu artisto tra la tuta mondo sin tiom kantis en koron de nacio.

Baldur Ragnarsson
(Fonto: KJARVAL, Rvk. 1950)

PALMA GRAND

DEMONETO

KAJ

SORĈISTO

For de la reala mondo, eble sur ĉiflanka aŭ transa bordo de la Fabelbalanca maro, vivis malgranda demono. Ŝi estis stranga kreaĵo de Dio. Ŝia grandeco apenaŭ atingis la amplekson de neĝofloko. Onidire ŝi estis eĉ pli malgranda. Mi ne scias, ĉar mi neniam renkontis ŝin. La fakta strangeco troviĝis ne en ŝia eta staturo. Ŝi diferencis de aliaj demonoj per tio, ke ŝi havis kapablon por mediti kaj senti. Ĝuste tial, kiam ploro sufokandis aŭ koraj ĉagrenoj turmentis ŝin, ŝi ĵetis sin en sorĉan kvinpinton por nevidate plori, forskui de si la larman ĉagrenon. Ŝi estis tia stranga demoneto.

Laŭŝajne ŝi ĉiam estis gaja, ŝatis ludi inter la nuboj kaj malofte ŝia koro pelis ŝin ankaŭ en la teran marĉon. Kial oni nomis ŝin demoneto? Ĉar ofte ĉiumomente ŝi ŝanĝis sin. Kelkfoje ŝi tualetis sin per sunradioj aŭ lunlumo, jen ŝi aperis en veluro de nokto, jen en grizo de tempesta nubo, aŭ ŝi montris sin vestita en printempa aŭrora pompo, sed ĉiam ŝi estis rekonebla, ĉar kiel ajn variis la vestoj, rigardante al ŝiaj okuloj oni ĉiam povis vidi tiun fajrerĵetan flamon, kiun oni ĝuas kuŝante sur la mola tapiŝo antaŭ la malfermita pordeto de la hejma fajrujo.

Nu, okazis foje, kiam nia demoneto saltodancis inter nubetoj, ke subite kurioza evento tiris ŝian atenton. Grandega figuro paŝadis sur la nuboj tiel, kiel ĉiu tera ekskursanto kutimas iri supren sur ŝtonŝtupa montdeklivo.

— Jen kia Mistera Maskulo promenadas en mia regno — ŝi vole-nevole ekkriis ronde streĉante siajn okulojn.

— Vi eraras, Demonjo. La lando de nuboj ne estas sole via regno — respondis la nekonato.

— Ĉiu, kiu havas emon kaj kapablon, rajtas eniri kaj migri en la Alta Nublado. Sciu, kiel mi vidas, vi mem vagadas en tre suba parto de tiu ĉi lando! Vidu, mi mem celas tiun alton, kiun vi neniam povos imagi. Mi aspiras al la montpinto de la nuboj.

La Mistera Maskulo ĵus estis ekironta plu, sed li subite ekvidis la sopirflameton en la rigardo de la demoneto kaj li haltis momenton por etendi al ŝi sian manon.

— Nu, donu vian maneton, Demonjo! Migru kun mi, se vi volas. La koro de nia demoneto forte ektamburis. Ho, pli alten! Sed nur la Granda Sorĉisto kapablas ascendi plialten, ŝi memoris pri instruo iama, sed la Mistera Maskulo divenis ŝiajn pensojn kaj konsole admonis ŝin.

— Ne kredu, Demonjo, ke mi estas tiu sorĉisto. Eble ni renkontos lin en la plej alta nubopinto. Nu, se vi deziras kunmigri...

Post palpebruma hezito ŝi etendis sian maneton al li.

— Jen, prenu ĝin, Mistera Maskulo, volonte mi iros kun vi, sed... sed mi havas peton: ĵetu for vian maskon!

— Laŭ via deziro — li respondis kaj per svinga gesto plenumis ŝian deziron.

La mieno de nia demoneto ne ŝanĝiĝis. Ŝi ekprenis lian manon kaj ili ekiris, leviĝis al pli altaj nuborokoj. Ŝi silentis, eĉ vorteto ne forlasis ŝiajn lipojn.

— Mi scias, vi ŝatas babiladi. Ne timu, se vi estas kun mi, trankvile faru tion! — li milde instigis ŝin.

— Mi ne kuraĝas. Unue, ĵetu for vian maskon!

Li obeis. Jen masko flugis for radie. Ŝiaj okuloj eĉ ne palpebrumis, sed tamen ŝia babilemo liberiĝis.

— Demonjo, vi iam povis ortinte ridi. Kio okazis al vi?

— Nenio! Se vi ĵetus for vian maskon, mi ridus refoje.

Subite en la ŝaŭmanta maro de la nuboj malaperis lia forĵetita masko. La mieno de Demonjo ne ŝanĝiĝis, tamen de tiu minuto ŝi multe ridis pri la ŝercoj de sia kuniranto.

— Kiel trankvile vi paŝetadas ĉe mia flanko — li rimarkis post iom da tempo. — Onidire tamen vi estas tre, eĉ tro vigla.

— Se mi volus salte dancadi, mi devus forlasi vian manon. Mi timas, ke vi perdus min.

— Ne timu tion! Eĉ se via maneto forglitos el mia manpremo, ne okazos damaĝo. Vi estas ja ankoraŭ infano. Necese estas por vi ludi, saltadi. Ankaŭ mi ne rajtas malhelpi vin en tio. Tamen ni povos kune iri plu.

— Jes! Vi pravas, sed... sed mi petas vin, ĵetu for la maskon!

Kiam ŝia deziro plenumiĝis, de tempo al tempo ŝi fortiris sian maneton el la helpanta mano de la Mistera Maskulo kaj ridante jubilante ŝi saltadis



zigzage tien kaj reen. Komence ĉio estis en ordo, sed nelongdaŭre. Post nekutime kuraĝa salto li serioze avertis ŝin.

— Demonjo mia, estus prudente, se pli singarde vi kondukus. Atentu, vi povos fali de la nuboj en la koton de la tero.

— Ne timigu min! Dum mia tuta vivo mi ludis, saltadis inter ekstremaĵoj de la Vivo kaj tamen mi ne falis en la marĉon.

— Ĉu? — kaj la kapo de la Mistera Maskulo dube ekbalancis. — Ĉu mi devas kredi tion aŭ ne?

— KREDU al mi! Nur foje marĉa makuleto tuŝis miajn ŝuojn — ŝi verve klarigis.

Li ne ĉesis senkrede balanci la kapon, sed Demonjo pensis ĉion esti en bona ordo. Eble ŝi saltadis eĉ pli aŭdace ol antaŭe. Ŝia gajo ne havis limon. Ŝi havis ja tian ekstravagancan naturon. Estas facile imageble, ke la Mistera Maskulo fine trovis ŝian konduton ne deca. Foje li eĉ ne akceptis ŝian redonitan maneton, eble pro hazarda, tute ne intenca paŝo ŝia sur lian piedon. Jes, ĉar ankaŭ la Mistera Maskulo havis vundeblan kalkanon.

— Kion vi pensas? Ĉu vi rajtas fari al mi ĉion? — li murmuris ofendite.

— Ĉu ne vi kuraĝigis min? — kaj Demonjo ronde streĉis siajn brilantajn okulojn.

— Vi pravas, sed tamen ĉio havas sian limon. Vi rekte mokas min. Ho, kiel senpripensema, kiel varihumora vi estas! Vere vi estas demoneto, sed gardu vin, ne falu en kaptilon, kio povas okazi ofte al demonoj!

— Ĉu vi parolas pri mia senpripensemo, kaprico? Ĉu ne vi mem havas ĉiam novajn maskojn? Mi ŝanĝas nur miajn tualetojn. Vi bone povas scii, mi ĉiam estas sama. Kontraŭe mi vane petis vin, vi montras al mi ĉiam nur maskojn. Jes, jes, vi kaŝas maskon sub masko. Neniam vi montris al mi vian veran vizaĝon. Tamen mi ne kontraŭis vin. Mi simple akceptis vin tia, kia vi montris vin en la momento, rekonante la fakton, ke vi ne kapablas ĵeti for vian lastan maskon.

Dum longspira momento la Mistera Maskulo silentis, pripensis.

— Ĉu vi volas vidi mian realan vizaĝon?

— Ne, ne! Tute ne! Mi jam ne deziras tion. Tamen mi scias ĉion. Vi estas la Granda Sorĉisto. Rigardi vin estus tro domaĝe. Vi povis senti, mi ne timis vin, venis kun vi, sekvis vin. Simple mi fidis vin eĉ spite al viaj maskoj. Ho, Granda Sorĉisto, kiel vi imagis nur momenteton, ke mi, demoneto, povus superruzi, trompi vin? Vi devus ja scii, ke via malgranda Demonjo restas kun vi ĝis kiam ŝi sentas sin via, apartenanta al vi, ĝis kiam *vi mem certas pri via povo*, ĝis kiam vi fidas al vi mem kaj al mi, kiu neniam povas esti alia ol mi mem, kiu ĝuste restas fidela al vi pro tio. Ho, Granda Sorĉisto, kiun ĵonglaj potencoj servas, kiel vi ŝanceliĝis, kiel okazis, ke vi tiel povis forgesi pri via forto?!

Demonjo etendis sian maneton por paciĝi, sed vane. Li ne volis eĉ rigardi ŝin. Ŝi emfaze daŭrigis:



— Se mi ludas aŭ saltetadas, por vi estas negrave. Se mi proksimiĝus al la tero, ke la homoj rimarku min, mi farus eĉ tion por porti ilian admiron al vi, kiel florbukedon. Mi volus doni nur ĝojon, ĉar mi deziras, ke vi estu fiera pri mi.

— Nun mi volas konatigi al vi mian veran vizaĝon. Mi scivolas, ĉu vi venos kun mi, se vi vidos min sen masko kaj rekonos vian eraron. Kio okazos, se vi ne vidas min plu — la Granda Sorĉisto?

— Kiu ajn vi estas, mi ŝatus resti kun vi, tamen ne ĵetu for vian lastan maskon! Prokrastu pro mia peto! Ĉar, se mi vere eraris, ne sole vi ĉesas esti la Granda Sorĉisto, sed ankaŭ mi ne plu povos esti demoneto. Tiel bone estas ludi, saltadi, ne pripensi. Se mi laciĝos pro la ludo, mi ĵetos for la variajn vestojn kaj ankaŭ vi povos forĵeti la maskon. Ĉu konsentite?

— Ĉu mi faru tion? Ĉu ĉiam mi lasu vin venki? Kiam vi konsideros miajn dezirojn? Mi estas jam tro laca por porti la maskojn.

Subite Demonjo ĉirkaŭprenis la kolon de la Mistera Maskulo kaj flate, dorlote petolis ŝia voĉo:

— Neeble! Vi promesis gvidi min ĝis pinto. Vi ne rajtas rompi vian vorton. Vi invitis min al kuna vojiro kaj nun, kiam mi migras kun vi, jen subite vi ne volas daŭrigi plu la supreniron. Mi estas tre malpeza, neeble laciĝi pro mi. Faru vian promeson kaj ek plialten!

— Vere, mi promesis — li duonlaŭte diris al si kaj prisilentis siajn pensojn, ne parolis pri tiu helpo, kiu ĝojigus lin, faciligus la plenumon de lia promeso, nome la pliiĝo de ŝia revonutrata sopiro por la supreniro. Kiel li ĝojus havi iun, kiu batalus kun li por la fora celo! Eĉ unuvorte li ne menciis pri la kruela kruto, plena de trompiĝoj pri la ĝis nun irita vojo, nur reprenis la molan maneton de Demonjo por helpi ŝin supren inter la nuborokoj.

— kaj tiel man-en-mane ili marŝis. Li indulge ridetis pri petolado, saltado, babilado de Demonjo; ŝi, ŝajne sen atento pri liaj maskoŝanĝoj, ĉiam pli forte premis la helpantan manon ĝis... ĝis foje por ripozi ili eksidis sur mejlomontra nubeto. Ili rigardis unu la alian, reciproke esploris siajn mienojn kaj kvazaŭ pro malica vualpela vento subite ili vidis ion neatenditan: la iluziaj tualetoj, pompaj vestoj de Demonjo ŝajnis buntaj ĉifonoj, la lasta masko de la Mistera Maskulo falinte kuŝis sur lia genuo, la mejlomontra nubeto montriĝis simpla tera roko kaj anstataŭ la koloraj nuboj, iam fosforeske brilantaj en la radioj de la fantazikreita suno, ĉirkaŭis ilin — sobriga dezerto de la *tera ekzisto*. Ili sidis iom seniluziigite rigardante unu la alian, la premo de iliaj kunplektiĝintaj fingroj cedis al inertigo.

— Via demoneco perdiĝis. Mi vidas vin simpla virineto, kiu laciĝis pro ĉiama komedio — li rimarkis post longa silento.

— Kien vi malaperis, Granda Sorĉisto? Sen-



maske vi montras vin nur lacanima vireto, sopiranta al ripozo — ŝi triste konstatis.

— Jes, venis la tempo por disiĝi. Mi povas doni ne plu ion al vi.

— Jes, plejsaĝe estas disiĝi. Mi povas distri ne plu per mia ludo. La decido maturiĝis, la rigardoj adiaŭis, ili leviĝis por iri dudirekten, sed... sed la manoj, tenantaj unu la alian, ne obeis, kvazaŭ iu forto, pli potenca ol ilia volo, kunĉenis ilin. La manoj baraktis, en la mienoj konvulsie tremis subpremita sento kaj la trajtoj ne sukcesis mensogi indiferentecon.

— Neeble — li ekĝemis.

— Ne, sed ĉu entute estas necese? — kaj karesa rideto petolis ĉe ŝiaj lipanguloj, ŝiaj fingretoj energie replektiĝis en la liajn. — Nu, ek!

— Ĉu vi deziras, ke ni forgesu la momenton de sobro, kiu montras nin nur eraremaj hometoj?

— Jes! Nur momentan paciencon! Mi prenos sur min kostumon, *teksitan el radioj de ora feliĉo*, vi prenu al via vizaĝo la maskon de celkonscio. Iluzioj ja faras la vivon tolerebla, bela, celhava. Nu, ek, mia Granda Sorĉisto!

— Ho, vi estas vera demoneto! — kaj sub lia reprenita masko kaŝis sin konsoliĝo.

Ili leviĝis, man-en-mane ekiris por ree migri, suprenmarŝi inter sonĝonuboj al la alto, for de la reala mondo.

Poezia verko de Jaroslav Seifert

En la samtempa ĉeĥa poezio elstaran lokon okupas la poezia verko de Jaroslav Seifert. Naskiĝinte la 23an de septembro 1901 en Prago, trapasis Jaroslav Seifert kiel proleta knabo infanaĝon en ludomo de Praga kvartalo Zizkov, loĝata de laboristoj kaj salajruloj.

Liaj unuaj poetaj verkoj transportas nin en la jarojn 1921 kaj la sekvantajn. Tiam li apartenis al grupo de junaj entuziasmuloj batalantaj por nova socia ordo, mondo pli justa, kie ne estus subprematoj kaj la vivĝojo estus por ĉiuj akirebla. En liaj unuaj poemaroj „Urbo en larmoj” kaj „Nura amo” li prezentiĝas al ni kiel „knabo el periferio” — kiel li nomas sin mem — en industria Praga kvartalo. Kun sentemo kaj rimarkivo li observas la vivon kaj ties malfacilaĵojn, kiujn li volus forigi, sed ankaŭ belon ĉiutage nin ĉirkaŭantan kaj tiom ofte de ni neglektatan en la panakira peno kaj hasto. Kaj ĝuste tiun belon li celas malkovri kaj al ni vidigi.

Pasadas la tempo kaj maturiĝas la aŭtoro. Super Eŭropo kolektiĝas pezaj nuboj kaj super ĝia koro, la patrolando de la poeto, ekfulmas kaj tondregas. En tiu malfacila tempo, komenciĝanta en la jaro 1937 estiĝas la poemaroj de Seifert „Kasko da argilo” kaj „Estingu la lumojn!”

En tiu malĝoja periodo finiĝanta per la jaro 1945 Seifert konfesas, ke li kiel poeto devas sian batalon pri la hejmo — super ĉio kara — elbatali sur ĝia grundo, kie daŭras plu intima proksimeco inter li kaj la komplekso da aĵoj, kiuj de ĉiam reprezentis por li la nocion de la hejmo, t.e. familio, naskiĝpejzaĝo kaj popolo, kun kiuj lin firmege ligas komuneco de sango, fato kaj gepatra lingvo. Li decidas eĉ kun katenoj sur la manoj ne forlasi sian popolon kaj patrujon, kaj riskante ĉion, li komencas malegalan batalon kontraŭ ogro ne havante alian armilon ol sian verson, sian vorton, simplan kiel kampara floro kaj senperan kiel premo de mano, kiu ne darfis firme ekpreni la defendan glavon.

Kaj Seifert kuraĝinte ĉi tiun batalon, submetis sin al ĝi kun vereco inda je poeto, kaj ne ĉesas konsoli per siaj versoj la mizeriĝintajn homkorojn. Kantante pri floroj, printempo kaj belo, li montras samtempe inter la linioj grandecon de la vivo dum ĝi estis, estas kaj estos travivata en libereco kaj nemisformata kaj neperfortata vero. Ju pli deprima estas la mizero, des pli varmege inklinas Seifert al la vivo, des pli varmege li ĝin amas.

Antaŭ ol tratabiĝis la subvideblaj radioj de libereco tra la grizaj nuboj de subpremo, necesis ankoraŭ enmanigi fusilon kaj konstrui barikadojn. Ĉi tiujn majajn tagojn estantigas al ni Seifert en la lasta parto de la „Kasko da argilo”.

Super la pluaj poemaroj de Seifert, plenaj de ĉarma liriko aŭ poemoj de plenumpromesa forto, kies ĉiu vorto estas sigelo kaj subdirita ĵuro, oni klare konstatas la ĉefan fonton de lia poezio kaj karakterizan signon de lia poemkreado kaj de lia personeco mem. Amo ĉiam kaj ĉie, kvazaŭ tio estus devizo, kun kiuli alpaŝas ĉiun verson, al ĉiu poemo, traktanta pri kio ajn. Sed el tio ne rezultas por lia poezio eĉ plej eta trajto de malforto; male, ĉiu lia poemo estas tiel vivigita kaj travarmigita per interna travivo kaj sopiro disdoni tion belan, kio plenigas la koron de la poeto kaj manifestiĝas kiel pruvo de la prafonta eterna inspira forto de amo en poezio kaj arto ĝenerale. Seifert kiel poeto estas kvazaŭ per neeldirita pakto ligita kun junaĝo kaj de la junularo adoptita, ĉar ĝuste la juneco estas la aĝo de la unua amo, aĝo de vekigo kaj disvolviĝo de persona senta riĉaĵo kaj persona distingiva talento, kiam la juna homo malkovras sin mem kaj la mondon, bazante ĝin tutan je amo, sed sian sur nenio — tiu sufiĉas al si mem.

Tamen Seifert estas sammezure ankaŭ poeto de homoj maturiĝintaj per vivo. Kaj tio rezultas denove el lia baza kvalito de amo, nome el ĝia speciala nuanco, kiun prezentas trankvilo kaj iu saĝa melankolia kvieto kaj certeco. Tio estis riproĉata al tiu ĉi amo, ĝi ŝajnis tro malmulte ekscitita, neklopoda, afabla. Sed ne estas tial, ke ĝi ne konus malfacilaĵojn, malharmoniojn, batalojn kaj suferojn. Kaŭzo de tio estas, ke ĝi ekkoninte ilin, ne parolas pri ili, konsciante la lastan kaj certan, nome, ke la amo povas esti feliĉa aŭ malfeliĉa, sed ankaŭ, ke la plej malfeliĉa amo estas pli bona ol malamo, kaj ke ankaŭ amo fatala kaj senrevigita trovos finfine rekompenco en konscio, ke oni amas. Kaj tiel povas okazi, ke leganto de Seifert iun tagon fermos la libron kaj forgesos sian poeton; kaj eble por sufiĉe longe, tutan tempon, dum kiu li estos konvinkita, ke li la vivon superluktos kaj ĝin terenjetegos. Sed certas, se li ŝatas poezion, ke li remalfermos la libron de Seifert kaj konfirmos la ekkonon, ke Seifert estas kaj restos poeto de ambaŭ polusoj de la homaĝo, ĉar dume la homo konvinkiĝis, ke la plej bona maniero, kiel superlukti la vivon, estas persista, pacienca amo kaj fidelo.

Seifert estas do antaŭ ĉio poeto de amo, de ĉiu amo, ne nur de la unua inter aliaj, kiu kunigas viron kaj virinon, la geamantojn.

Ja kiel inundas nin lia amo al hejmo en ĝia pli vasta vortsenco, al la ĉeĥa pejzaĝo dum alternado de jarsezonoj en multaj poemoj. En la poemaro „Iris pentristo malriĉe en mondon” al la desegnaĵoj de la ĉeĥa klasika pentristo Mikolás Ales, kiu lin prisorĉis jam en la lerneja aboco-libro, elkantas

La fraŭlino el la kvara etaĝo

emocie Seifert sian amon al tiu lando, kiun li vidas denove per okuloj de rememoroj, kiel ĝi montriĝis iam al la mirigita „knabo el urbo” de la printempa salikfajfil-farado ĝis flugo de sledo tra neĝovento. Amplene desegnas la poeto montojn kaj kampojn kaj vilaĝojn, kantas pri koloroj kaj bonodoroj de floroj, pri flugo de ĝiaj birdoj kaj nubaroj. Seifert verkas siajn bildojn kvazaŭ laŭ temoj de popol-poezio; same kiel majstropentristo Ales per kelkaj linioj, same tiu ĉi poeto, kun simila majstreco scias illustri per kelkaj versoj vizaĝon de ĉeĥa lando, ĝian naturan etoson.

Prago estas lia granda amo. Ĝia multforma ĉarmo eniras liajn versojn jen per florantaj Petrindeklivoj, aŭ en fumo de periferio, jen per antikva majesto markita de paŝoj de historio aŭ per intima ĉarmo, kiun ĝi havas por tiu, kiu vivis inter ĝiaj muroj ekde infanaĝo. Al tia rava sentesprimo apartenas bildara himno pri lia amata Praha, „Kronplekto da sonetoj”.

Kvintesencon de lia amo sentigas al ni lia poemaro PANJO. En molteneran ĉarmon li vualas la vorton „hejmo” kaj nekompareble prikantas figuron, kiu enkorpiĝas ĉi tiun peceton da mondo — la panjon. En sian estaĵon materiigas al li la ideo de hejmo, kiu sen ŝi subite kadukiĝas; ŝia figuro ĉiam denove traradias la rememorojn de la poeto. Malfrue, vane la matura viro aprezas sian amemon kaj zorgemon kaj kante esprimas sian amon kaj dankon. Kiam li fartas plej malbone, li serĉas rifuĝon en imago pri ŝi. Kvazaŭ ĉiu sensignifa aĵo en la hejmo havus sian historion, parolus per sen-vorta, sed al li komprenebla lingvo, ĉu estas deonkla tranĉilo, ĉu kafmuelilo, teskatolo, panja ventumilo aŭ ringo. Eĉ pipo de l' paĉjo povas multe rakonti. En sia poemaro PANJO estas Seifert intime proksima al ni ĉiuj sen diferenco de nacieco.

Tiel ni konstatas ĉiam pli klare, ke Seifert kiel poeto ĉiam pli evidente kaj esprimplene koncentriĝas al temoj esencaj kaj gravaj. Junan revoluciulon kaj proleton el grandurba periferio, kiu nin ĉarmis per sia sensa avido, naivo, ideoj kaj ankaŭ per maldiskreta senbrido, alternis vera kristano de vivo, kvazaŭ rebildo de ankrinta renesanco kaj ĝoje ludema rokoko; kristano de kredo je Dio, amanta mondon, homon kaj vivon, kristano kun animo, kiu ĉiam vibras per melodioj de ardaĵkantoj.

Proksima al simpla popola animo sonanta per kanto laŭde al vivo sur la tero, kiu estis kreita per miraklo, komprenas Seifert ĉi tiun animon, ne nur kiam ĝi laŭdegas, sed ankaŭ en momentoj kiam ĝi suferas kaj dronas en aflikto. Tial prave Jaroslav Seifert estas indikata kiel unu el la plej puraj kaj plej ĉeĥaj poetoj, kiujn ni havas.

Jiri Kořinek

Tuttagon bruis stebmaŝin',
mi ĉambre aŭdis la stebadon.
Sidadi super kudroplato
mi ĉe fenestroj vidis ŝin.
Ŝi al mi ridis jam el for'
kaj tranadligi la fadenojn
mi gvatis ŝin el koridor'.
Por mi kolektis ŝi bobenojn.

Fenestren ombro falis nur,
sun' sub tegmento daŭre foris.
Ĉar floro ĉe ŝi ne disfloris,
restis sen ĝi fenestra mur'.
Super maŝino ĉe l' kudrad'
ŝi ĉiam kantis, kaj ŝi emis
morti en tiu trista kant'.
Mi ĝin ankoraŭ ne komprenis.

Ĉemizojn kudris ŝi laŭ mend',
voĉ' ŝia al mi molis tiel.
Ŝi kudris eĉ porkonfekcie
bluzojn el tol' kun ornament'.
Ŝi estis bona. En milit'
por mi bombonojn ĉiam havis:
violajn kun la flor-imit',
abel' sur la mielaj flavis.

Tra l' domo iris kalumni',
mi, nebonvene, kelkon aŭdis,
dum najbarinoj ŝin mallaŭdis,
pro kio tre malĝojis mi.
— Li ŝin edziĝi? Kia pens'!
— Kaj tamen ŝi lin trovas kara!
Sed mi do amis por kompens'
tristan fraŭlinon el la kvara.

Iam al ni eĉ venis ŝi,
panjo ŝin ŝatis. Sen repliko
por spic' mi devis al butikoj.
Nura preteksto estis ĝi.
La neaŭdotan tiam, jen,
mi tamen aŭdis — plorimpeton.
Post mia kura hastreven',
ŝi ploris super kaftaseto.

Bombonojn ŝi kun malavar'
donis al mi, la silkajn, grandajn.
— Knab', ĝuu tiujn ĉi, la frandajn.
Ŝi min karesis sur harar'.
Eliris mi al koridor',
frunton al krad' premiĝi lasis;
subite min ekskuis plor'.
Ja kio nur kun mi okazis.

Foje de supre kun insist'
iu korŝire ekĝemegis.
Poste en dom' konfuzo regis
kaj haste venis kuracist'.
En trista ej' sen florornam'
kun bru' subite homoj aris.
Mi vidis nur, ke ŝia man'
de la brankard' senpove falis.

Forknaris ĉar', ekmutis dom',
lund' estis — ree koridoro
aromis de brasikodoro,
plu iris viv' en monoton'.
Antaŭ mi maskon ŝiris for
de nekonaĵoj kies mano?
Preteris min mister' de mort'
kaj eĉ la pli mistera amo.

Bukedeto da violoj

Venontan fojon ŝparu pli.
Kiom ĝi kostis ja nur do?
De l' panjo kelkajn frazojn ĉi
preskaŭ parkere konis mi.
Ŝparis ŝi el malmulto.

— Hartondi iru kun prefer'.
Laŭkone sekvos admono:
Morgaŭ vi petos pri kajer'
kaj mankos al ni eĉ krejcer',
domaĝe pri la mono.

Mi trudis al ŝi kun perfort'
tufon da blu' printemp-suna.
Dum pagis ŝi per kisa sold'
molis karese ŝia vort':
Filet', mi jam maljunas.

Plend' ripetiĝis post jarpas',
poste kun malpli da ardo.
Kiam rompiĝis la florvaz',
ŝi lokis florojn en la glas'
restinta de mustardo.

Horloĝo batas post la vand',
premas min muto de muroj.
Panjo, tuketon sur la vang',
kuŝas en lito: jupa rand'
kovras sen mov' la krurojn.

Mi prenas ŝin ĉe l' frida man',
fingroj sur polmon sin premas.
Al ĝi bukedon mi kun am'
enmeti volas laste jam.
Eĉ nun ĝi rifuzemas.

La pipo de la paĉjo

Paĉjo fumadis pipon
kiam finiĝis tag'.
Mi vidas la ekipon:
saketon kun tabak'.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni ame ŝatis,
tion ni amos plu.

Li, kiam mallumiĝis,
sidadis sur verand',
kaj alumet' sufiĉis
eklumi al la vang'.

Kio ja estus, kio,
la viv' sen rememor'?
Plej bela idilio
el pipo ŝvebis for.

Sed panjo koleremas,
nur milde, sen impet',
ĉar paĉjo, nu, dissemas
tabakon el saket'.

Se pipo strikon faras,
li petas pri absolv'.
Al kiu ne elfalas
iom da cindra polv'.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni eme ŝatis,
tion ni amos plu.

Li en malsano lasas
pipon sur parapet'.
Kaj panjo larmojn kaŝas
plorante en sekret'.

Ŝi ĝin tenere tuŝas
sen naŭzo pri odor'.
Nun misodoro fuĝas.
Nun spiras el ĝi flor'.

Karese ŝi ĝin prenas
hontruĝa antaŭ ni.
Kaj sur la pip' ekstremas
da perloj pli kaj pli.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni ame ŝatis,
tion ni amos plu.

Trad. Jiří Korinek

Jolanthe Leser

La vivo estas pli forta

Andras staras ĉe la bordo de la riverego kaj riparas difektitan reton. Liaj movoj estas malrapidaj; kelkfoje li interrompas sian laboron kaj fiksrigardas en la malproksimon. Tie, kie akvo kaj horizonto kunfluas, la suno jam terenkliniĝas kaj ankoraŭfoje vasten elsendas siajn brilajn radiojn. Ili kaptiĝas en la simpla teksaĵo de la reto, lude glitante tra la maŝoj kaj tremetas ankaŭ sur la vizaĝo de Andras. Sed li nek atendas la belecon de la foriĝanta tago, nek la riveregon, kiu potence treniĝas, li rigardas en la malplenon.

Li ne perceptas la ridon kaj ŝercadon de siaj kamaradoj kaj nur maleme revenas al la realeco, kiam la frato Stefan, laborinte la tutan tagmezon silente kaj vigle, de sia loko alvokas:

„He, Andras! Tiumaniere vi vere ne finos kaj la patrino atendas nin, por ke ni vespermanĝu. Rapidu, frateto, Imre kaj mi jam iras!”

Andras suprentiras la okulbrovojn kaj denove eklaboras. Jes, Stefan, Imre kaj ĉiuj aliaj, la feliĉuloj! Ili estas ĉiam gajaj kaj ŝajne kontentaj. Por ili estas memkompreneble, ke ilia vivo pasas per la fiŝkaptado kaj reflikado, la riparado de boatoj kaj dimanĉaj dancoj en la gastejo. Tiel vivis jam la patroj kaj la prapatroj, ili startigis la boatojn de la insulo, eljetis retojn en trankvilaj golfetoj, kviete atendante la kaptadon de la tago, poste hejmenvenis lacaj, kaj kulere ĉerpis sian fiŝsupon kun la stoiko de jarlongaj kutimo kaj sindono de la malriĉuloj.

Sed li, Andras, kelktage estas turmentata de tiu simpla, monotona vivo. Li sopiras ian novaĵon, flankan de la ĉiutago, la brilantan grandurbon, en kiu li akompanis la patron antaŭ jaroj. La patro kaj la maljuna Bocso, kiujn oni en la vilaĝo rigar-

dis justaj kaj prudentaj viroj, estis forsenditaj por intertrakti kun la sinjoroj en la urbo la altigon de la tromalbonaj salajroj. Andras intertempe staris sur la strato kaj miris pri la varieco de la pulsanta vivo. Virinoj tiel graciaj kaj belaj preteriris, automobiloj rapidis. Li aŭdis ridon kaj babilon, ie pordo malfermiĝis kaj mola, sonplena muziko elfluis kaj feliĉiĝis lin, ĉio ŝajnis al li tiel bela, tiel riĉa!

Kiel alia estas la vivo tie! Kiel bele estus promenadi ankaŭ tiel bone vestita kaj senokupa, kaj gustumi la multajn, fremdspecajn manĝaĵojn, kies nomojn Andras senkomprene legis, ĉar li ne konis ilin.

Venas tagoj, en kiuj tiuj deziroj kaj bildoj pli forte aperas en lia animo, tiam li preskaŭ ne povas elteni la guston de la fiŝoj; la horoj, kiuj viciĝas sen okazaĵoj, estas pezaj, la malalta, fumnigra kuirejo premeblas lin, kaj interne li ribelas kontraŭ la humilo, kun kiu la homoj tie ĉi eltenas la vivon kaj li ne komprenas la gajecon de la aliaj.

Ĉu ili eble ankaŭ havis la samajn sentojn kaj dezirojn, kiam ili estis junaj?

Oni simple devus fuĝi de ĉi tiu malbenita insulo, formigradi kaj komenci ion pli bonan. Sed, ĉu jam iu forlasis la ĉi-tiean metion? Andras ne memoras tion. Li malklare sentas, ke la gutto de la ribelsango en li estas tro malforta, por kontraŭstari la tradiciojn kaj kutimojn. Ankau li eble fine senribele fiŝkaptos, riparos retojn kaj eĉ estos kontenta pri ĉio.

Kontraŭ tiu ekkono li revolucias kun eksento de obstino. Oni do devus superruzi la sorton! Kiel hele kaj pace estus fordrivi kun la riverego! Oni nur devus faligi la brakojn kaj ne batali kontraŭ la forto de la akvo. Tiam la multaj, turmentaj sopiroj estus venkitaj kaj nepetita sorto ne povus lin genuigi.

Iom da membedaŭro atakas lin pri la imago de sia senviva kaj malvarma korpo. Kiel plendus la patrino pri la perdita vivo de sia plej juna filo!

Ĉe tiu penso disŝiriĝas la ludo de liaj malhelaj imagoj. Li skuiĝas kaj mehanike elprenas la retojn de la stangoj. Li finis sian laboron, ĝemante li volvas la reton. Li estas nun sola. La suno longe jam malaperis, kaj la krepusko de la malfrua somervespero rapide kaj sensone kuŝiĝas sur la pejzaĝon.

Li kunmetas la stangojn kaj volas surŝultrigi ilin. Lia rigardo direktiĝas al la riverego laŭ liaj piedoj subite fiksiĝas sur la tero. Ĉu mistifikas lin aperaĵo? Ĉu ne ĵus antaŭe li en siaj pensoj vidis sin mem rigida gliti sur la akvo? Kaj nun la trovo-
lema fantazio fakte ŝajniĝas homan korpon, kiu divas rante en la akvo kaj malrapide ondiĝas al la bordo. Eble estas nur breto aŭ lignaĵo? Andras disigas la branĉojn de la salikoj kaj proksimiĝas.

Fakte estas homa korpo, kiu ankoraŭ duone

ĉirkaŭbrakita de la akvo kuŝas en la sablo de la bordo. Estas virino. Blua, duone disŝirita vesto gluiĝas sur ŝia korpo kaj en ŝiaj blondaj haroj lignopeco kaptiĝis.

Senmove Andras fiksrigardas la mortintinon. Ŝi certe ne troviĝis longe en la akvo, ĉar ŝi tute ne aspektas grimaca. Ŝi ankoraŭ estas juna, eble samaĝa kun li, kaj ŝiaj okuloj iom malfermite rigardas, kvazaŭ ili malkontentaj mirus pri io.

La akvo iomete levas ŝian rondan, palan brakon, impresas kvazaŭ ĝi moviĝus kaj Andras klinas sin, por pli bone tiri ŝin al la bordo. Li scias, ke nun multaj vilaĝanoj alie agus! Ili sekrete ĉirkaŭenrigardus, kaj puŝus la kadavron, por ke ĝi fornaĝu. Jes, tio ofte okazas, sed ne pro krueleco, aŭ ne respekto, estas la malriĉo kaj mizero, kiu devigas la homojn tiel agi. Estas vere, ke oni tion oficiale malpermesas, kadavro devas esti akceptata kaj entombigata tie, kie ĝi elakviĝis, sed ekzistas tiel multaj sennomuloj, pri kiuj neniu zorgas plu kaj ili poste devas esti entombigitaj per rimedoj de la komunumo. Dio estas grandanima kaj la registoj troviĝas malproksime. Se oni tian mortinton denove forpuŝas, povas esti, ke ĝi albordiĝas en iu riĉa komunumo aŭ eĉ en iu urbo, en kiu la homoj posedas pli multe da mono.

Jes, tio ofte okazas, sed Andras ne kapablas nun tiel agi. Li estas profunde timigita kaj impresita, li eltiras la mortintinon tute, por ke ŝi ne povu plu esti atingata de la akvo. Poste li deprenas sian ĉapon. Nun li devus preĝi por ŝi, sed li ne kapablas. Multaj demandoj batalas en lia kapo.

De kie ŝi venis kaj kial ŝi elektis la morton? Ĉu ŝi havis sekreton, kiun ŝi ne volis komuniki al aliaj, ĉu ŝi malbone vivis aŭ ĉu ŝi akcidentis? Ĉu ŝi estis ankaŭ tiel malfeliĉa kiel li? Tiel malfeliĉa? Andras subite hontas kaj murmuras kvazaŭ defendon. Eble ekzistas pli teruraj, pli neelteneblaj aferoj ol tiuj, kiuj premas lin? Eble ŝi ĝuste venas el tiu grandurbo, en kiu li deziris vivi?

Pro kio ŝi povis rezigni la vivon? Ne, ne, devis esti akcidento! Se oni estas tiel juna kaj beleta, tiam oni volonte vidas flori la arbojn, migras en somervespero tra la kampoj kaj ridas kontraŭ la vizaĝo de la zorgoj. Devis esti akcidento, pensas Andras bedaŭre kaj senvole. Li jetas malhelan rigardon al la riverego. Eble ĝi ekkaptis ŝin rapidege kaj kruele kaj kuntiris ŝin kontraŭ ŝia volo en la nekonatecon.

Li eĉ ne rimarkas, ke la ĵus antaŭe sentita, ludema dolĉo de liaj imagoj pri la propra morto abrupte ŝanĝiĝis al defendo. Li ankaŭ ne rimarkas, ke li du paŝojn malantaŭen iras kaj ke io simila al dank sento en li ekkreskas.

La vespervento leviĝas, glitas super la akvo, movas la foliojn de la arbustoj, la pendantaj branĉoj de la salikoj flustras kaj susuras. Estas kvazaŭ la kvieta silento pleniĝus de io sekretplena kaj vivanta.

Io ekkaptas la koron de Andras kaj fluas tra lia korpo. Subite li rapidas, iras al siaj iloj, ŝultrenlevas ilin. Li faras tion sen ia plua rigardo returnen, ĉio en li admonas al foriro, al hastado. Estas jam malfrue kaj li devas plenumi nun sian devon, iri al la vilaĝestro kaj raporti, ke virina kadavro albordiĝis en la golfeto ĉe la salikoj.

Malantaŭ li susuregas kaj gargaras la akvo. Li entiras la kapon kaj rapidpaŝas. Eĉ ne unu el liaj posttagmezaĵaj pensoj revenas, io kreskas interne en li kaj ĉiam pli fortiĝas. Estas ne klarigebla ĝojo, kiu nun kaptas lin. Pensante je la kunesto kun la mortintino, li hontigite volas rifuzi tiun senton, ŝajnas al li kvazaŭ maljusto, sed li ne povas malhelpi, ĝi pleniĝas lin ĝis en la fingropintoj.

La sonorilo de la vilaĝpreĝejo sonorigas sian ĉiuvesperan kanton. Ĝi tintas hele kaj fervore: venu, venu, ĝi vokas, kaj Andras levas la kapon, lia malfermita buŝo profunde enspiras la freŝan vesperaeron. En la imago li vidas la patrinon starantan ĉe la kuirforno kiel ŝi turnas la kapon al la pordo, salutante lin per la rideto de siaj afablaj okuloj. Li aŭdas la klakadon de la teleroj, la bojon de la blanka hundo. Bruetoj de la ĉiutago, delikataj bruetoj de la vivo atakas lin. Malsato ekkreskas en li, vere malsato, kaj li jam antaŭsentas la guston de la rostita, varmega fiŝo sur la lango.

Kaj li saltas, plena de novaj sentoj, kun la ardego de sia juneco, rapide, kvazaŭ li devus postlasi ion ne kompreneblan, minacantan kaj jam duone forgesitan.

La Tempo Pasas

Rosalía de Castro
(1837-1885)

Horo post horo, tago post tago,
inter la ĉielo kaj la tero, kiuj tenas
eternajn deĵorojn,
kiel torento, kiu plonĝadas,
pasas la vivo.


Reinspiru en la flor' la parfumon
post ĝia velkado;
de la ondoj, kiuj kisas la strandon,
kaj uno post uno kisinte ĝin forspiras,
asimilu murmurojn kaj plendojn,
kaj sur la platojn el bronz' giloŝu la harmonion.

Tempoj, kiuj pasis, ĝojaj kaj tristaj,
nigraj turmentoj, dolĉaj mensogoj,
aj! sur kion vi rastis la spurojn?
Sur kion, koro mia?

El la hispana trad.

E. Hero

Sceno el „Faŭsto”



En „La Nova Epoko” (Moskvo), oktobro 1922, aperis kvar scenoj el la „Faŭsto” de Goethe, tradukitaj de Bela Manto (pseŭdonimo de Boris Mirski), kiu mortis jam en 1919. Kiam oni konsideras la ĝeneralan nivelon de la poezia tradukarto antaŭ 1919, la freŝa vigleco kaj teknikaj eltrovoj de tiu ĉi traduko estas vere ŝrapaj. Tial ni represas ĉi tie unu el tiuj scenoj, memore al unu el niaj pioniroj sur la poezia kampo.

Nokto

(Faŭst sidas maltrankvile en sia fotelo ĉe la pulto, en malvasta gotika ĉambro kun alta arkaĵo.)

Faŭst:

Filozofio! Havu ĝin!
Scienco jura, medicin',
Ho ve, teologia tent',
En kiun pens' enstudis sin, —
Mi ĉion lernis kun atent'.
Nun, kompatinda malsaĝul',
Mi staras post ĉi vana streĉ'
Ol iam malpli saĝa eĉ. —
Magistr' nomiĝas mi, doktor',
Kaj dum dek jaroj de fervor'
Maldekstren, dekstren, — laŭ okaz', —
Disciplojn *) tiras je la naz',
Kaj fine venas al konkludo,
Ke vana estas ĉiu studo.
Bruligas koron tiuj rememoroj.

Jes, vere, mi estas pli inda, laŭ moroj,
Ol ĉiuj magistroj, skribistoj, doktoroj:
Ne tranĉas min duboj, skrupuloj pri vero,
Timigas nek diablo, nek tuta infero.
Kaj tial neniam mi ĝojon atendas;
Neniam mi veron ekkoni pretendas,
Kaj eĉ en la penso ne volas prospekti,
La homojn bonigi aŭ ilin direkti.

Ĉe mi neniuj monda don':
Nek bon', nek mon', nek iu kon'.
Ne volas vivi hundaĉido
Kiel mi vivas; al magi' do,
Mi min transdonis en esper',
Ke sensirmiĝos el mi ver';
Ke rajtos mi, se mi bezonas,
Ne diri kion mi ne konas;
Ke mi esploros kun efik'
La universon ĝis radik', —
Konjektos ĉiujn kreofortojn,
Ne dialektos nudajn vortojn...

Ho se vi trovus, lunorond',
Min lastan fojon en ĉi mond'!

Vin dum laboroj sen rezult'
Mi vidis super mia pult'; —
Vin super libroj tie ĉi,
Amik' malĝoja, vidis mi!

Ah! Se mi povus al montar'
Senzorge flugi en krepusk'
Kun elfoj en kavernembusk',
En ros' min bani dum maten'
Libera de l' scienca pen'!

Ĉu sidas mi en ĉerk' sen bru'?
Ho malbenita fia tru',
En kiun suna lumo eĉ
Penetras nur kun pen' kaj streĉ'!
Fenestrojn baras libromur',
Dismordas kiun vermoj dum,
Kaj ĝis plafono ŝtopas nur
Pec' da papero, polv' kaj fum'.
Kaj ĉie glasoj en la rond',
De la prapatroj sola rest',
Da instrumentoj plena nest', —
Jen estas mond'! Jen via mond'!

Kaj vi demandas, kial kor'
Veas en brust' kun tia prem',
Kaj kial viglas la dolor'
En ĉiu mov' kaj vivotrem'? —
Anstataŭ la natur' kaj lum',
En kiun homon metis sort',
Ĉirkaŭas vin nur ŝim' kaj fum'.
Skeletoj, ostoj, ripoj, mort'!

Do supren! For el tiu kript'!
Kaj tiu libro de mister',
De Nostradamus manuskript'
Vin gvidu dum la sorĉaper'.
Komprenos vi en astrokur'
Kaj se demandos vin natur',
En streĉ' potenca de l' ekscit'
Ekkonos lingvon de spirit'.
La seka penso kun obstin'
Nun sondu en ĉi simboluj'...
Spiritoj! Vi ĉirkaŭas min,
Se aŭdas vi, respondu tuj!

(Li malfermas la libron kaj rimarkas la simbolon de la Makrokosmo.)

Kia sopir' en tiu ĉi aspekt'!
Ĝi rulas sin tra mia perceptilo
Kaj portas sin tra mia intelekt'!
En ĉiu nerv' ekardas vivobrilo!
Ĉu tiun signon sendas Di',
Por koron trankviligi provi
Kaj furiozon de l' pasi'
Por er' da ĝojo for demovi?
Ĉu volis en mistera kre' li
Sekretojn de l' natur' ĉirkaŭe for dispeli
kaj kreofortojn malmanteli?
Ĉu mi diiĝis? Lum', brulardo en okul'!
En tiu ĉi simbolo pura

Antaŭ animo, kiel en spegul',
Rebildas sin la fort' natura, —
Kaj mi komprenas vorton de saĝul':
„Spiritmond' — ne sub ŝlosilo:
Ŝlosita estas nur la kor'! —
Ho banu bruston vian, filo,
En hela brilo de l' aŭror'!”

(Li ekzamenas la simbolon.)

Al Tut' eskortas eroj sin,
Fort' al alia sin aranĝas,
Malsupren, supren portas sin
Kaj orsitelojn interŝanĝas!
Kaj sur flugiloj de mistero
Penetras el ĉiel' al tero
Kaj bele montras sin en ĉiu mondapero.
Kia spektaklo! Sed spektaklo nur!
Kiel diveni vin, senlimo de l' natur'?
Vin, fontoj de l' estad', vin, kiuj vivon
spiras, —

El kiuj tuta esto iras,
Sur kiuj pendas tero kaj ĉiel',
Kiuj por mia brusto estas cel'? —
Vi ŝprucas, nutras vi: mi vane vin
sopiras!

(Kontraŭvole turnas la libron kaj ekvidas la simbolon de la Tergenio.)

Alie min inspiras tiu vorto!
Vi, Tergenio, ĉarmas min:
Mi sentas: kreskas mia forto
Kaj ardas, kiel nova vin',
Kuraĝ' aperas al tolero
De l' veo kaj malve' de l' tero,
Al lukt' kun uragankolero,
Kaj al kuraĝ' dum ŝipdanĝero.

Nubumas super mi!
Lun' estas jam sen lum'! —
Lamp' malaperas!
Radioj ruĝaj! Fum'!
Ĉirkaŭ mi saltas io! — Spiras
Sur min teruro de l' arkaj'
Kaj kaptas min!
Spirito elpreĝita, mi vin sentas, —
Senmanteligu vin!
Ha, kiel koro sin turmentas!
Senmanteligu vin!
Al nova korekscit' — fermento
Maltordas sin la tuta sento!
Al Vi sin tiras koro en frenezol!
Vi devas! devas! — eĉ por vivoprezol!

(Kaptas la libron kaj mistere alparolas la formulon de la Spirito. Aperas ruĝnuanca flamo, la Spirito montriĝas en la flamo.)

Spirito:
Kiu min vokas?

Faŭst (turnita for):

Ega vid'!

Spirito:

Vi kun potenco min altrenas,
Min logas de l' ciela sid',
Kaj nun...

Faŭst:

Ve! Mi vin ne eltrenas!

Spirito:

Pri mia vid' vi preĝobstinis,
Pri mia voĉo kaj aspekt';
Preĝego via min inklinitis:
Mi venas! Jen! — kia kuraĝdifekt',
Kia vin kaptis tim', supera intelekt'
Kie l' anima vok', ho donu vi respondu!
Kie la brust', kreinta en si mondon!
Kie vi, Faŭst', kies ektondris vort',
Kiu al mi per ĉiu estofort',
De mia spir' ventita, sin alpremas?
En ĉiu vi profund' de l' vivo tremas,
Timema vermo! Terinfan'!

Faŭst:

Vin timi, kreitaj' de brulo?
Mi — Faŭst'! Mi — via egalulo!

Spirito:

En vivondar', en ago-uragan',
En ondoport'
Mi teksas sen ekstar'!
Kaj nask', kaj mort',
Eterna mar' —
Jen mia far'!
Teksante la veston vivantan de Di'
Sur stablo zumanta de l' temp' kreas mi.

Faŭst:

Ĉirkaŭiranta mondon malproksiman
Spir' kreema! Mi egalas vin!

Spirito:

Egalas vi spiriton samaniman,
Ne min!

(*Malaperas*)

Faŭst (sola):

Ne vin?
Do kiun?
Mi sambild' dieca! Mi ne egalas vin!

(*Oni frapas*)

Ho mort'! Mi scias: Famuluso fia!
Ĝoj' fluas for per unu rul':
Plenecon de feliĉo mia
Detruas seka trudemul'!

(*Eniras Wagner en hejma robo kaj nokta kuŝo kun lampo en la mano. Faŭst malkontente sin turnas.*)

Wagner:

Pardonu! Aŭdis mi deklamon;
Vi certe legis grekan dramon. —
Profitu mi el tiu arto rava:
Deklamosci' nun estas scio grava!
Ĝin ĉiuj — aŭdis mi — tre, tre laŭdinda
trovas:
Komediante instrui pastron povas.

Faŭst:

Se pastro mem komediante estas!
De temp' al temp' okazas tia ag'.

Wagner:

Ha! Se en ermitej' ni ĉiam restas
Kaj helan sunon nur en festotag'
Kaj perbinokle nur sukcesas vidi, —
Ĉu per konvink' ni povas mondon gvidi?

Faŭst:

Ne, se el fund' ne iras ĝi esenca!
Se el anim' ne ŝprucas ĝi kun am'
Kaj kun plezuro prapotentca
Ne vekas ĉies koron jam,
En fuŝ' vi sidas kaj malfam'!
Raguon brogos vi konstante
El la proviz' de fremda fest',
Mizeran fajron disblovante
El amaset' da cindrorest'.
Kaj poste kia miratest'!
Jen buba kaj simia moro,
Se plaĉas ĝi al via gust'! —
Ne ligos koron vi al koro,
Se la konvink' ne iros mem el brust'!

Wagner:

Jam estas ĝoj' de l' oratoro
Mem la paroloperaci';
Mi sentas ĝin, sed mem ne alprogresis mi.

Faŭst:

La justan ĝojon serĉu li!
Sen granda arto kaj ruzem'
La rekta saĝ' kaj vera sci'
Pri si jam oratoras mem.
Ĉu devas vi post vorto kuri,
Se vi gravajon volas nuri?
Brilanta via elokvent',
Per kiu vi homaron turnedotas,
Senfrukta estas, kiel pluva vent',
Kiu aŭtune en folioj frotas!

Wagner:

Ah Dio! Longa estas art',
Sed tre mallonga estas vivo!
En mia kritikemaktivo
Tre ofte estas kap' en timo kaj malfart'.
Ni sentas bone penopezon,
Kiu kondukas nin al la prafont', laŭ fam!
Ĉar antaŭ ol atingi vojomezon
Unu veulo mortas jam...

Faŭst:

Ĉu simpla pergamento *) al vi ŝajnis
La puto, kies trink' sensoifigas nin?
Sensoifiĝon vi ne gajnis,
Se el la propra mens' vi mem ne
ĉerpis ĝin.

Wagner:

Pardonu! Estas granda ĝuo
En menson de la tempofluo
Transporti sin, rigardi kun admir',
Kiel meditis iam granda vir',
Kies mediton ni disvolvis mem en fluo.

Faŭst:

Ho jes, disvolvis! Alten ĝis la steloj! —
La tempo de l' pasint', laŭ bonaj diroj,
Estas libreg' malantaŭ sep sigeloj.
Kion vi nomas do spirit' de l' epokiroj,
Estas spirito mem de l' viroj,
En kiu nur rebrilas epokceloj.
Sed ĉu ĝi estas aj' malbona?
De ĝi ni turnas for rigardon kun malŝat'.
Nur rubbarel' kaj ĉambro porĉifona
Kaj, maksimume, ag' de reĝ' aŭ ŝtat'
Kun trafaj pragmatikprincipoj
Sufiĉaj estus jam por ĉies pupaj lipoj.

Wagner:

Sed univers'! Spirito, kor' de l' hom'!
El tio ĉi ni povas ion koni.

Faŭst:

Sed kiu idon nomus laŭ la nom'!
Kaj kiel koni volas vi ordoni?
Malmultajn do, kiuj post longa sond'
Ereton nur da homa kon' ekregis,
De popolaĉ' ne gardis ĝin, ne flegis
Kaj stulte ĝin, pro plena kor', maltegis, —
Per kruĉopun' kaj brul' mortigis mond'.
Sed nun, amiko, interrompu ni;
Mi petas vin: la nokt' nun devas roli.

Wagner:

Volonte tutan nokton viglus mi,
Por tiel vin science alparoli.
Sed morgaŭ vin en tag' de Pasko Dia
Permesu pridemandi, majstro mia. —
Mi kun fervor' kaj am' ekstudis
homan scion,



Mi multe konas jam, — mi volus
koni ĉion.

(Foriras.)

Faŭst (sola):

Ho kiel iluzi' ne krevas en kranj',
Kiu alglui sin al banalajoj provas,
Trezorojn fosas kun pasi'
Kaj ĝojas jam, se pluvovermojn trovas!

Cu rajtas homa voĉo tie ĉi,
Kie ĉirkaŭas min de l' penso la medi',
De l' menso la profunda maltrankvilo
Ripozon mian trudi per babilo?
Sed — ah! — kiel mi dankas nun al vi,
La plej mizera terofilo:

De malesper' vi ŝiris min sen sci',
Kvankam al saĝ' minacis jam perejo, —
Ah! Tiel ega estis la vizi',
Ke antaŭ ĝi mi sentis min pigmeo!

Mi di-rebild', kiu sin sentis jam
Spegulo mem de la eterna vero
Kaj ĝuis jam en klar' kaj ĉielflam',
Kaj malparenca sentis sin al tero;
Mi, mi pli ol kerub', kies aroĝis fort'
La nervojn de l' naturo tratorenti,
Kreantan diar-eston sian senti, —
Mi, di-rebild', kiel mi devis penti!
Min lancis for nur unu tondra vort'.

Egali vin ne rajtas mi aroĝi:
Se mi posedis forton vin allogi,
Do por reteni vin jam mankas fort':
En tiu ĝumomento di-parenca
Mi sentis min malgranda kaj potenca,
Sed vi min puŝis for, senkondolenca,
Al la malcerta homa sort'.

Kiu instruas min? Kion eviti plu do?
Ĉu al prempel' mi min subigu re?
Ah mia ag' ne malpli ol pentrudo
La vivorbiton ja kunprenas nur, ho vel!

Al plej perfekta, kion mens' ricevas,
De mala ŝtof' sin gluas certa kvant':
Se ĝis la bon' de l' mondo ni nin levas,
Pli bona ŝajnas tromp' kaj vant'.
Kaj sent', el kiu venas vivvaloro,
Pereas en terfuŝa foslaboro.

Ke fantazi' grandigu sin sen lac'
Kaj portu sin al la eternopordo,
Sufiĉas jam al ĝi malvasta spac',
Se ĝoj' sur ĝoj' dissaltis en vivtordo.
Zorg' nestas sin eĉ en profunda kor',
De ĝi sin levas iu kaŝdolor',
Ribeke tajdas ĝi, estas ripoz' senpova;
Ĝi ĉiam kovras sin per iu masko nova:

En formo de la hejma ben'
En tiu zorgo sin prezentas:
Kiel edzin', infan', dom', korto, ĝi
sin sentas.

Ponardo, akvo, flam', venen', —
Tremigas ĉiu fenomen'.
Kaj kion ni ne perdis, — jen
Ni, kiel perdon prilamentas.

Ne diegalas mi! Sent' estus tro giganta!
Egalas mi al verm', la polvon traboranta!
Dum en la polv' mordante ĝi sin ĝermas,
Pland' de migrant' ĝin premas kaj
ekstermas...

Ĉu ne per polv' kunpremas min ĉi mur'?
Ĉu ne la polvon mia viv' signifas?
Ĉu la rubej' ne per ruberoj nur
En tiu tinemondo nin kunĉifas?
Ĉu trovos mi en ĝi, kion mi manki
sentis?

El libroj ĉu refoje legu min,
Ke la homar' tutloke sin turmentis

Kaj feliĉulon do malofte havis ĝi?
Ho kial do rikanas vi, kranj'?
Ĉu tial, ke cerb' via foje staris
En embaras', kiel la mia nun? —
Ke tagon ĝi senzorgan serĉis, flaris
Kaj en krepusk' kaj penmaloportun'
En vana serĉ' de l' ver' mizere ĝi eraris?

Vi, instrumentoj, certe mokas min
Per ĉiu ark', rul', rado kaj gratiloj!
Ĉe via pord' mi staris ĝis la fin',
Kaj vi... vi devis esti la ŝlosiloj!
Vi estis bonaj, sed... ne falis la rigiloj...
Senvualigi sin ne donas la natur':
Mistera estas ĝi en mez' de tagobriloj, —
Kaj kion al spirit' ĝi ne donacas nur,
Mem ne eltordas ni per ŝraŭboj kaj
leviloj.

Mi vin, ho ilaraĉ', delonge ne manumis;
Vi staras, ĉar al paĉj' la servon vi
plenumis:

Vin, paperrul' la lampo ĉirkaŭfumis,
Malĝoja tiu lamp', dum staris ĝi sur pult'.
Por kio ĝuis mi el mia havmalmult'
Kaj fordiboĉi ĝin pli bona — ve! —
ne kredis?

De l' patroj kion foje vi heredis,
Tion nur tenu vi por diri: „mi posedis“!
Kion ne uzas ni, nur estas pezo, prem':
Nur tiom la moment' utili povas mem,
Kiom mem kreis ĝi kaj al ni mem
nur cedis.

Sed kial la rigard' al tiu lok' fiksiĝas?
Ĉu tiu flakoneto-magnet' por la pupil'?
Kial kvietaj hel' en la okul' naskiĝas,
Kvazaŭ en noktarbar' min kovrus
lunobril'?

Vi, sola flakoneto! Mi vin benas!
Kun pi-respekto vin mi nun deprenas:
En vi adoras arton, spriton mil!
Vi, kvintesenc' de ĉarmaj dormigiloj,
Vi, kvintekstrakt' de la venensubtiloj,
Al via majstro amon montru vi!
Mi vidas vin — mildiĝas la doloro,
Mi prenas vin — etiĝas pen' de l' koro,
Fortajdas de l' spirit' la fluotord'
Al plena mar' min io for ekrulas,
Sub la pied' spegule ondoj brulas,
Min nova tag' al nova logas bord'.

Svingante je malpeza flugilparo,
Al mi sin portas fajra faeton!
Mi estas preta! Venu, sen preparo:
Tra la eter' penetros ni, sen staro,
Al pli perfekta agoreĝion!
Ho, tiu alta viv', tiu dieca ĝojo!
Ankoraŭ vermo, ĉu mi indas ĝin?
Nun, sen hezit', al ĉarma tera vojo
Vi turnu vin kuraĝe per la spin!
Deŝiru nun la pardonon per eksku' vi,
Kiun kun ĝoj' hom' preterglitas! For!
Jam estas tempo per la agoj pruv',
Ke al di-alt' egalas vir-valor'!

Antaŭ malluma grof' vin ne ŝancelu,
En kiu fantazi' sin juĝas al sufer', —
Al tiu transirejo celu,
Je kies buŝmalvast' nur flamas la infer'!
Al tiu paŝ' decide vi kuraĝu,
Kaj, se ekzistas risk', en la Nenion naĝu.

El via ing' en tiu ĉi okazo,
Nun venu vi, kristale pura vazo,
Pri kiu longe mi ne pensis jam!
Briligis vi de l' patroj la toastojn,
Vigligis vi malvigle-gravajn gastojn,
Dum ili sin regalas kun gastam',
De artobildoj riĉornam'!

Laŭ dev' drinkista, rime mi vin gloras,
Vin malplenigas nun kaj rememoras
Pri unu nokt' de juna pasiflam'.
Jam al neniu dum akcepto gasta
Mi montros vin kun spritparol' toasta:
Ebrüganta suk'! Vi brilas jen,
Per bruna flam' malblonde vi reflektas.
Mi mem vin faris, mem elektas,
El tuta kor' kun ĝoj' mi vin direktas,
Ho lasta drink', renkonte al maten'!

(Portas la vazon al la buŝo.)

Sonorilaj sonoj kaj kantoĥoroj.

Horo de Anĝeloj:

Krist' sin renaskis!
Ĝoj' al mortema gent',
Kiun pekema tent'
Forte kunfaskis.

Faust:

Ho kia bru' per laŭtaj himnomiloj
De l' buŝ' potence vazon tiras for?
Ĉu vi al mi anoncas, sonoriloj,
Pri veno de l' unua paskohor'?
Ĉu kantas vi ĉi kanton melodie,
Kiun en tomba nokt' anĝeloj kantis ie,
Al nova lig' jurkanton de fervor'?

Horo de Virinoj:

Per sanrimedoj
Ni sanigadis lin,
Kun fidelkredoj
Ni kuŝigadis lin;
Tukojn, ĉarpion
Fari nur povis ni. —
Ah! Kriston-Dion
Plu jam ne trovis ni...

Horo de Anĝeloj:

Krist' re-malmortis!
Kore amanta Di', —
Al sopiranta Li,
Al suferanta Li
Amon nur portis.

Faust:

Kial kun forto kaj mildec'
Vi serĉas, himnoj, min en mez' de
polv' kaj tedo?

Vi iru al pli milda homospec'!
Senditojn aŭdas mi, sed mankas al mi
kredo;

De kredo la infan' — miraklo, mirindec'.
Sed ne kuraĝas mi al tiu celi sfero,
El kiu sonas nun la vigla melodi':
Al ĝi de junulec' al kutimiĝas mi
Kaj min revokas ĝi al vivo kaj al tero.
Min kisis foje Am' de la ĉieloblu',
En mezo de silent' sabatagorda, —
Kaj de sopirosent' eksonis kant' senborda,
Kaj estis fajra preĝ' por mia ĝu'.
De la sopir' nekompreneblaj ĉarmoj
Tra la herbej', arbar' migrigis min
sen lim',

Kaj inter mil ardantaj larmoj
Mi novan mondon sentis en anim'.
Pri ludoj de junec', pri tiu ĉi kutim',
Pri de l' printemp' libera ĝoj' kaj sano
Anoncas tiu kant' en kaŝ':
Retenas min memor' kaj sento de infano
De l' lasta serioza paŝ'.
Ho pretersonu do vi ĉielkantaj ĉarmoj!
Re' tenas min la ter', re' ŝprucas'
miaj larmoj!

*Horo de disciploj: *)*

Enterigita jam
Li en brilbelo
Iris en hela fam'
Al la ĉielo
Venis en estplezur'
Al kremistero Li;
Ah! Por sufero nur
Vivas sur tero ni!
Dum Li id-riĉon do

Lasis, — doloris Li;
Vian feliĉon do,
Majstro, priploris ni!

Horo de anĝeloj:

En mortopenoj
Levis sin Krist-Sinjur'.
El la katenoj
Ŝiru vin ĝoje for!
Al adorantaj Lin,

Al la amantaj Lin,
Al predikantaj Lin,
Al subtenantaj sin,
Frate nutrantaj sin —
Sin proksimigas Di'
Kaj helpas Li!

*) *disciplo; pergamento:* tiel en la originalo = *disciplo; pergamento.*

Pafado en Mallumo

„Ne eliru el la ĝardeno, Petro, Estas preskaŭ tempo por enlitiĝi; vi povas trovi sufiĉon por fari sen eliro.” La laca voĉo de Sinjorino Foset rediris la ĉiutagan, post-temanĝan ordonon.

Petro fortege malkonsentis kun la dua parto de la ordono. Iel tiu ĉi malkonsento senkonscie disfluigis sian influon sur la reston. Eĉ patrino devus scii ke estas multe pli ekscite ludi en la arbareto malantaŭ la domo. Tamen li jam ofte argumentadis senutile.

Senpripense, preskaŭ neeviteble li vagis al la fino de la ĝardeno. La ĝardeno estis longa, kaj tie li sentis sin kiel eble plej for de la domo. Tie la ribaj kaj grosaj arbustoj kreskis ĉifone kaj nezorgite, sufokitaj de la herbo kaj rumeksoj. Jen bona forestejo al kiu li ĉiam venigis siajn amikojn. Estis amuze ludi tie kun amikoj, sed nemulte kiam li estis sola.

Io moviĝis rapide sur la vojeto. Petro klinis sin metante sian fingron subite apud grandan ĝardenan araneon. Ĝi eklitis antaŭen denove. Petro tuj sekvis ĉiun fulmorapidan movon ĝis la kompatinda estaĵo, rampante malrapide pro manko de oksigeno, pli kaj pli malatentis lian puŝetantan fingron. Tiam finiĝis la ludeto. Petre ĉirkaŭrigardis por trovi ion pli ludindan. Merlo luktanta kun vermo, kiel maristo tiranta al ŝnurego, kaptis lian atenton. Petro rampis ŝtele tiudirekten, haltante tuj kiam ĝiaj globetsimilaj okuloj rigardis al li. Tio ĉi estas bona ludo, eĉ pli bona ol simila ludo kiun oni ludas ĉe la lernejo. Ĝi tamen havas diferencon: kiam la birdo vin vidas la ludo estas finita. Oni devas multe pli zorgi; la birdo ne kalkulas ĝis dek. Petro

jam atingis ĝis metro de la merlo kiam ĝi lin ekvidis. Kun susuro de flugiloj ĝi forflugis. Jen do. Kio nun?

Skrapetado kaj flustrado aŭdiĝis je la alia flanko de la alta muro kiu dividis la ĝardenon de la arbareto. Petro aŭskultis. Ankoraŭ aŭskultante li grimpis la malglatan, kalkŝtonan muron kaj ekrigardis zorge trans ĝin.

Kvar knaboj, iom pli aĝaj ol li, ŝajnis serĉi ion inter la arbustoj ne malproksime de li.

„Ho! Toĉjo!” Petro vokis al la plej juna el la kvar. „Toĉjo Preston, kion vi serĉas?”

La kvar knaboj suprenrigardis timigite, ĉirkaŭrigardis en surprizo kvazaŭ provante trovi de kie venis la voĉo, tiam, je la granda miro de Petro, ili forkuris panike inter la arbojn.

Ĉu tiuj ĉi estas la ŝtelĉasistoj pri kiuj Farmisto Barden jam parolis al la patrino nur hodiaŭ post-tagmeze? Sen tre klara ideo de tio, kion li intencas fari, nek fakte el kio konsistas ŝtelĉasisto, sed nur ke iu tre kontentiĝos pri li se li eltrovos ĉion pri la afero, li decidis sekvi la knabojn.

Li transrampis la likeno-kovritan muron, senzorge forbrostante la blankan ŝimopolvon de siaj ĉemizo kaj mallonga pantalono, kaj ekkuris. Preter la altajn ruĝ-ŝelajn pinojn kaj trans la molan, cedantan tapiŝon de folioj li kuris kiel sciuro. Oni lin dankos ĉehejme, li pensis; la patrino povos sciigi al Farmisto Barden; kaj estas amuze ĉasi; li estas ĉasisto.

Liaj pensoj galopis dum li kuris, sed la kvar knaboj jam malaperis. Li ekvidis ilin tra skreno el junaj aveluoj. Petro malalte kaŭris, kaŝante sin: Ili marŝis nun kaj ŝajnis ridi kaj ŝerci inter

si dum ili sekvis la neklaran vojeton.

Timante ilin perdi kiam iom poste ili malaperis ĉe angulo en la vojeto Petro eksaltis antaŭen, kaptis la piedon en arboradiko kaj falis krakige en densejon inter rubusdornojn. Li restaris tuŝante sian per dornoj gratitan brakon, nerimarkante sian ŝiritan ĉemizon.

Li kuris laŭ la vojeto, kiun la knaboj jam sekvis, sed kiam li atingis la angulon ili denove ne estis videblaj. Nu li povos pluiri, eble li ilin atingos.

Subite aferoj ekokazis; iu lin ĉirkaŭbrakis de malantaŭe.

„Mi havas lin!” kriis laŭta voĉo.

„Blindumigu lin, Niĉjo. Tio ĉi sufiĉos,” kriis alia. „Ligu ankaŭ liajn brakojn”.

Saketo odoranta je grio estis maldelikate kaj strikte volvita ĉirkaŭ lian kapon kaj ŝnureto ĉirkaŭ la manradikojn. La polvo de la sako eniris lian nazon; li ternis.

„Ne dolorigu la aĉuleton.” Estis la voĉo de Toĉjo Preston. La iom sarkasma tono donis al Petro fortan ŝokon. Toĉjo Preston ĉiam tiom bonkonduktis kaj komplezis kiam Petro kun la patro vizitis ties patron en la butikoj.

Oni ne donis al Petro multan tempon por pripensi la aferon. Knabo kiu havis pli basan voĉon ol la aliaj diris:

„Venu, ruĝkapulo. Ni punos vin pro via spionado.” Estis en lia voĉo tono kiu diris: „Tiu ĉi estas nur ludo.” Petro sentis sin pli trankvila.

„Ho! Vi dolorigas mian brakon,” li elvokis kiel eble plej laŭte.

„Se vi ne silentos mi dolorigos iom pli,” iu sible diris en lian orelon. Plua ektiro al lia brako substrekis la minacon.

„Uuŝ!” Al Petro, ĉio ĉi estis parto de la ludo, li sentis sin sur pli firma tereno. „Kion vi intencas fari al mi?” Li petis en malpli laŭta voĉo. Malgraŭ ĉio, ĉiu kaptito havas la rajton scii sian sorton.

„Pendigu vin de la velstango, mi supozas,” aŭdiĝis en la baseca voĉo.

„Ne stultu, idioto, ni ne ludas piratojn,” admonis Toĉjo Preston. Ĉiu marŝis silente dum longa tempo. Ofte ili ŝanĝis direkton kaj laŭsone ili marŝis unu post la alia. Unu knabo tenis la ligitajn brakojn de Petro de antaŭ li. Alia, kun la mano sur la ŝultro de Petro, gvidis de malantaŭe. Petro ekpensis kiel terura estus la blindeco. Kompreneble blindulojn oni ne devigas marŝi tra arbarojn, li pensis al si konsole, tamen estus neniu tie por helpi se ili stumblus. Tio estas kompreneble se ili iam ajn troviĝus en arbaro. Blinduloj devus resti ekster arbaroj. Li neniam antaŭe pripensis pri tio. Kiom al ili mankas la ekscito? Kiom enua ilia vivo?

„Kaŝu vin!” Oni elvokis de antaŭe.

Oni puŝis Petron al unu flanko kaj sur la teron, dum voĉo siblis: „Li havas pafilon.”

Petro aŭdis nazspiradon de hundo kaj mallongan, duon-subpremitan bojon, kion silentigis sub-

voĉa, malafabla ordono. Peza piedbato de viro preterpase aŭdiĝis dum ĉiu kaŭre kaŝis sin.

Tuj kiam la viro jam pasis iu petis: „Ĉu li serĉas la perditajn bredporkidojn?”

„Pafilon li ne bezonus por tio, krome, jam ekmallumiĝas. Multe pli verŝajne li estas ŝtelĉasisto,” diris tiu, kiun oni jam nomis Niĉjo. „Tute flanke, kion ni faru kun ‚Ruĝkapulo’ tie? Ni ne povas lin preni plu, kaj estus senutile por ni reiri nun, ĉu ne?”

„O! Lasu lin liberiĝi. Li estas nur bubo,” diris la basa voĉo.

„Devigu lin promesi ke li ne plu sekvos nin,” aldonis la kvara.

„Mi promesas ke mi ne plu sekvos vin,” singultis Petro preskaŭ plorante.

Oni liberigis liajn manojn kaj forprenis la saketon de liaj okuloj. Oni jam diris ke ekmallumiĝis sed la fakto de la alvenanta nokto multe pli terurigis Petron. Ne atendante permeson li ekforkuris tuj kiam libera. Ekridego lin haltigis. Li rigardis demande al siaj persekutantoj.

„Vi venis laŭ la alia direkto,” ridis Toĉjo Preston, montrante preter sia dorso.

Sentante sin tre ridinda, sed provante ne aspekti tiel, Petro repasis la knabojn kaj ekkuris denove. Li sentis deziron plori sed neniu estis proksima kiu simpatius kun li. Li ne konis tiun ĉi parton de la arbareto. Kiam li jam ne povis vidi siajn lastatempajn kaptintojn li malrapidigis sian kuradon. La arboj staris pli dense tie ĉi. Vere ŝajnis pli mal-lume nun.

Antaŭ li la vojeto branĉiĝis. Petro haltis. Nun kion fari? Nu, ne utilus atendi. Unu estas same bona kiel la alia. La vojo dekstren aspektas pli difinita. Petro iris tien.

Li denove ekkuris. La „Bum-bum” de liaj piedoj sur la mola vojo ŝajnis esti pligrandigita kaj reĵetita al li de la arboj ĉirkaŭe. Iu ŝajnis kuri tra la arboj paŝo kun paŝo flanke de li. Denove li malrapidigis al marŝo. Estis nenio konata en tiu ĉi parto de la arbareto. Petro eksentis malesperon.

Subite li rimarkis la kapojn de altaj pinoj etendiĝantaj super la gracie delikatajn foliarojn de la



apudaj betuloj. Ili viciĝis oblikve al lia vojo. Kvan-
kam li konstatis sin apud la hejmo, Petro sentis
ian maltrankvilon kiam li lasis la vojeton por pli
rekte atingi la pinojn. Post mallonga kurado li
estis tie, tamen ne alta krudŝtona muro kun lia
ĝardeno kontraŭflanke atendis lin, nur malalta
heĝo kun kampoj, kiuj falis dekliviĝante al rivereto.

La kamparo tie ĉi estis tute nekonata. Ondo de
malvarma aero tuŝis lin. Li ektremis. Estis pli lume
en la kampo sed la arbareto estis pli varma. Li
elektis la malĝustan vojon. Nun li estas tute per-
dita. La arbareto aspektas ja tre mallume.

Petro supren rampis la herban dekliveton kaj
reeniris la arbareton. Ne utilis provi retrovi, do li
iris rekte antaŭen tra la interplektaĵon de kreska-
aĵoj, farante al si la propran vojon tra la arboj.
Tio ĉi estus amuza dumtage, nun ne estas. Petro
sentis soifon. Estis stranga premo en lia brusto
pro daŭra retenado de lia spiro dum aŭskultado.
Li puŝe trairis alian densejon kaj tuj resaltis en
teruro. Io graŭlis. Ĝi denove graŭlis, sed Petro
jam ekkuris. Estis laŭta muĝado kaj kralegado de
peza korpo moviĝanta tra la arbojn. Petro nun nur
konsciis pri la arboj antaŭ si kaj la proksimeco
de la bruo poste. Li ploris pro timo. Aŭdiĝis forta,
muĝadanta krio kiu, malrapide penetrante en lian
konfuzitan menson, formiĝis je vortoj:

„Petro! Pro la ĉielo, Petro! Kion vi ja faras tie
ĉi? Ĉesu kuri. Mi ne intencas malutili al vi. Estas
mi, Sinjoro Barden, Petro! Vere, kompatindulo, vi
estas en paniko.” De miro lia voĉo ŝanĝiĝis al bon-
koreco. „Kion do vi faras tie ĉi je la nuna horo?
Vi devus esti en la lito junulo.”

„Mi scias tion,” ĝemis Petro, pli memkompate
ol time nun ke li jam trovis amikon. „Panjo tre
koleriĝos pro mi.”

„Sed kial vi estas en tiu ĉi parto de la arbareto?”
La grandkorpulo demandis dum li prenis la manon
de Petro. „Via hejmo staras tute transflanke.”

„Knaboj el Kleton devigis min veni,” diris Petro
plorece, dezirante pli da simpatio sed kun lojaleco
al sia propra generacio kiu malpermesis denuncon.

„Sed kiel vi ludis kun ili?”

„Mi ne ludis, mi kredis ilin ŝtelĉasantoj kaj mi
sekvis ilin sed ili kaptis min.”

Farmisto Barden mallaŭte kaj bonkore ridis. Lia
granda mano donis al la mano de Petro fortan
premon de kompreno.

„Ho, ve! Tio ne estis justa, ĉu? Nu, ni ne be-
zonos longan tempon nun, Petro, Kion faris la
knaboj el Kleton en la arbareto?” La farmisto zor-
ge lasis la sennomecon netuŝita.

„Mi ne scias, Sinjoro Barden. Ili diris ion pri
bredporkidoj,” diris Petro. „Ili serĉis ion inter la
arbustoj kaj arboj, en la arbareto apud nia ĝar-
deno, sed ili forkuris kiam mi alvokis al ili.”

„Do vi konis unu el ili?”

„Je-e-e-s,” konfesis Petro iom timante pri kio

sekvos, mirante, kiel plenkreskuloj povas ĉiam
konjekti aferojn.

„Toĉjo Preston?”

La silento de Petro sufiĉe respondis al li kaj li
ne plu insistis.

„Do ili serĉis la premiitajn bredporkidojn?” Li
subridis. „Ili ja longatempe estus serĉintaj, mi
kredas.”

„Ĉu ne estas tiaj?” Ekkriis Petro iom nekon-
tenta.

„Nu, jes! Mi supozas ke jes, sed oni jam trovis
ilin. Tio rezultas el legado de tagjurnalaj raportoj;
memoru tion junulo.”

„Ho!... ja... jes!” nur povis respondi Petro. Li
tute pretis kredi eĉ ferakonton sed nun, rimarkinte
la familiarajn objektojn de la hejmttereno, li ko-
mencis maltrankviliĝi pri sia akcepto ĉehejme.

Subite la hundo, kiu ĝis nun feliĉe sekvis ilin,
ekbojis. Farmisto Barden haltis. Li silentigis la
hundon per grunto kaj al Petro ordonis:

„Malalten kaŭru! Restu senmove. Silentu!”

La haroj sur la nuko de Petro piketadis. Ĉu eĉ
farmisto pritimas tion ĉi?

Aŭdiĝis obtuza sono kaj klaketo, tiam ekster-
tera sopira sono. La mano de Farmisto Barden
tremis; li ŝajnis eĉ pli kaŭri. Petro ankaŭ tremis,
sed timis ion fari.

„KRAKI!”

La kralego de pafilo kun la eha rekrakado ŝajn-
is saltigi Petron de sur la tero. Farmisto Barden
lasis la manon de Petro; li antaŭen kuris; hezitis
momente, tiam sovaĝe saltis trans la heĝon. Li
frakase surteriĝis je la alia flanko kun krio. Sekvis
konfuzita miksaĵo de interbaraktado kun gruntoj.
Petro alrampis al la heĝo, disŝirata inter scivolemo
kaj timo.

La farmisto lin ekvidis kaj elkriis:

„Kuru Petro!— Diru al la patro... ke li venu...
Diru al li ke mi kaptis la ŝtelĉasiston.”

Petro ekiris sen plua peto. De malantaŭe li aŭdis:
„Estas senutile, Voks, mi ne liberigos vin, pli
bone vi restu kvietaj.”

Jam Petro elkuris el la arbareto. Li kuregis laŭ
la vojeto en malmultaj sekundoj. Kiakadante trans
la bulŝtonojn en la korto, li ĵetis sin en la kuirejon.

„Paĉjo! Farmisto Barden bezonas vin ĉe la supra
fino de lia fora paŝtejo; li jam kaptis la ŝtelĉas-
iston.”

Kun malŝarĝiĝo li vidis sian patron elkuri sen
plua rigardo en lia direkto. Tiam al la patrino li
diris: „Ho Panjo! Mi tiom timis.” Pro ia neklarig-
ebla kialo li ekploris dum li kuris al ŝi.

„Ho! Kia malbona knabo!” lia patrino nur diris
kaj ankaŭ ŝi ekploris.

Petro jam sciis ke li malbone agis, tamen iel li
komprenis ke la patrino tiom multe gojas lin vidi,
ke ne restas en ŝia koro spaco por kolero kontraŭ li.

Denis Williams

LA MIRAKLO DE LA ESPERANTO-POEZIO

Edwin de Kock

La poezio de la internacia lingvo estas tiom fakto kaj ĉiutaga fenomeno ĉe ni, ke, malgraŭ ĉia fanfaronado kaj fiero pri ĝiaj jam imponaj atingoj, ni ne rimarkas, kia miraklo ĝi estas.

Esperanto naskiĝis kiel sennacia lingvo, en cir-konstancoj, kiujn la kritikisto povus malhezite nomi tute kontraŭaj al la ekiĝo de poezio. Ĝi ne formiĝis naturleĝe, sed Zamenhof simple ellaboris ĝin kiel projekton: kaj eĉ la posta evoluo ne nuligas tiun fakton, precipe tial, ke ĝi nur sekvis la vojon por ĝi antaŭdestinitan. Do la lingvo ne konformas al la menskonturoj de ia ajn popolkolektivo, kiel ĉe la naturaj lingvoj, kaj ne emocie respegulas la psihon de homoj kiuj ne nur naskiĝis kun ĝi, sed ankaŭ estas la animposteuloj de longa vico da geviroj, mem muldintaj ĝin por la esprimado de intimaj sentoj. Ĝi ne estas la vortiĝinta spertajaro de gento el kies historio ĉiu triumfo kaj sufero, ĉiu pensostreĉo kaj stultaĵo aŭ ĉiu pulsobato lasis spurojn sur la komuna parolo. Mankas al ĝi la kutima fono de imagstimulaj fabeloj, patriotismo kaj pejzaĝaj kantoj, kiuj estas fonto de inspirado por naciaj poetoj, konsciantaj, ke tiuj aferoj apartenas al ili mem kiel valorega heredaĵo.

Estas ja vere, ke, pro ĝia vortstoko kunportanta multajn jam emociitajn spertnuancojn de la lingvaro provizintaj ĝin, Esperanto partoprenas iom en iliaj spertfonoj. Eĉ pli gravas tio, ke per ĝia interna ideo nia lingvo akiris propran etoson, kiu tre kontentige anstataŭas la spiritajn kvalitojn de la nacilingvoj. En ĝin transiras la sentaro, sentimentoj kaj imagaĵoj de la tuta mondo. Ĝi eĉ esprimas iun patriotismon, latente pli intensan ol tiu de ajna nacilingvo, nome la homaranismon, kiu estas malfalsa kaj tial ĝisfunda simpatio por la homa personeco mem, kun ĉiuj ĝiaj valoroj kaj dignaĵoj. Ĉirkaŭ internacia temaro kaj rasampleksa gamo da perceptoj la Esperanto-poezio per pena spertado ankaŭ jam kreis fantazistimulajn asociaciojn. Ĉi ĉio parte, kvankam ne plene, prilumas la miraklon de nia poezio, sed la fakto, ke oni povas klarigi ion ne necese forrabas de ĝi la miraklecon.

Kio estas tamen multe pli miriga estas tio, ke la poetoj de nia lingvo ne estis, kiel ĝenerala regulo, ĝis nun denaskaj esperantistoj. Estas strange, ke oni ankoraŭ ne komentis pri ĉi tiu aspekto de nia poezio, nek vere rimarkis ĝian eksterordinarecon. Preskaŭ ĉiu aŭtentika poeto verkanta en iu nacilingvo konas ĝin ekde la frua infanaĝo. Mi diras „preskaŭ“ nur pro tio, ke mi ne scias ĉion, kaj bone konscias pri la kapriceco de nia mondo, en kies grandega populacio oni povas trovi esceptojn al eble iu ajn alie reguleca vivfenomeno. Tiaj mal-multegaj esceptoj tamen ne difektas la validecon de ĝeneralaj konstatoj. Ĉiukaze mi persone ĝis nun neniam aŭdis pri homo, kiu iĝis eĉ mezbona poeto en nacilingvo kiun li ne lernis minimume dum la unuaj infanjaroj. Kompetentaj opiniistoj probable konfirmus la nocion, ke oni devas esti denaske dotita je lingvo por havi eĉ etan ŝancon de eventuala poeteco en ĝi.

Nun ni konsideru la aĝojn je kiuj kelkaj el niaj plej notindaj Esperanto-poetoj komencis lerni nian lingvon. La ĉi tiea tableto estas, kompreneble, ne-kompleta, pro tio, ke mi ne povis trovi la necesajn informojn por aliaj kiujn mi estus ŝatinta mencii. Ankaŭ la ciferoj ne estas absolute certaj, pro tio, ke mi devis ellabori ilin surbaze de datoj, t.e. naskiĝdato kaj datoj de esperantistiĝo, sen koni la precizajn tagojn aŭ eĉ monatojn de la koncernaj jaroj. Tamen, ne estas verŝajne, ke mi signiferaris en iu ajn kazo, tiel ke la efektivaj rezultoj restas praktike la samaj. Ili jen:

<i>Nomoj</i>	<i>Aĝo en jaroj ĉe esperantistiĝo</i>
A. Grabowski	20
K. Kalocsay	22
J. Baghy	20
N. Hohlov	14
E. Mihalski	14
M. Boulton	25
W. Auld	13
B. Ragnarsson	17

Oni tuj rimarkas, ke el ili duono jam atingis aŭ preterpasis la 20-an jaron antaŭ ol eklerni Esperanton. La aliaj estis jam viriĝantoj, minimume preter la plej esence formaj jaroj. Ankaŭ estas frapa fakto, ke la aĝo ĉe l' eklerno ne efikas por determini la rangon de la koncerna poeto. Oni ne povas, ekzemple, engrupigi ilin ekde la plej juna ĉe esperantistiĝo ĝis la plej maljuna, pretendante, ke tiuj, kiuj komenciĝis plej malfrue estas ankaŭ malpli grandiozaj. Male, la fama Kalocsay estis 22-jara plenkreskinto kiam li eklernis la lingvon, kaj Marjorie Boulton, kies *Kontralte* vekis tielan furoron antaŭ du jaroj, jam 25-jara. Cetere, ni notu, ke William Auld, kvankam ekesperantiĝinta je la plej juna aĝo, nome kiam 13-jara, restis neaktiva dum dek pluaj jaroj.

Sendube ĉi tiu fenomeno estas unike propra al Esperanto, vere mirakla. Ĉu ekzistas klarigo por ĝi? Nu, eble jes, sed ĉu bona, tio estas devone alia demando.

Esperanto estas facilega, multe pli ol oni eĉ supozas. Jam ĉe la elementa studado la klerulo tion rimarkas, sed tiu granda facileco riveliĝas ne nur por la lernanto, sed eĉ pli grave por la verkisto; ĉar li ne devas tiel efektive konformigi siajn pensojn al la lingvomaterialo kiel la lingvomaterialon al siaj pensoj. La lernado de la nacilingvoj estas longega afero, kiu neniam eĉ baze finiĝas por la skrupula verkisto. Ĝi postulas ne nur memorkapablon, sed eĉ pli — la kripligon de nature logika menso, por ke ĝi adaptiĝu al la konturoj de malracia lingvo. Tio ĉi ne estas facila, ĉar kontraŭnatura. Ju pli matura la homo, des pli lia menso probable rezistas la eniron de lingvo kiu perfortas ne nur liajn konvenciajn konceptojn, sed certe ankaŭ lian esencan sagacon. La malo, tamen, okazas ĉe Esperanto. Maturulo lernas ĝin pli facile ol infano, kaj ĝin tute naturece surprenas lia menso, kiel ganton speciale faritan por ĝi. Povas efektive okazi pli funda identiĝo inter lingvo kaj pensado ol ĉe la nacilingvoj. Logika menso postulas logikan lingvon, kaj tia estas Esperanto. Ankaŭ ĝi estas, en la korekta senco de ĉi tiu vorto, multe pli natura ol iu ajn alia lingvo.

Tamen... Malgraŭ tiela klarigado la miraklo ankoraŭ restas grandaparte neeksplikita. Kiel plenkreskinto povas tiel rekomenci sian enkadrigon de la tuta intelekta kaj emocia mondo laŭ nova formulo, kiel ajn perfekta? Kiel li sukcesas, dum nur malmultaj jaroj de jam iom rigidiĝinta personeco matura, ree ekiĝi infano, por ligi ĉiujn mensajn funkciojn konsciajn aŭ nekonsciajn al nova esprimo? Kaj kiel li kapablas plie, post tio, produkti majstroverkojn tiel altvalorajn kaj spontaneajn, ke oni ne nur rimarkas ian ajn kripligon pro la ĝisfunda psiĥa revolucio okazinta, sed ofte ankaŭ povas apenaŭ koncepti pri la eblo, ke la poeto ne vere atingis en ili sian artisman zeniton? Por trovi

la respondojn al tiaj demandoj, mi suspektas, ke oni devus forjeti duonon el niaj ideoj koncerne la naturon de la homa menso kaj precipe la lingvo kiel funkcio de la tuta psiĥo.

Intertempe la mistero restas, kaj la miraklo de nia poezio forte reliefigas el la supraj konstatoj, al kiuj oni povas aldiri multajn aliajn faktojn por pli profunde mirigi la leganton. Ekzemple, niaj poetoj, krom la malfrua komenco, ĝenerale ankaŭ suferas la malavantaĝon, ke ili ne uzas Esperanton dekonon tiel ofte kiel la nacilingvon, vivas iaforte en izoleco for de aliaj same kleraj samideanoj kaj ne ĝuas aliron al kulturiloj kvante aŭ kvalite komparindaj kun tiuj de la lingvo uzata ĉirkaŭ ili dum preskaŭ ĉiu minuto de iliaj vivoj. Malgraŭe ilia artismo ne dronas en la maro de konkurantaj sonoj kaj ĉi ties eĥoj potencaj, sed forte elfloras kiel rava kaj mistika lotuso, kontraŭ ĉiu ekspekto aŭ verŝajneco.

Ne estas, tamen, necese plue ellabori ĉi tiajn faktojn. Evidentas, ke la poezio de Esperanto estas ja miraklo, aŭ, se iuj ne ŝatas la vorton, miriga fenomeno, por kiu oni devas ankoraŭ elpensi certajn gravajn klarigojn. Ĉi tiuj probable rivelos multon ĝis nun ne suspektitan pri la naturo de nia mirinda lingvo kaj la animskuaj energioj kaŝitaj en ĝi; sed kiaj ajn, la eltrovaĵoj ne forprenos nian miron. Ne, pli plena kompreno povos nur igi ĝin pli granda kaj danka. Pri tio mi estas konvinkita.

Karel Čapek:

Pri kvin panoj

... Kial mi lin kontraŭstaras? Mi tion diros al vi, najbaro: mi havas nenion kontraŭ lia disciplino. Tute ne, iam mi aŭskultis lian predikon kaj mi diras, ne mankis multe kaj mi estiĝus lia disĉiplo. Tiam mi revenis hejmen kaj mi diris al mia kuzo, selisto: vi, tion vi devus aŭdi! Mi diras al vi, li estas siamaniere profeto. Tre bele li parolas, nur veron mi diras, preskaŭ la koro moliĝas en homo; mi tiam havis okulojn plenaj de larmoj. Mi plej volonte fermus la vendejon kaj sekvus lin, por ke li ne plu malaperu de mia vido. Disdonu ĉion, kion vi havas, li diris, kaj sekvu min. Amu vian proksimumon, helpu al malriĉuloj kaj pardonu al tiuj, kiuj malĝuste traktas vin kaj similaj paroloj. Mi estas simpla bakisto, sed kiam mi aŭskultis lin, ekestis en mi ia mirinda ĝojo, kaj doloro, mi ne scias tion aldiri: tiom peze, ke mi genufleksus sur teron kaj plorus kaj samtempe tiom bele kaj malpeze kvazaŭ



mi ĉion perdus, komprenu, ĉiujn zorgojn kaj koler-
ojn. Do mi tiam diris al mia kuzo: vi, stultulo, vi
hontu; vi parolas nur pri solaj monavidecoj, kion
ŝuldas al vi ĉiuj, ke vi devas pagi dekondepagojn
kaj elcentojn, impostajn alpagojn; vi farus pli
bone, se vi disdonus ĉion al malriĉuloj, forlasus la
edzinon kaj infanojn kaj sekvus lin.

Kaj tion, ke li kuracas malsanulojn kaj demonob-
seditulojn mi ankaŭ ne riproĉus al li. Vere, tio
estas mirinda kaj nenatura povo. Ĉiuj ja bon-
trovas, ke niaj hirurgoj estas stultuloj kaj la romaj
ne estas pli spertaj. Monon postuli ili scias, sed
kiam vi alvokas ilin al mortanto, ili nur levetas la
ŝultrojn kaj diras, ke vi devis alvoki ilin pli frue.
Pli frue! Mia mortinta edzino malsanis dum du
jaroj je sangofluo; mi vizitadis kun ŝi doktorojn,
vi ne povas imagi, kiom kostis tio, kaj neniu helpis
al ŝi. Se li tiam vizitadus urbojn, mi genufleksus
antaŭ li kaj dirus: Sinjoro, resaniĝu ĉi-tiun
virinon. Kaj ŝi tuŝus lian veston kaj ŝi resaniĝus.
Ĉi-tiel ŝi tro suferis, kompatindulino, ke oni tion
eĉ eldiri ne povas... Vi sciu, hirurgoj protestas
kontraŭ tio, laŭdire tio estas mistifiko kaj fuŝado,
ili klopodas malpermesigi tion kaj simile; sed vi ja
konas ĉiujn similajn interesojn. Kiu volas helpi al
homaro kaj savi la mondon, ĉiam kolizias kun ies
intereso; por ĉiuj vi ne povas fariĝi dankinda, tio
ne eblas. Mi akcentas, li resaniĝu, eĉ la mortintojn
li revivigu; sed la aferon per la kvin panoj li ne
faris bone. Mi, bakisto, diras al vi, ke tio estis
granda maljustaĵo kontraŭ la bakistoj.

Vi ne aŭdis la aferon pri la kvin panoj? Mirinde,
ĉiuj bakistoj estas furiozigitaj ĝis ekstremo pri tio.
Do, iam, laŭdire, granda amaso da homoj post-
sekvis lin ĝis dezertejo kaj li resaniĝadis malsa-
nulojn. Kiam vesperiĝis, alpaŝis al li liaj disĉiploj
dirante: „Dezerta estas ĉi-tiu loko kaj tempo mal-
fruiĝis jam. Lasu amasojn libere foriri, ke, irante
al urbetoj, ili aĉetu manĝon ĉiun-ajn.” Li tiam
diris al ili: „Ne estas bezono, ke ili foriru, vi donu
manĝi al ili.” Kaj ili diris al li: „Ni havas ne pli
ol kvin panojn kaj du fiŝojn.” Li do diras al ili:
„Alportu ĉion al mi.” Kaj ordoninte al homamasoj
ke ĉiuj sidiĝu sur herbo kaj prenante la kvin panojn
kaj du fiŝojn, li ekrigardis al la ĉielo, benis kaj
rompante disdonis panon al la disĉiploj, la disĉiploj
sekve donis ĝin al la homamasoj. Kaj ĉiuj manĝis
kaj estis satigitaj. Poste oni kolektis panerojn, kiuj
postrestis, kaj oni plenigis dekdu korbojn per ili.
Da homoj, kiuj manĝis, estis ĉirkaŭ 5 mil da viroj
krome virinoj kaj infanoj.

Konsentu, najbaro, ke neniu bakisto lasos tion
sen puno, kial do, ĉu ne?

Se tio estiĝus kutimo, ke iu ajn satigus 5 mil da
homoj per kvin panoj kaj du fiŝoj, la bakistoj mem
devus sin paŝti, ĉu mi ne diras veron? Koncerne
la du fiŝetojn... ili kreskas sen ĉies zorgo en akvo
kaj ĉiu pravus kapti ilin laŭ propra volo. Sed la
bakisto devas aĉeti multekostan farunon kaj lignon,

li devas dungi helpanton kaj pagi salajron al li;
li devas havi vendejojn, li devas pagi impostojn
kaj ĉion ajn sekve de kio li fine kontentas, se
restas al li ia groŝo, por ke li ne devu peti almozon
por vivi.

Kaj li, li nur ekrigardas al la ĉielo kaj havas
sufiĉe da pano por kvin miloj da homoj; la farunon
li ne pagas, lignon de malproksime li ne devas
prizorgi, neniajn elspezojn, nenian laboron, oni
komprenas, ke li tiamaniere povas la panon sen-
page disdoni al homoj, ĉu ne? Kaj tion li ne pripen-
sas, ke li rabas la merititan gajnon de proksimaj
bakistoj?

Mi diras al vi, maljusta konkuro estas la afero
kaj oni devus ĉesigi tion al li. Li do pagu impostojn
same kiel ni, se li intencas okupi sin per bakado.
Al ni jam venas homoj kaj diras, kiel do, tian
nekristanan monon vi postulas por tiu mizera pa-
neto? Senpage vi devus vendi, same kiel li, kaj
kiom bona paneto ĝi estis: blanka, odoranta, krake-
tanta dum manĝo, ke ĉiuj manĝus ĝin ĝis morto.

Ni jam devis malaltigi la prezojn de bakaĵoj;
je mia honoro, ni vendas sub la produkta prezo
nur tial, ke ni ne devu fermi la vendejojn; sed
kien celas tio-ĉi, ĉiuj bakistoj tute ne kapablas
kompreni.

Sur alia loko li satigis laŭdire kvar mil virojn
krome virinoj kaj infanoj per sep panoj kaj kelke
da fiŝetoj, sed tie oni kolektis nur kvar korbojn
da eroj. Malgraŭ ke lia entrepreno ne prosperas
plu tiel bone, tamen li tute pereigos nin, bakistojn.
Kaj jen mi certigas al vi, ke li tion faras nur pro
malamo al ni, bakistoj. La fiŝvendistoj ja ankaŭ
lamentas, sed vi sciu, ili ne konas limon por siaj
postuloj — la ilia tamen ne estas tiel honesta
profesio kiel la bakista metio estas.

Vidu, najbaro, mi estas jam aĝa homo kaj sola
en la mondo; mi havas nek virinon, nek infanojn,
do kion mi bezonas plu. Mi jam diris al mia help-
anto, ke li prenu mian bakejon je sia zorgo. Mi
ne pensas pri mia propra prospero, mi vetas mian
animon, mi plej volonte disdonus mian etan hav-
aĵon kaj sekvus lin por okupi min per amo al la
proksimuloj kaj per ĉio, kion li predikas. Sed kiam
mi vidas, kiel li stariĝis kontraŭ ni, bakistoj, do mi
decidis: Nepre ne!

Mi, bakisto, vidas, ke tio-ĉi neniel estas savo
por mondo, sed kompleta katastrofo por nia pro-
fesio. Mi tre bedaŭras, sed tion mi ne pardonos al
li. Mi ne povas agi alie.

Kompreneble, ni akuzis lin ĉe Ananiaŝ kaj ankaŭ
ĉe la regento pro rompado de metia ordo kaj pro
ribeligo; sed vi scias, kiel longdaŭre okupas sin
la funkciuloj per ĉio. Vi konas min, najbaro, mi
estas milda homo kaj ne serĉas malpacigojn; sed
se li venus en Jerusalemon, mi stariĝus sur la strato
kaj krius: „Krucumu lin, krucumu lin!”

El la ĉeĥa trad. Jaroslav Huda

Tri Poemoj de Arthur Rimbaud

Mia Bohemo

Kun manoj en la poŝo, mi iris kaj mi vagis;
Kaj ankaŭ mia palto fariĝis ideala;
Sub la ĉiel' mi iris, ho Muz'! al vi vasala;
Ho ja! kiom da amoj belegaj mi imagis!
Truita estis mia unika pantalone.
— Revanta Fingruleto, dum iro mi malŝparis
Mil rimojn. Ĉe l'Ursino, l' gastejo mia staris.
— L' ĉielaj steloj miaj zumadis kun ronrono.
Kaj mi aŭskultis ilin, sidante ĉe vojrandoj,
Septembre, dum vesperoj, dum mian frunton rosaj
Gutetoj humidigis, ja refortigaj brandoj;
Kie, rimanta meze de ombroj bildkaosaj,
Mi, kvazaŭ lirojn, tiris l' elastajn laĉojn for
De miaj lacaj ŝuoj, piedon kontraŭ l' kor'!

Venus' Anadjomena

Kvazaŭ el verda ĉerko el lad', skatol' sepulta,
Virina kap', kun haroj pomade grasoŝvitaj
El banokuv' malnova eliĝas, lanta, stulta,
Kun mankoj ja sufiĉe mallerte riparitaj;
La kol' nun, graso, griza, kaj larĝaj la skapoloj
Elstaraj; dors' mallonga, jen kava kaj jen fleksa;
Kaj nun la lumbaj rondoj por ŝajna flug' ampleksa;
La graso sub la haŭto aperas laŭ tavoloj;
La spino iom ruĝas. La tu' odoras gustojn
Kurioze timegigajn; kaj oni notas krustojn

Tre strangajn, kiuj indas esploron per lupeo...
Ĉizita sur la lumboj, ĉi nom': CLARA VENUS';
— Kaj ondas tuta l' korpo, kaj vastas la gluteo
Kun ĉi ornam' terura: ulcero ĉe l' anus'.

La Pedikserĉantinoj

Kiam la knaba frunto, plena de jukoj ruĝaj,
Alvokas l' aron blankan de l' sonĝoj labirintaj,
Venas al lia lit' du fratinoj maturaĝaj
Kun siaj fingroj fajnaj kaj ungoj hele tintaj.
Jen ili nun la knabon sidigas ĉe fenestro
Gapanta floramasojn, de aerblu' banatajn,
Kaj tra la densa lia harar', ĉe rospenetro,
Movadas siajn fingrojn, sorĉajn sed senkompatajn.
Atentas li al kant' de iliaj feblaj spiroj,
Kiuj odoras kvazaŭ mieloj plantkonfitaj;
Kaj kiujn foje rompas sibletoj: kisaspuroj
Aŭ jen salivfluetoj al lipo retiritaj.
Li aŭdas palpebrumon ilian tra l' silentoj
Odoraj, kaj iliaj fingretoj, mildaj tikloj,
Flagrigas inter liaj molvolaj alkonsentoj
Sub siaj ungoj reĝaj la morton de l' pedikoj.
La vino de l' Pigreco en li nun ekfermentas
— Elspiro harmonika ĝis ebla halucino;
Laŭ l' ritmo de l' karesoj, en si la knabo sentas,
Ke jen sen ĉes' naskiĝas, jen mortas, plorinklino.

tradukis: Roger Bernard

Marek Hlasko

FENESTRO

Marek Hlasko estas unu el la plej eminentaj prozverkistoj de la juna pola generacio. Li famiĝis pro sia stilo, enhavo kaj precipe maniero. Post longaj jaroj de naŭza verkado, kiam regis en Pollando socirealista maniero, li estis unu el la unuaj, kiuj transsaltis muregojn de naŭzeco, mensogoj kaj stulteco. Liaj verkoj: „La unua paŝo en nuboj”, „La oka tago de l' semajno” kaj „Stupiduloj kredas pri mateno” havigis al li admiron de la publiko. La novelaro „La unua paŝo en nuboj” estis parte tradukita en diversajn lingvojn; ankaŭ la esperantistaro havu okazon ekkoni lian talenton.

* * *

Preskaŭ neniu venadis al mi; mi hejmas sola, de jaroj en tiu sama malpura kaj malbela domo ĉe unu el la flankaj stratoj de nia urbo. En la fenestron de mia ĉambro neniam rigardas luno, ankaŭ

la ĉielon kaj la stelojn neniam mi vidas de ĉi tie; mi povas rigardi nur kortopecon kaj vidalvidan muron de alia domo — tre altan, parte surkreskitan per sovaĝa vito. Estas tie du fenestroj. En unu — kiel mi iom-post-iom konkludis — loĝas tapetisto, en la alia iuj junaj geedzoj kun infano; de temp' al tempo mi vidis helkoloran kapeton de tiu infano, eĉ ĝis nun mi ne scias ĉu estis knabo aŭ knabino; poste mi eksciis ke la infano mortis. Kaj mi perdis emon rigardi la kontraŭsituantan muron; kiam mi ekkomprenis ke jam neniam mi vidos tiun infanon, mi rimarkis kiel vere abomenega estas tiu muro.

Tre malofte vizitis min certa oficisto de la unua etaĝo; mi mem loĝis en parteroj. Li estis unu el tiuj bonkoraj porkuloj, en kies buŝoj eĉ blasfemoj de diabloj sonas tute dece kaj perdas koloron, kiuj frapas nian genuon kaj palpebrumante demandas: „Nu, kiel do? Plaĉis al vi? Ĉu ne vere bonega?” Komence mi ne toleris tiun homon kaj liajn maldecajn rakontetojn. Ŝajnis al mi naŭzega kaj escepte stulta; mi pensis eĉ kun ioma plezuro, ke pri liaj spritaĵoj oni ridis verŝajne jam dum tempoj



Pentrajo de Martin Benka

de Francisko Jozefo. Sed poste mi jam ne incitiĝis pro li kaj li eĉ iĝis bezona por mi, ĉar mi ekkomprenis ke tiu homo, loĝanta en la unua etaĝo, estas tia sama povra kaj soleca homo kiel mi en la interetaĝo. Mi ekemis iel plezurigi lin: grandpene mi ellernis kelkajn spritaĵojn kaj kiam li venis — mi rakontis ilin. Mi memoras ke li silentis kaj nenion jam diris dum tiu vespero. Kaj li ĉesis min vizitadi. Vere mi ne scas kial.

Antaŭ mia fenestro kreskis akaciarbo. Ĝi estis tre maljuna kaj velksekiĝis: mi memoras ke dum lasta printempo floris jam nur unu branĉo. Mi tiam la unuan fojon ekvidis tiun knabon: mi sidis proksime al la fenestro kaj mi rimarkis en iu momento, ke la rustkolora kapo penas rigardi en mian ĉambron. Komence mi timiĝis, sed tuj poste mi ekkomprenis ke estas kapeto de l' infano kaj mi decidiĝis atendi. Mi rigardis retenante spiradon; la kompatindulo volis rigardi iom pli enen, sed ne kapablis surgrimpi. Mi pensis: „Helpi lin? Demandi kion li volas?” Sed post momento mi timiĝis: mi ekpensis ke tio povus malemigi kaj fuĝetigi lin.

Sekvintan posttagmezon denove mi rimarkis ke la posedanto de la rustkolora kapo volas engrimpi kaj rigardi en mian ĉambron. Supozeble li estis tamen tre malgranda kaj ne scipovis fari tion kion li deziris. Tiam mi mem decidis alrigardi kaj mi ekvidis lin; jes, efektive li estis negranda, tre ridiga rustharulo. Ja li havis ĉe la flanko tre potenca sabron. Mi ekkuraĝis kaj vokis:

— Hej, etulo!

Li retrorigardis, sed kuris pluen. Kun ĉagreno mi ekpensis, ke mi fortimigis lin kaj ke li certe jam ne volos rigardi ĉi tien. Sed ne; vespere mi denove ekvidis lian rustkoloran kapeton, eĉ iom pli supre. Kaj tiam mi ekkomprenis kio allogas lin: bildo sur mia muro. Ĝi estas mizera bildaĉo, prezentanta marbatalon: ŝipoj kun frakasitaj veloj, ŝaŭmantaj ondoj, senŝipuloj kaj tiel plu. La etulo rigardis tiun bildon el la korto kaj vidis nur iomon, sekve la mastopintojn kaj la ĉielon je strängega koloro, al kiu ne avaris farbojn tiu nekonata al mi pentristo. Mi decidis helpi la knabeton kaj kiam li vespere venis, mi subite elklinis la kapon kaj ekkriis:

— Ci volas rigardi mian bildon, ĉu?

Tiu rigardis min dum momento, poste salivglutis kaj diris brave:

— Jes.

Mi etendis la manon. Li sidiĝis sur la fenestra rando kun lerteco de simieto: mi ankoraŭ memoras mallongan admirbrilon en liaj okuloj. Sed post momento mi rimarkis, ke li jam entute ne rigardas la bildon: li atente ĉirkaŭrigardis mian ĉambron. Mi vidis kiel malaperas admiro de sur lia vizaĝo: nun li estis serioza kaj enmemiĝinta, kvazaŭ dum tiuj momentoj kiam li sidis sur la fenestra rando pliiĝus al li multaj jaroj kaj zorgoj. Tre longe li

silentis, mallevinte la rustkoloran kapeton. Poste li diris:

— Ĉie estas tiel same.

— Jes! — mi diris. — Ĉie estas tiel same.

— Nenie estas alie? — li demandis.

— Ne — mi respondis.

— Kaj — ni diru — tre malproksime de ĉi tie? Ankaŭ estas tiel same?

— Jes. Ankaŭ tie estas tiaj ĉambroj. En la tuta mondo estas tiaj ĉambroj. La mondo mem estas ĝuste kelkaj tiaj ĉambroj.

— Nu, mi ankoraŭ vidas — li diris.

Li saltis de sur la rando kaj forkuris. Sekvintan tagon mi revenis hejmen pli poste. Enirinte la ĉambron mi unuavide rimarkis ian objekton, kuŝantan ĉe la fenestro. Mi levis ĝin; estis la sabro, kiu vekis mian admiron.

Sed la knabeto mem jam neniam rigardis en mian ĉambron.

el la pola tradukis

Jerry Grum

Nilo Ferlin:

Stratbildo

Li estas bierfara direktoro.
Parolas nun kun iu strata floro.
Kaj ŝia elsuĉanto, pala ulo,
rutine gvatas ĉe la stratangulo.

Li estas direktoro. Ruĝas vango.
La vango ruĝas kiel sang-oranĝo.
Kontenta. *Selfmade*. Li ne konas ploron
kaj ankaŭ ne gustumis la angoron.

Severaj steloj en la alt' rigidas.
Mi lernis iam verson: Dio vidas.
Okuloj diaj miras stratan floron,
eksploatiston kaj bierodirektoron.

El la sveda tradukis Magda Carlsson

Verner von Heidenstam

La fajrero

Fajrero loĝas en mi, plejinterne;
taglumen levi ĝin, jen mia cel',
la viv' de mia viv', esencokerne.

Ĝi fuĝas min — aŭ min konsume naŭzas.
Fajrero eta estas mia riĉ',
fajrero eta mian veon kaŭzas.

El la sveda tradukis Magda Carlsson

nigraj kalenduloj

(el la „Kvindek Strofoj de Ĉaŭras”)



Ankaŭ nun
Se mia lotus-okula knabin' revenus
Laca pro l' kara pezo de juna amo,
Mi redonus ŝin al ĉi brakoĝemeloj malsataj
Kaj trinkus el ŝia buŝo la pezan vinon,
Kiel ebria pirat-abelo flirte ekstaza
Sorbas rave mielon el la nufaro.

Ankaŭ nun
Kvankam mi malproksimas, aro da birdoj
Zigzage flugante super la arboj valaj,
Pasante mian karceron pepe vokante,
Min al la knabino reportas. Ĉar birdsimile
Ŝi kantas kanton, kaj ŝia malpeza paŝo
Cignosimilas; kiel skuataj flugiloj
De nigra aglo nokte falas la haroj.


Ankaŭ nun
En la du bazaroj oni klaĉas malforton de tiu,
Kiu amanta min fortis. Kaj viroj nanecaj,
Kiuj marĉandas pri mono, ĉar ili sklavas,
Sian ĉirkaŭokulan grason faltigas; tamen
Ŝin prenis neniu Princo de l' Urboj Maraj
Al sia malĝoja lito. Eta soleculino,
Vi kroĉiĝis al mi kvazaŭ vesto, mia knabino.

Ankaŭ nun
Nur unu tago por mi aŭroros. La steloj
Alturnas morgaŭan nokton: mi ne atentos.
Nur unu maldormo frida ĉe koro malplena,
Kaj fino. Ŝi ĉi-nokte malbone ripozas;
Ho, dormu; ĉar pezo la tutan mondon premos
Krom mia per morto malpezigita koro.

Ankaŭ nun
Hakisto kaj fiŝkaptisto sin turnas hejmen,
Dum la lun' sur hakilo brilas, kaj reto gutanta
Kaptas la flavan lumon. Purpuraj fajroj
Ilin vokas al amo kaj dormo. De l' urbo varma
La verkisto porpana de magraj kantoj vagas
Por kuŝi sub la klemato kun sia knabino.
La luno brilas sur ŝiaj mamoj, kaj mortos mi.

Ankaŭ nun
Mi scias, ke mi gustumis la varman vivon,
Levante orajn kaj verdajn tasojn ĉe l' granda festo.
Nur dum tempo mallonga kaj forgesita
Sur miajn okulojn rekte de mia knabino
Radiis plej blanka lumo de eterneco.
La peza klingo. Kvazaŭ al festotago.

Trad.: William Auld



KELKAJ LINGVISTIKAJ DEMANDOJ

(Okaze de la Politika Burleskaĵo kaj Lingvosciencia Ĉarlatanaĵo

de D-ro W. Solzbacher)

En majo A.D. 1956 D-ro William Solzbacher ekrajdis la jam laciĝintan ĉevalaĉon de sia amiko kaj, armita per ĉiuj lancoj, glavoj kaj ponardoj de la metio akirita en la altlernejo por ĉasado al sorĉistinoj kaj fantomoj, ekspronis ĝin trote en la mondon. Nia kavaliro unue iom ekzercis sian talenton sur la kampo de cirkuleroj. Kvankam la rezultoj ne tre kontentigis lin, ĉar la plejparto de la ĵetaĵoj revenis sur lian propran kapon, dum la cetero maltrafis eĉ la sapobalonojn, kiujn li mem ŝvelblovis, li tamen opiniis sin sufiĉe forta por ekmiliti sur la tereno de „objektiva kritiko“, kiel li laŭte kriis por kuraĝigi sin mem kaj kredigi naivulojn.

Tiel, do, nia heroo jam plenajn 22 monatojn kuraĝe ĵetas siajn lancojn en vakuon, tranĉas kaj traboras per siaj ponardoj la aeron, glavsvinge draŝas la fojnon, Spektaklo eksterordinare amuza, se ĝi ne estus samtempe tragika, kiu per si mem meritis esti priskribita de talenta humoristo en la humora parto de belarta revuo.

Sed li tuŝis ankaŭ du-tri principajn demandojn, kies pritrakto povus helpi al pli bona kompreno de la pozicio de Esperanto el lingvistika kaj sociologia vidpunktoj. Tial, nur kaj precize tial mi skribas tiun ĉi artikolon.

La solakto de la tragikomedio

D-ro Solzbacher komencis la novan serion de atakoj en „Amerika Esperantisto“ de majo/junio 1956. La formo estas tiu de la iamaj kriminalaj filmoj (en 6, 7 k.t.p. „epokoj“) aŭ de la lastrangaj detektivromanoj en samkvalitaj vesperaj gazetoj: en daŭrigoj kun la „streĉa pinto“ ĉe la fino de ĉiu parto. La tuta enhavo estas tia, ke oni tion povas nomi nek recenzo aŭ kritiko, nek diskuto aŭ polemiko, eĉ ne persona atako pro idea malkonsento, sed tute simple plej vulgara politika burleskaĵo de speciala speco kun elementoj tiom komikaj, kiom tragikaj: komikaj pro la nekredeble ridinda naiveco de la ruzo utiligata por renversi faktojn kaj falsi la veron; tragikaj pro tio, ke la esenco de tiu

grandega fortostreĉo, daŭranta jam dudek monatojn, estas nenio alia ol false denunci. La kvintenco mem resumiĝas en du solaj vortoj: de numero al numero kiel subtitolo de tiu ĉeno da fiaj absurdaĵoj aperas sur la kovrilpaĝo — kiel la plej fia kaj la plej absurda el ĉiuj — mia nomo apud tiu de Stalin. Kaj estas vere tragike vidi, ke homo kun doktora titolo, laŭdire aktiva katoliko, povas malleviĝi al tiel malaltaj fundoj ne de ordinara denunciado — kio, kvankam certe ne tre digna okupo, povas tamen esti almenaŭ iusence komprenebla — sed de falsa denunciado. Por tio mi ne trovas alian vorton ol tragedio.

D-ro Solzbacher komencis la serion per drameca parto kun aparta subtitolo „*Dramatis Personae*“, en kiu li donis kelkajn biografiajn notojn pri la soveta lingvistoj Marr kaj Ĉikobava, pri Stalin, Drezen kaj, kompreneble, pri mi mem. La celo estis tuj en la komenco bone miksi ĉion por povi pli efike konfuzi. Ne interesas min la ĝusteco aŭ malĝusteco de tiuj notoj koncerne la aliajn. Pri mi li donis tie la jaron kaj lokon de mia naskiĝo kaj tio estas du el la malmultaj veraj diroj pri mi en la tuta serio. Eĉ en la kelkaj linioj de la biografia noteto li skribis malĝustajojn — ekzemple, ke mi estas aŭtoro de la verko *La Internacia Lingvo*, kvankam sur la kovrilo klare estas skribite kaj en la enkonduko same klare dirite, ke mi nur redaktis ĝin — aŭ ellasis gravajn faktojn.

Estas necese rekoni, ke li ne donis informojn pri mia harkoloro, alteco, la mezuroj de la korpopartoj (*vital statistics*), nek li sciigis pri mia jara aŭ semajna enspezo, kiel tion kutime faras certa speco de gazetoj priskribante filmstelulinojn aŭ similajn gravajn personecojn. En tiu serio li uzis pri mi multajn insultajn vortojn. Li ankaŭ plurfoje, kun evidente ofenda intenco, parolas pri mi kiel pri „tiu eksprofesoro“, „tia fakulo pri internaciaj rilatoj“ aŭ simile, sed li, kompreneble, prisilentas du faktojn: (1) ke mi ĉesis instrui en la Universitato nur tial, ĉar mi propravole, pro principaj kaŭzoj, forlasis mian landon; (2) ke malgraŭ la lingva obstaklo mi estis invitita kunlabori — kaj efektive

laboras ankaŭ nun — en samrangaj sciencaj institucioj de la Okcidento. Ankaŭ la prisilento de tiuj du faktoj — kaj de multaj aliaj — estis farita intence ne nur por insulti, sed ankaŭ por „apogi” la menciitan ĉefan celon. Cetere, D-ro Solzbacher ne povas kaj verŝajne neniam povos esti „estinta” profesoro, ĉar li neniam estis, nek verŝajne estos „estanta”.

Se tio eble ne sufiĉas por ricevi klaran bildon pri la solrolulo de tiu tragikomedio, ni donu du pliajn faktojn:

La 6-an de februaro 1952 D-ro Solzbacher subskribis slipon por fariĝi kunlaboranto de CED. Ĉar la spaco sur la slipo ne sufiĉis por respondi al la demando en kiuj gravaj medioj li povas helpi — tion plenigas ĉiu kunlaboranto — li aldonis specialan paperon kun longega listo de ĉiaspecaj organizaĵoj. Tio per si mem estas bona. Sed la CED-slipo havas ankaŭ la dorsan flankon, sur kiu la oficejo registras ĉiujn laborojn, kiujn la unuopa kunlaboranto plenumas por CED. La dorsa flanko de la slipo Solzbacher estas malplena. En 5 jaroj de sia „kunlaborado” li faris nenion alian ol ataki ankaŭ tiun institucion, malutilante al ĝia laboro kaj ofendante ĝiajn kunlaborantojn. Kaj tio ne eniras en la slipon kiel „laboro”.

En Kopenhago li reprezentis EANA, tiam ankaŭ aliĝinta asocio, en la Komitato de UEA. Jen parteto el la Protokolo de la Komitata Kunsido de la 10-a de aŭgusto 1956, el kiu bone vidiĝas lia veremo:

„Dum la kongreso alvenis la julia/aŭgusta numero de Amerika Esperantisto, en kiu troviĝas i.a. raporto pri la landa kongreso de EANA en Detroit. En tiu numero troviĝas rezolucioj akceptitaj de la EANA-kongreso, kiujn tradukis s-ro Kennedy el la angla lingvo al la komitatanoj. En la rezolucio la kongreso de EANA i.a. esprimas konfidon al sia ĝenerala sekretario s-ro Connor, laŭdas lian agadon kaj kuraĝigas lin daŭrigi sur la sama vojo.

La sama numero enhavas foton de la kongreso en kies mezo troviĝas D-ro Solzbacher. Tamen D-ro Solzbacher antaŭ kelkaj tagoj en la komitato deklaris, responde al rekta demando de la Prezidanto, ke li ne konas la sintenon de EANA rilate la agadon de s-ro Connor, ĉar li ne plu estas en ĝia estraro; ke EANA devus unue trakti tiun demandon kaj nur post tio respondo estus ebla. D-ro Solzbacher, kiu en la komenco de tiu-ĉi komitatokunsido ĉeestis, poste malaperis.”

Sajnas al mi, ke tiaj aferoj estas pli karakterizaj ol la loko kaj jaro de la naskiĝo.

Misuzo de preseraroj

Ne ekzistas libro, kiu ne povus esti plibonigita. Ĉiu plia eldono de grava verko kutime enhavas plibonigojn kaj kompletigojn. En ĉiuj lingvoj kaj en ĉiuj faktoj estas tiel. Verko kiel *La Internacia Lingvo* ne povis esti escepto. Des malpli, ke en ĝi estas amasigitaj faktoj kaj nomoj, tiel ke preskaŭ ĉiu linio enhavas almenaŭ po unu kaj kelkaj eĉ plurajn. Se oni konsideras la fakton, ke antaŭ la fondiĝo de CED en 1952 ne ekzistis en la Esperanto-Movado iu institucio, kiu sisteme okupiĝus

pri esploroj kaj dokumentado kaj ke la verko aperis en 1954, estas surprize, ke ĝi ne entenas pli da korektindaj aŭ plibonigindaj punktoj. En la tempo de la redaktado CED funkciis iom pli ol unu jaron kaj, en tiaj kondiĉoj, estis necese apogi sin al diversaj verkoj publikigitaj pli frue de unuopuloj. Malgraŭ la kelkaj eraroj kaj mankoj — pri kiuj neniu pli bone konscias ol mi mem — ĝi plenumis kaj plenumas efike sian rolon kaj helpas al orientiĝo. Pluraj sinceraj kunlaborantoj atentigis pri dezirindaj aŭ necesaj plibonigoj, kaj iliaj atentigoj estis kaj estas akceptataj kun dankemo. Tiaspecaj rimarkoj, atentigoj, kritikoj, eĉ akraj kritikoj, se ili estas lojalaj kaj bonintencaj, estas ĉiam bonvenaj. Ili helpas al plibonigoj kaj sekve kontribuas al pli utila laboro.

D-ro Solzbacher ne agis tiel. Li unue laŭde diris, ke en la verko „preskaŭ tute mankas” preseraroj (A.E., 1956, p. 84) por povi sur la sekvantaj paĝoj utiligi ĉiun efektivan preseraron, eĉ la plej evidentan, kiel eraron pri faktoj. Kaj tion li faris ne pro malatentemo, sed tute konscie.

Jen kelkaj ekzemploj:

En la verko *La Internacia Lingvo* estas dirite sur la p. 46, ke ekzistas lernolibroj de Esperanto en 84 lingvoj. Tio estas preseraro. En la manuskripto estis menciite 52 lingvoj. Kompreneble D-ro Solzbacher ne vidis la manuskripton, sed li certe vidis la dokumenton de CED CED/4, ĉar ĝi estis sendita al li. En tiu dokumento estas dirite, ke lernolibroj de Esperanto ekzistas en 52 lingvoj. Kaj tiu dokumento estis verkita proksimume samtempe kiel la koncerna ĉapitro de *La Internacia Lingvo*.

Plue, tuta parto sub aparta subtitolo estas dediĉita al „pruvado” ke mi ne scias — adiciil! Li citas jenan parteton el la I.L.: „La Universala Vortaro de 1894 enhavis 2.599 vortradikojn. La ses oficialaj aldonoj de la Esperanta Akademio enhavas 1.758 vortradikojn plus la nova sufikso *-end*, entute 1.759. Sekve, la oficialaj vortradikoj en la komuna uzo estas 4.423.”

Eĉ infanoj komprenus, ke tie devas temi pri ia eraro. Des pli, ke sur la sekvanta paĝo de la libro troviĝas jena frazo: „Estas rimarkinde, ke el la 7.866 radikoj en komuna uzo, la fundamentaj kaj oficialigitaj sumiĝas je nur 4.425.” Tiun frazon D-ro Solzbacher bone vidis, ĉar li reproduktis ĝin. Li do devis supozi, ke sur la paĝo 33, verŝajne post la dua korekto de la presprovaĵoj, elfalis tuta frazo, kiu tekstis: „*La fundamentaj radikoj estas 2.666.*” Tion li ne povis ne vidi, ĉar sur la paĝo 34 estas klare dirite „*fundamentaj kaj oficialigitaj.*” Mi opinias, ke en la tuta kultura historio de la homaro ne estis farita „recenzo”, en kiu surbaze de tiaspeca evidenta preseraro oni asertus „D-ro Lapenna ne majstras la belan arton de elementa aritmetiko”, kiel tion faras D-ro Solzbacher mis-

uzante bedaŭrindan ellason de frazo kaj preseraron en cifero.

Plue, pro preseraro, sur la paĝo 85 de *La Internacia Lingvo* estas presite: „...*Shintaro, Kawakita Susumo Suzuki*,...“ La tuta eraro konsistas en tio, ke la komo devus troviĝi inter Kawakita kaj Susumo. D-ro Solzbacher povis tion rimarkigi per unu frazeto, se li vere opiniis tion epokfara eltrovo. Anstataŭe li skribis tutan alineon kaj plenigis ĝin per nekredeblaj akrobataĵoj. Evidente, li ekspluatis la nefamiliarecon de la japanaj nomoj por aranĝi tiun ludon.

Li paciencie legis eĉ la kompletan indekson por trovi tie sur la paĝo 191 la nomon *Vrbax* kaj montri ĝin kiel gravan eraron, sed ne menciis, tute laŭ sia stilo, ke la sama nomo estas korekte skribita — *Vrba* — sur la paĝo 66. La preseraro *Kaŭzaka* (anstataŭ *Kaŭkaza*) estas ankaŭ tiaspeca „eraro de fakto“. K.t.p., k.t.p. Oni povus longe daŭrigi, sed tio estus enuiga por mi same tiel, kiel por la legantoj.

Preskaŭ ĉiu preseraro aŭ, du fojojn, tajperaro, estas misuzita. Surbaze de tiaj eraroj — bedaŭrindaj, mi ripetas — li provis pruvi al la senpaga legantaro de sia gazeto, dissendata abunde tra la mondo, ke mi ne nur ne scias la elementan aritmetikon, geografion k.s., sed ankaŭ kaj eĉ — mian gepatran lingvon!! Mi vere dubas ĉu li sukcesis konvinki eĉ sin mem pri tio.

Mi deziras aldoni, ke tute certe la preseraroj, precipe en tiaspeca verko, estas vere ĝenaj. La situacio estas kutime tia, ke la kompostisto ne scias Esperanton. Sekve, troviĝas en la presprovaĵo relative multe pli da eraroj ol en samspeca teksto kompostita en lingvo konata de la kompostisto. La malfacilaĵo komplikiĝas pro la fakto, ke tre ofte, korektante iun eraron, la kompostisto faras alian aŭ eĉ plurajn en la rekompostata linio. La sola solvo de tiu problemo estas presigi en presejoj, en kiuj laboras kompostistoj kun la scio de la Internacia Lingvo.

Iom, sed vere nur iom da nova logiko

La „recenzoj“ kaj „kritikaj prijuĝoj“ de D-ro Solzbacher ampleksas ĝis nun, laŭ mia scio, kvardekon da paĝoj. En la momento, kiam tiuj ĉi linioj estos legataj, ilia nombro certe estos konsiderinde pli granda. Oni devus skribi tutan libron por montri laŭvice ĉiujn malĝustaĵojn, miscitaĵojn, el-lasojn, sofismojn, logikajn sinmortigojn kaj ĉiaspecajn aliajn absurdaĵojn, kiuj ornamas ĉiun alineon de tiu vere unika papermonumento al la intelekta marĉo de nia epoko. Sed mi ne intencas perdi mian tempon por verkado de tiaspeca libro. Tial, antaŭ ol pritrakti la du-tri principajn demandojn, mi ĉi tie limigos min al analizeto de nur unu el la plej elstaraj ekzemploj de „logiko“, kiujn mi iam renkontis en mia vivo.

D-ro Solzbacher komencis la unuan daŭrigon de la dua sturmatako (A.E., 1957, p. 83) per

citaĵoj el du sovetaj lingvistikaj verkoj kaj per paralelaj citaĵoj el mia verko *Retoriko* kaj el la libro *La Internacia Lingvo*, kiun mi redaktis. Sur la maldekstra flanko de la paĝo troviĝas citaĵo el la verko de R. O. Ŝor kaj N. S. Ĉemodanov *Vvedeniĵe v Jazykovedeniĵe*, publikigita en Moskvo en 1945, kiu tekstas (mi citas laŭ Solzbacher):

„La aserto... ke la evoluo iras de unulingveco al multlingveco..., ne korespondas al la historiaj faktoj... La lingvo evoluas de primitiva multlingveco al unuecaj formoj korespondantaj al la formoj de la homa socio estiĝantaj sur diversaj ŝtupoj de la historia evoluo (hordo, tribo, popolo, nacio).“

Sur la dekstra flanko estas presita jena citaĵo el *Retoriko* (p. 28):

„Ĉar en larĝaj, grandaj linioj la homaro iras de la iama ĉiaspeca disrompiteco (hordoj, triboj, gentoj, popoloj, nacioj, unuflanke; okupoj, kasto, klasoj, aliflanke) al unueco, la lingvo ankaŭ evoluas de la iama tre granda multlingveco al baldaŭa unulingveco.“

La libron de Ŝor kaj Ĉemodanov mi ne legis, ne posedas ĝin kaj ne iros en bibliotekon por kontroli la korektecon de la citaĵo. Mi akceptas, ke ĝi estas ĝuste represita.

Post la menciitaj du citaĵoj sekvas, denove maldekstre, mallonga frazo el la verko de A. S. Ĉikobava *Vvedeniĵe v Jazykoznanije*, kies dua eldono estas publikigita en Moskvo en 1953. Tiu citaĵo tekstas:

„Kio do estas la lingvo? — La lingvo estas socia fenomeno.“

Dekstre troviĝas citaĵo el *Retoriko* kaj el *La Internacia Lingvo*, en kiu mi diris:

„La lingvo estas socia fenomeno.“

Iom poste estos preparolita la socia karaktero de la lingvo kaj ĝia evolutendenco. Por la momento ni restu nur ĉe la formala logiko.

La tuta senco de tiu preskaŭ tutpaĝa citado kun komentario estas „logike“ „pruvi“ la pravecon de la denunca apudmeto de la du menciitaj nomoj. La rezonado laŭ tiu „logiko“ estas proksimume jena: La libro de R. O. Ŝor kaj N. S. Ĉemodanov, kiel ankaŭ tiu de A. S. Ĉikobava, estas la ĉefaj lernolibroj de la „marksista-leninista-stalinista lingvo-scienco“ (vortoj uzitaj de D-ro S., p. 83) — La citaĵoj el la verkoj de Lapenna respondas al la citaĵoj el la verkoj de Ŝor & Ĉemodanov kaj Ĉikobava — Sekve la konceptado de Lapenna respondas al „marksista-leninista-stalinista lingvoscienco.“

Mi lasas flanke la stultecon de la formulo „marksismo-leninismo-stalinismo“, kiu estis lanĉita en Soveta Unio sub la regado de Stalin kaj poste preskaŭ ĝenerale akceptita ankaŭ en la Okcidento (fakte, se Marx kaj Engels estus vivintaj sub la stalinisma reĝimo, ili certe estus „likviditaj“ pro „devojiĝoj de marksismo“!), ĉar tio ne estas interesa el vidpunkto de la formala logiko de D-ro Solzbacher.

„Silogismojn“ de lia supra speco faradas eĉ ne malgrandaj gimnazianoj, kiam ili lernas la unuajn

rudimentojn de logiko. Kaj se hazarde ili tamen faras tian eraregon, ili ricevas malbonan noton. Kun la sama logiko, absolute sama, oni povus skribi: *Stalin skribis pri la teorio de Marr, ke ĝi estas stultajo — Solzbacher skribis pri la teorio de Marr, ke ĝi estas stultajo — Do, Solzbacher estas stalinisto!!!*

Vere mi dubas, ke tiel profunde logika penso estis iam produktita de homa cerbo.

Sed ĉar supozeble D-ro Solzbacher intencas daŭrigi tiaspecan logikadon, mi tuj liveras al li novan bonegan materialon per parto de la subtitolo de tiu ĉi artikolo: *Lingvosciencia Ĉarlatanaĵo*, kiu objektive karakterizas la adekvatan enhavon de lia serio *Ĉarlatana Lingvoscienco*. Mi eĉ helpas lin por ŝpari al li la tempon de serĉado. Marx skribis sian verkon *Mizero de la Filozofio* responde al tiu de Proudhon *Filozofio de la Mizero*. Do, principe sama vortludo, do k.t.p. laŭ la supra formulo. Per tiu sugesto mi eĉ donas al li la eblecon skribi kelkajn pliajn paĝojn „pruvante”, ke mi neniam vidis la verkon de Proudhon, ĉar la plena titolo ne estas precize tia, k.t.p., k.t.p.

Pro la vero estas necese diri, ke D-ro Solzbacher ne asertis, ke mi kopiis la citaĵon de Ŝor kaj Ĉemodanov, nek ke mi transskribis el la libro de Ĉikobava, aperinta en 1953 (aŭ en 1952), en la verkon *Retoriko*, kiu estis publikigita en 1950.

Lingvo kiel socia fenomeno

Eĉ se ĉiuj lingvistoj de la mondo asertus, ke la lingvo ne estas socia fenomeno, la realaĵo dementus ilin same tiel, kiel la realaĵo dementas tiujn treege multnombrajn el inter ili, kiuj eĉ hodiaŭ neas la efektivan ekziston de Esperanto kiel plena lingvo, samranga en tiu sia karaktero al ĉiuj aliaj.

Kio, do, povus esti la lingvo, se ĝi ne estas socia fenomeno en duobla senco: (1) ke ĝi ekestis paralele kun la formiĝo de la homo helpante en la sama tempo siavice tiun formiĝon, ke, do, ĝi estas *ekskluziva apartenaĵo* de la homa socio kaj (2) ke tiu ekesto, evoluo kaj ĉiuj pliaj transformiĝoj okazis ne kiel rezulto de individua arbitra volo, sed kolektive, en la kadro de la socio, sub la influo de la fortoj regantaj en ĝi?

Se ni esceptas diversajn mistikajn kredojn¹⁾, la respondo en tiu kazo povus nur esti, ke la lingvo estas ia natura, biologia aperaĵo. La unua kaj la plej ĝenerala sekvo de tiu starpunkto necese estus — por ne paroli pri la pliaj konsekvencoj — ke al la lingvo devus esti aplikataj la leĝoj de la

¹⁾ *Nia epoko ne estas senigita de tia mistikismo. Laŭ Evening Standard (Londono), la Irlanda Eldona Kompanio publikigis en New York en 1943 libron, en kiu oni pruvas ke „la Biblio estas skribita de Irlandanoj kaj ke la hebrea lingvo estas nur dialekto de la kelta”. — Turka lingvista kongreso, okazinta en 1934, tute serioze diskutis la aserton, ke la turka lingvo troviĝas en la radikoj de ĉiuj lingvoj, ĉar ĉiuj vortoj estas derivitaj de ĝines, nome „suno” — la unua objekto, kiu postulis ian nomon. (Laŭ Mario Pei, The Story of Language, London 1957, p.18.)*

naturu, leĝoj biologiaj kaj ne tiuj tute specialaj, agantaj en la homa socio.

Kompreneble, neniu neas la bezonon daŭre studi la naturleĝojn por kompreni ĉiam pli bone la mondon kaj la homon kiel parton de tiu mondo en lia alia kvalito, t.e. en tiu de natura vivanta estaĵo. Speciale la fiziologio de la voĉorganoj kaj de la cerbaj parolaj kaj aŭdaj centroj ĉe la homo, precipe se la studo etendiĝas al la tuta evoluo de tiuj organoj, estas tre utila. Sed tiuj studoj, kvankam ege helpaj por la kompreno de la meĥanismo de la parolkapablo kaj de ĝia evoluo, tamen ne klarigas la esencon mem de la lingvo. Multaj aliaj vivantaj estaĵoj laŭ sia propra naturo eligas diversajn tre variajn sonojn aŭ bruojn kaj tiamaniere *instinkte* esprimas kelkajn fundamentajn sentojn: malsaton, timon, pariĝemon k.s. Tamen tiuj sonoj kaj bruoj havas ian signifon ne per si mem, nome kiel konsciaj indikantoj de tiuj sentoj aŭ statoj, sed nur kiel *integra parto* de la konkreta konduto, laŭ la naturo mem de la koncerna animalo²⁾. Kelkaj animaloj, precipe pluraj hejmaj bestoj, povas esti „edukitaj” reagi al diversaj vortoj aŭ, escepte, eĉ al desegnitaj figuroj. Ili „lernas” ankaŭ postuli ion: ekzemple la hundoj per bojado aŭ la katoj per miaŭado. Papagoj ripetas tutajn frazojn en diversaj lingvoj. Iuj asertas, ke eĉ orangutango, hundo, ŝafo estis „instruitaj” diri kelkajn vortojn³⁾. Tamen, ĉio ĉi ne estas lingvo en la vera senco, nome en la senco de aparta instrumento, organizita kiel sistemo de signoj, ĉefe sonaj, reprezentantaj ideojn kaj servanta por konscia komunikado kaj pensado. La animaloj povas boji, miaŭi, iai, heni, trili, kluki, ululi, bleki diversmaniere, sed ili ne povas paroli. Kiam ili eligas tiujn diversajn sonojn aŭ bruojn, tio okazas kiel *integra parto* de la konkreta sento — ĝojo, timo, doloro, malsato k.s. — kaj *ne kiel nomado* de tiu sento. Kvankam la fiziologia bazo de la lingvo estas la kapablo eligi sonojn — kaj ankaŭ tiu kapablo ĉiam pli perfektigis paralele kun la evoluo de la lingvo — tamen ĝi per si mem ne estas lingvo. Nur kiam difinita sono aŭ sonkomplekso ligiĝas al difinita objekto aŭ ideo, ricevante tiamaniere certan signifon, kiun aliaj homoj akceptas kiel tian, ekestas lingvo. *Tian lingvon posedas nur la homo kaj li akiris ĝin en la procezo de sia formiĝo kiel homo.*

²⁾ *Multaj bestoj produktas diversajn sonojn kaj bruojn ne nur per la buŝo, sed ankaŭ alimaniere. Ekzemple, la ĉevaloj, se ili estas incititaj, produktas pli aŭ malpli ritman bruon per eligado de gasoj el la anuso. Ŝajnas ke tiu bruon havas emocian signifon. Ĝi transportiĝas al aliaj ĉevaloj, kiuj siavice produktas la saman bruon.*

³⁾ *Ekzistas raporto, laŭ kiu orangutangino estis instruita imiti la vorton „papa”. Alia asertis, ke li povis dresi hundon nombri de unu ĝis tri kaj diri la vorton „sukero”. Je informo el Usono, ke ŝafo estis instruita paroli, la humorista gazeto Punch (Londono) sprite rimarkigis: „Says ewel!” („Ĝi diras ŝafino”, prononcata same kiel „says you”, amerikanismo eldirata kiam oni ne kredas ion, proksimume kun la signifo „rakontu ĝin al iu alia”).*

Temas nun pri tio, ke precize tiun lingvon, do la lingvon, oni provis ekspliki kiel naturan, biologian aperaĵon, kaj ne kiel socian fenomenon.

Tiu „natureca” ideo servis kiel elirpunkto de multaj teorioj kun plej diversaj nuancoj. Malatentante la diferencojn en la detaloj, oni povas diri, ke ilia komuna trajto estas rigardado al la lingvo kiel al io, kio estas *ennaskita*, apartenanta laŭ la naturo mem al la homo, do *integra parto de li kiel biologia estulo*, tute adekvate al la krioj kaj bruoj produktataj de la bestoj. Tiuj teorioj fakte identigas la antaŭlingvan (kaj sekve, laŭ mi, antaŭhoman) stadion de la homaj antaŭuloj el la animala mondo al la lingva stadio de *Homo Sapiens*. Eble nenio pli bone ilustras la esencon de tiu starpunkto, ol la fakto, ke eĉ Skta Bazilo estis akuzata de Eŭnomio (Eunomius) pro ateismo tial, ĉar li opiniis, ke la infanoj „lernas paroli”! Tiel *ennaskita* estas, do, la lingvo (ne la voĉprodukta aparato), ke infanoj ne akiras ĝin de sia ĉirkaŭaĵo, sed ĝi ekzistas kiel konsista parto de ilia homa naturo mem, ĉe kio ne multe gravas en tiu ĉi kunteksto ĉu tiu naturo estas konsiderata kiel antaŭfiksita de supernaturaj fortoj aŭ ne.

Diference de tiu rigardado al la lingvo kiel natura aperaĵo en tiu ĉi aŭ tiu senco, aliaj jam delonge komencis observi ĝin kiel socian fenomenon. Oni komprenis, ke se la lingvo estas io ekzistanta sole en la homa socio, ĝi povas esti eksplikita nur kiel socia fenomeno. Ankaŭ tiu elirpunkto servis por multaj teorioj, malsamaj inter si kaj ofte kontraŭantaj unu la alian. Sed ili havas unu ĝeneralan trajton: ili rigardas la lingvon kiel socian fenomenon, kio ĝi ja objektive estas. Hodiaŭ ne troviĝas unu sola iom serioza filologo aŭ sociologo, kiu ne konsentos pri tiu fundamenta fakto. Alia afero estas, ke ekzistis kaj ekzistas diversaj interpretadoj de tiu fakto.

Mi ne estas unu el tiuj, kiuj juĝas la akcepteblon aŭ malakcepteblon de iu teorio laŭ la naskiĝloko de ĝia aŭtoro aŭ laŭ la politika reĝimo de la lando, en kiu li agas, sed mia sola kriterio estas ĝia interna valoro, surbaze de pruvitaj faktoj kaj raciaj argumentoj. Sed ĉar D-ro Solzbacher evidente havas alian starpunkton, ni malleviĝu por momento al lia konceptado kaj ni donu kelkajn citaĵojn de rekonitaj aŭtoroj nur en la Okcidento, kiuj esprimis adekvatajn pensojn al tiuj entenitaj en la supraĵ citaĵoj de Ŝor, Ĉemodanov kaj Ĉikobava.

Proksimume cent jarojn antaŭ ol aperis la libro de Ŝor kaj Ĉemodanov, la konata lingvisto Max Müller skribis en sia verko *Lekcioj pri la Scienco de la Lingvo*:

„Same kiel ekzistis pli frue familioj, klasoj, kuniĝoj, triboj antaŭ ol ekzistis nacio, tiel same ekzistis dialektoj antaŭ ol ekzistis lingvo.”⁴⁾

Kaj aliloke en la sama libro, pritraktinte la formiĝon de la latina, li konkludis:

⁴⁾ Max Müller, *Lecture sopra la Scienza del Linguaggio, itala traduko el la 3-a angla eldono, Milano 1864, p. 179.*

„Se la plebanoj estus superregintaj anstataŭ la patricioj, la latina estus estinta tre diferenca de tiu, kiu troviĝas ĉe Cicerono.”⁵⁾

La fama A. Meillet diris en sia verko *Lingvistiko Historia kaj Lingvistiko Ĝenerala*:

„Fakte la lingvoj ne estas objektoj havantaj aŭtonoman materian ekziston kaj evoluantaj per si mem. Lingvo estas institucio apartenanta al socia kolektivo, kaj la modifoj, kiujn ĝi trapasas, estas ligitaj al la historio de tiu kolektivo.”⁶⁾

Nu, ni citu ankaŭ elstaran usonan lingviston. Parolante pri la influo de la ĉirkaŭaĵoj al la lingvo, E. Sapir distingis inter la fizika kaj socia ĉirkaŭaĵoj, kaj diris:

„Per aliaj vortoj, kiom la lingvo estas koncernata, la tuta ĉirkaŭaĵa influo reduktiĝas en la lasta analizo al la influo de la socia ĉirkaŭaĵo.”⁷⁾

Ĉu ankoraŭ daŭrigi? Ĉu menciigi ankaŭ la Svison F. de Saussure, kiu fondis sian sociologian skolon sur la fakto, ripetita de li plurfoje, ke „*la lingvo estas socia fenomeno*”? Kaj ĉu alia Franco, J. Vendryès, ne akcentis en sia verko *Le Langage*, ke „la lingvo kiel *socia fenomeno* povis ekesti nur tiam, kiam la cerbo de la homo estis sufiĉe evoluinta por utiligi la lingvon...”, ke, plue, „nur esplorante la *socian rolon* de la lingvo estas eble ricevi imagon kio estas lingvo” k.t.p., k.t.p.

Se iu amuziĝas fari „silogismojn” laŭ la nova „logiko” de D-ro Solzbacher, li apudmetu ĉi tiujn citaĵojn al tiuj de Ŝor & Ĉemodanov kaj Ĉikobava, aŭ al la miaj el *Retoriko*. Koncerne D-ron Solzbacher ekzistas nur du eblecoj: aŭ li ne sciis, ke la lingvo estas socia fenomeno kaj ke multaj elstaraj lingvistoj esploris ĝin kiel tian, aŭ li sciis tion, sed intence prisilentis. En la unua kazo li estas ignoranto, en la dua mallojala (plej milde dirite).

Estas utile aldoni, ke, kvankam hodiaŭ estas ĝenerale forjetita la penso pri la lingvo kiel natura aperaĵo, tamen la ideo pri la „natureco” de la lingvo reaperas eĉ nuntempe en tiu aŭ alia formo, sub tiu aŭ alia preteksto, kun tiu aŭ alia celo. Kiam, ekzemple, oni parolas pri la „naturaj” kaj „artefaritaj” „lingvoj”, tiam jen denove la „natureca” fetiĉo reaperis. Tio okazas ne nur en konversacioj de ordinaraĵoj aŭ en la taggazetaro, sed ankaŭ en diversaj lernolibroj kaj eĉ en verkoj de konataj lingvistoj de la Okcidento kaj, same abunde, en tiuj de Soveta Unio. Se la uzo de tiuj terminoj havus la karakteron de ia poezia komparo, tio ne multe ĝenus. Sed ne estas tiel. Ili estas uzataj en sia vera senco kvazaŭ la naciaj lingvoj estus iaj *naturaj* elkreskaĵoj de *nature* vivanta organismo, la nacio, dum la Internacia Lingvo estus io „artefarita” en senco de *kontraŭnatura*, „elpensita” de

⁵⁾ Verko cit. sub ⁴⁾, p. 60.

⁶⁾ A. Meillet, *Linguistique Historique et Linguistique Générale, Parizo 1926, Vol. I, p. 79.*

⁷⁾ Selected Writings of Edward Sapir, *redaktita de David G. Mandelbaum, Londono 1949, p. 90.*

unu homo kaj tial do sen eblecoj evolui, sen literaturo, sen karaktero de vivanteco... kun la fina blinkenberga rezulto, ke ĝi entute ne estas lingvo.

Se la starpunkto de Prof. Blinkenberg en Montevideo estus izolita, lia nomo ne estus enkondukiginta en la lingvon kiel neologismo por difinita konata koncepto. Ne estas hazardo, ke en la grandega verko de A. Meillet kaj M. Cohen *Les Langues du Monde*, en kiu estas prezentitaj ĉiuj, eĉ la plej malgravaj lingvoj de la mondo, Esperanto ne trovis lokon. Ankaŭ ne estas hazardo, ke, se fine oni tamen decidiĝas prezenti ankaŭ Esperanton, kiel tio okazis en la verko de Mario A. Pei *The World's Chief Languages*, la aŭtoro tuj protektas sin per rezervo, ke la enmeto de Esperanto „devas ne esti interpretita kiel signifanta pledon aŭ aprobon fare de la aŭtoro de ĝiaj principoj aŭ de ĝia konstrumetodo”. Kion oni prave povas postuli de la lingvistoj, se ili vere deziras esti fidelaj al sia propra scienco, estas ne „pledi” aŭ „aprobi” la Internacian Lingvon — same kiel neniu postulas, ke ili „aprobu” kiu ajn lingvon — sed tute simple koni Esperanton kaj *rekoni ĝin kiel socian faktan kun ĉiuj sekvoj de tiu rekono.*

Kun la escepto de kelkaj honorindaj (mi eĉ kuraĝus diri ankaŭ aŭdacaj) filologoj, ĝenerale la lingvosciencaj specialistoj tion ne faras. Se oni malkovras ian forgesitan lingvon de iu tribo fortranĉita de la cetera mondo ie en Centra Afriko, oni formas ekspedicion, elspezas konsiderindajn sumojn, eldonas librojn pri tiu nova eltrovaĵo. Sed kiam la Internacia Lingvo estas alportata per sia literaturo, per siaj diversaj aplikoj en la vivo, per la kongresoj kaj konferencoj al la sojlo de la laborkabinetoj de la filologoj, tiam ili ne vidas aŭ ne volas vidi ĝin. Antaŭ iliaj propraj okuloj, fermitaj bedaŭrinde, ekestis, formiĝis kaj plue evoluas nova lingvo, ĉifoje tuthoma, kiel esprimo de tuthomaraj tendencoj surbaze de la plej pura internaciismo, lingvo sur kiu ili povus — senkonsidere al la simpatio aŭ malsimpatio por ĝia idea fono — perfekte studi interalie ankaŭ la socian karakteron de la lingvo entute. La funkciado de la Internacia Lingvo en la praktiko prezentas per si mem — eĉ se oni flankelasas la kulturajn valorojn kreitajn en ĝi kaj ĝian socian rolon — tian unuarangan lingvan speranton, ke se pro nenio alia, do nur pro ĝi la lingvoscienco devus serioze ĝin studi. Tia studo de Esperanto *ne kiel teoria projekto, sed kiel socia fakto* povus, mi estas certa, multe kontribui al pli bona kompreno de tiuj sociaj fortoj en la plej larĝa senco de la vorto, kiuj ekestigas la lingvon, evoluigas ĝin, helpas aŭ malhelpas ĝian disfalon — ĉio demandoj, kiuj treege interesas la lingvosciencan.

Sed la lingvoscienco — kun kelkaj esceptoj, mi ripetas — ignoras tiun faktan kaj tial aŭ prisilentas ĝin, aŭ, se ĝi entute iel esprimas sin, faras tiajn apriorajn asertojn kaj diras tiajn absurdaĵojn, ke vere tiu tuta babilado havas nenion komunan kun

la realaĵo nek kun la elementaj postuloj de scienca pritrakto. Tiel agas ne nur la kontraŭuloj de la ideo mem, sed ankaŭ filologoj, kiuj persone ne malsimpatias al ĝi kaj kiuj alie klopodas realece rigardi al la lingvo kiel al socia fenomeno, sed kiuj ne iras ĝis la lastaj konsekvencoj de tiu principe korrekta elirpunkto. La ĝisnuna pozicio de la lingvoscienco rilate al la Internacia Lingvo estas la plej malbona atestilo, kiun ĝi povis doni ne al Esperanto, sed al si mem. La unua paŝo, kiun ĝi devus fari por forviŝi la malbonan noton, estus liberigi sin de la „natureca” fetiĉo ankaŭ kiam temas pri Esperanto, kiel ĝi ĝenerale liberiĝis de ĝi studante ĉiujn aliajn, ne nur la naciajn, lingvojn. Farinte tiun paŝon, ĝi normale marŝos antaŭen.

La lingvoevoluo

D-ro Solzbacher skribis, ke laŭ la gazeto *Voprosy Yazykoznanija*,

„oni nun eĉ en Moskvo definitive forĵetis la fantaziajn lingvosciencajn tezojn de Stalin, samtempe kondamnante denove la absurdajn teoriojn de Marr, kiujn Lapenna reklamas en *Retoriko*”. (A.E. 1957, p. 54)

Sur la sama paĝo denove:

„En Esperanto disvastigis la ĉarlatanajojn de Marr... la unua parto de la libro *Retoriko* de Ivo Lapenna.”

Kaj tiel li daŭrigas de unu paĝo al la alia, de unu „epoko” al la alia, ĉiam kun la sama celo: „pruvadi” al siaj legantoj ne nur ke mi akceptis la *lingvistikan* teorion de Marr (kio por lia efektiva celo havas absolute nenian signifon), sed ke mi akceptis ĝin *pro la politika forto*, kiu troviĝis malantaŭ ĝi (kaj tio precize estas la esenco mem de lia tuta fantomromano). Li skribis:

„La sola faktoro, kiu iam donis ian gravecon al la fantaziaĵoj de Marr, estis la potenco de Stalin... Nenio restas de tiu absurda kaj senkreditigita eksteorio de la marksismo-leninismo-stalinismo escepte de la Unua Parto de la *Retoriko* de Lapenna kaj de la versoj en la *Infana Raso* de Auld.” (p. 90)

Denove, do, la fama „logiko”, sed ĉi-foje eĉ pli brila, kiel oni tuj vidos.

Pri la t.n. „lingvosciencaj” tezoj de Stalin ne meritas perdi unu solan vorton. Tiom, kiom tiu politika movo koncernis la Esperanto-Movadon, ĝi ricevis siatempe taŭgan respondon.

Rilate al la teorio de Marr, same kiel rilate al teorio de kiu ajn alia, mia kriterio ne estas kaj ne povas esti la demando, ĉu ĝi ĝuas apogon de iu reĝimo, aŭ ne. Tio ne interesas min. Sekve, mi estus povinta ankaŭ plene akcepti tiun teorion, se mi estus opiniinta, ke ĝi meritas esti akceptita pro ĝia fakta valoro. Kaj tion mi estus farinta tute sendepende de tio, ĉu ĝi estas apogita de la reĝimo aŭ ne. Eĉ en tiu okazo la akcepto de teorio neniel povus esti interpretata kiel ideo akcepto de la politika reĝimo.

Tiom, tute principe:

Konkrete la faktoj estas jenaj:

(1) La Unua Parto de *Retoriko* ampleksas 59 paĝojn. Nur sur 5 estas treege koncize prezentitaj kelkaj punktoj de la teorio de Marr (pp. 20—25). Ĉu tio estas „la Unua Parto”, kiel asertas D-ro Solzbacher?

(2) Je la fino de tiu malgranda subĉapitro mi skribis: „ESTAS TUTE CERTE, KE MULTAJ PUNKTOJ DE LA TEORIO DE MARR NE POVAS ESTI AKCEPTITAJ” (p. 25)⁸⁾. Ĉu tio signifas akcepton, aŭ eĉ „reklamadon”, de la teorio de Marr, kiel tion asertas D-ro Solzbacher?

(3) En la momento, kiam mi skribis la verkon, Marr estis delonge mortinta (1934) kaj lia teorio jam atakita de Stalin. Ĉu tio, do, pravigas la hontindajn politikajn akuzojn de D-ro Solzbacher?

La vero estas, ke D-ro Solzbacher devis ne nur fari „silogismojn” laŭ la nova „logiko”, sed ankaŭ falsi la „premisojn” eĉ de tiaspecaj „silogismoj” por provi atingi sian celon. Aginte tiel, li fakte kreis ian fantoman, reale neekzistantan estajon, produkton de sia propra fantazio kaj tial liaj lanĉoj trafas malplenon.

En *Retoriko* mi skribis — kaj tion mi rekonfirmas ĉi tie — ke al la teoriaj konkludoj de Marr pri la LINGVOEVOLUO donas apogon la malkovroj sur la aliaj sciencaj kampoj (p. 25). La demandon pri la evoluoj de la lingvo mi opiniis gravega ĝenerale, sed tute speciale por la korekta kompreno de la pozicio de Esperanto. Tial mi pri-traktis ĝin en du ĉapitroj de *Retoriko*.⁹⁾

Ĉi tie estus bone aldoni kelkajn vortojn.

Fakto estas, ke ne ekzistas homgrupo sen lingvo, nek lingvo sen homgrupo kiel ĝia portanto. Estas ankaŭ facile kontrolebla fakto, ke ju pli malalta estas la nivelo de civilizo, des pli multnombraj estas la lingvoj. Male, kun la progreso de la civilizo formiĝas ĉiam pli grandaj lingvoj, parolataj sur ĉiam pli vastaj teritorioj fare de ĉiam pli ampleksaj sociaj grupoj.

⁸⁾ La fakto, ke mi opiniis kaj opinias multajn punktojn en la teorio de Marr neakcepteblaj, neniel signifas, ke mi en kiu ajn senco aprobas tiujn lingvosciencajn ĉarlatanaĵojn kaj insultajn esprimojn pri Marr kaj lia ĝenerala lingvistika agado, kiujn eldiris Stalin kaj liaj tiamaj sekvantoj kaj kiujn D-ro Solzbacher transportis en Esperanton el la rusa originalo. Marr havas sian lokon en la historio de la lingvoscienco (vidu, ekzemple, la grandegan verkon *Les Langues du Monde de Meillet-Cohen*, Paris 1952, pp. 253—254). Se ĉiu filologo — kaj ne nur filologo — kiu faris erarojn en siaj teorioj estus pro tio tuj nomata „ĉarlatano”, ne ekzistus filologoj, sed nur „ĉarlatanoj”. La vera senco de la kampanjo de Stalin kontraŭ Marr estis politika. Stalin forjetis lian doktrinon ne tiom pro tio, kio en ĝi estis efektive kontestebla, sed tial, ĉar ĝi ne respondis al la interesoj de la stalinisma grandrusa imperialismo, kiu samtempe glorigis la rusan lingvon kiel „la internacian lingvon de socialismo”. L. Laurat publikigis pri la tuta afero bonegan studon en la franca lingvo sub la titolo *Staline, la Linguistique et l'Impérialisme Russe (Stalin, la Lingvistiko kaj la Rusa Imperialismo)*, Paris '51.

⁹⁾ *Retoriko*, pp. 29 kaj sekv. En la dua eldono de *Retoriko*, nun kompostata, la tuta Unua Parto (Lingvo) kaj precipe la ĉapitro pri la Faktoroj Influantaj la Lingvoevoluo estas konsiderinde kompletigita.

La homo estas sociema estulo kaj tia tute certe estis ankaŭ lia praulo. La individuo ĉiam apartenis kaj apartenos al iu socia grupo. La konkreta karaktero de socia grupo dependas de multaj faktoroj kaj eksteraj (la ĉirkaŭanta naturo) kaj internaj (la sociaj institucioj kreitaj en la grupo mem en la daŭro de ĝia evoluo), sed la eksteraj ĉiam pli perdas sian gravecon paralele kun la subigado de la naturaj fortoj al la interesoj de la homo, dum la internaj samtempe plipeziĝas.

Tiuj faktoroj, kiuj influas la formiĝon de iu homgrupo kaj donas al ĝi ĝian apartan karakteron, influas ankaŭ ĝian lingvon. Kiam ajn iu homgrupo formiĝas kiel socia unuo kun distingaj trajtoj, ĝi kreas al si sian lingvon surbaze de la konkretaj bezonoj, dependantaj de la atingita evoluŝtupo kaj de ĉiuj elementoj, kiuj ĝin kaŭzis. La lingvo siavice helpas al kunteno de la socia grupo kaj ĉe la uzantoj plifirmigas la senton de aparteno al la grupo.

Rilate la lingvon kelkaj faktoroj influas diferencige (disige), dum la aliaj agas unuecige (kuntene). Superflue diri, ke ilia influo sur la lingvon ne estas simple mekanika, sed tre kompleksa. Ili interplektiĝas, influas unu la alian, estas pli gravaj en unu socia grupo, malpli gravaj en alia, pli efikaj sur unu evoluŝtupo, malpli sur alia, estas mem influataj de la lingvo aŭ per ĝi, agas sur la homan menson kaj estas ŝanĝataj de tiu menso k.t.p. Kun la rezervo de la ĵus esprimita penso, en la lasta analizo estas ili, kiuj kondiĉas la lingvon de la homgrupo. En tiu senco estas korekta la difino de Sapir pri la lingvo kiel „aro da simboloj reflektantaj la tutan fizikan kaj socian fonon, en kiu iu homgrupo estas lokita”.¹⁰⁾

Tiel eksplikiĝas la ekzisto kaj karaktero de lingvoj hordaj, gentaj, tribaj, popolaj, naciaj, internacia unuflanke; klasaj, kastaj, religiaj, eĉ virinaj¹¹⁾ aliflanke. Tiuj lastaj, specialaj, lingvoj estas neniel neglekteblaj. Oni komprenos la gravecon de la specialaj lingvoj — diras A. Meillet — se oni konsideras, ke tribo en la Sudo de Hindio, kiu konsistas el nur ĉ. 800 personoj, „havas 3 specialajn religiajn lingvojn, unu slangon kaj unu dialektan dividon de socia origino”.¹²⁾

Ni ne faru ekskurson tiel malproksime en la historion por observi la klasan influon ĉe la formiĝo de la latina, nek ni veturu al tiel malproksimaj regionoj kiel Ameriko aŭ Hindio por konstati la influon de la geografia, klasa, religia, seksa k.a. faktoroj je la formiĝo de diversaj lingvoj. Ni vidu kio okazas ĉi tie, en tiu ĉi grandega kultura mond-

¹⁰⁾ E. Sapir, laŭ la verko cit. sub ⁷⁾, p. 90.

¹¹⁾ E. Sapir priskribis la grandajn diferencojn de la vira kaj virina lingvoformoj de la Yana-lingvo. La vira formo estas uzata nur inter viroj, dum la virina aplikiĝas en la konversacio inter la virinoj aŭ inter la virinoj kaj la viroj. (Laŭ la verko citita sub ⁷⁾, pp. 206 kaj sekv.)

¹²⁾ A. Meillet, verko cit. sub ⁶⁾, p. 115.

centro, kie estas skribataj tiuj ĉi linioj. Jen kion diras profesorino de la angla lingvo en la Universitato de New York, kiu certe ne povas esti suspektata kiel adepto de Marr:

„En la kadro de la angle parolanta mondo verŝajne la plej akra kontrasto estas trovebla inter la *Cockney* londona dialekto unuflanke kaj la lingvo de la „supera klaso“ („upper-class“) aliflanke. La Londonanoj ne hontas rekoni tiun kontraston: ili estas tre sinceraj rilate la ekziston de klasaj niveloj en la lingvo.“¹³⁾

Marr certe eraris, kiam li troigis la influon de la klaso al la lingvo kaj eĉ konsideris ĝin la sola lingvokrea faktoro, sed estas same tiel erare nei ĝian pli aŭ malpli grandan rolon en la evoluo de la lingvo, depende de la konkreta strukturo de la koncerna socia grupo. Por citi ankoraŭfoje Meillet: „Ĉiu socia diferencigo havas ŝancon esprimiĝi kiel lingva diferencigo“.¹⁴⁾

En sia longa historio la homo daŭre kreadis al si ĉiam pli efikajn rimedojn de produktado, larĝigadis la kontaktojn, pasadis al pli altaj formoj de socia kunvivado, formadis ĉiam pli ampleksajn superajn sociajn unuojn, dum la pli malsupraj formoj aŭ tute malaperadis aŭ perdadis sian antaŭan signifon. Paralele kreiĝadis laŭ diversaj manieroj ankaŭ komunaj lingvoj, kiuj servis por komunikado interne de la nova unuo (aŭ eĉ ekster ĝi, se ĝi estis sufiĉe forta por altrudi sian lingvon al aliaj), dum la antaŭaj lingvoj aŭ malaperadis aŭ konservadis kaj ofte ankoraŭ konservas sole regionan aŭ eĉ nur lokan karakteron.

La hodiaŭa lingva stato, plena de evolua dinamismo, donas bildon ne de lingvoj dividitaj inter si per akraj linioj, sed prefere prezentiĝas kiel multkolora eksterordinara kubforma spektro, en kiu la diversaj lingvoj (inkluzive la dialektojn, slangojn kaj aliajn lingvajn formojn) simile al koloroj transversiĝas unu en la alian, interpenetras sin reciproke, sed tamen ne nur malsamas horizontale de unu lingva regiono al alia, sed ankaŭ varias vertikale de unu klaso, profesio, okupo kaj simile al alia. Kaj tiel la lingvo en sia tuteco respegulas la aktualan kompleksan socian strukturon kiel la ĝis nun atingitan rezulton de la historia evoluo.

Individuo aŭ kolektivo

Kiu estas la rolo de la individuo en la kreado de la lingvo?

Certe la individuo kiel membro de la koncerna socia grupo kaj sekve ankaŭ de la lingva komunajo partoprenas en la kreado de la lingvo. Sed tiu

¹³⁾ *Margaret Schlauch, The Gift of Tongues, London 1949, pp. 261—262. Al la supra citaĵo oni povus nur aldoni, ke tiu „kontrasto“ estas tia, ke neniu persono, kiu konas nur la literaturan anglan lingvon — eĉ ne Angloj mem — povas kompreni la londonan Cockney.*

¹⁴⁾ *A. Meillet, verko cit. sub 6), p. 113. Meillet plue konstatas, ke ekzistas gravaj diferencoj en moderna granda urbo inter la „lingvo de la burĝaro“ kaj la „lingvo de la laboristoj“: ke ekzistas „klasoj kaj subklasoj, ĉiu el ili kun siaj lingvaj apartaĵoj“ (p. 113 kaj sekv.).*

lia kreado ne estas, nek povas esti, arbitra, tute laŭplaĉa. Individuo, kiu agas tiel, eksigus sin mem el la lingva komunajo. La lingvokrea agado de la individuo devas esti konforma al la bezonoj de la socia grupo por esti efika. Iom simple, fakte iom tro simple, Mario Pei diris tion en libro por la junularo per jenaj vortoj:

„La fina decido pri tio ĉu iu ŝanĝo eniras en la lingvon dependas ne de tiu, kiu faras la ŝanĝon, sed de la centoj kaj miloj kaj milionoj, kiuj estas vokitaj akcepti ĝin.“¹⁵⁾

Ne nur en tiu kvalito, sed ankaŭ kiel apartenanto de specialaj sociaj kungrupigoj en la kadro de la socia grupo la individuo kontribuas al evoluigado de la lingvo. Tiamaniere la lingvo estas la plej demokrata kreaĵo de la homa socio, ĉar ĝi estas produkto de ĉiuj, surbaze de la plej reale ekzistantaj fortoj en la socio kaj surbaze de la efektiva graveco, kiun en difinita tempo havas unuopulo aŭ aparta socia kungrupigo en la socio. Tiu graveco — oni komprenu bone — ne estas iu graveco antaŭfiksita por ĉiuj tempoj kaj por ĉiuj sociaj grupoj: ekzemple fizika forto, nombro, ekonomia potenco, socia pozicio, intelektaj valoroj k.s., kvankam ĉiu el tiuj, aŭ pluraj el ili, aŭ ĉiuj en diversaj gradoj povas esti decidaj en tiu aŭ alia socia grupo depende de ĝia fakta karaktero kaj de la fortorilatoj en ĝi. La lingvokrea agado povas esti pli aŭ malpli spontana, pli aŭ malpli konscia, sed la „konscienco“ certe ne faras ĝin „artefarita“ en la senco de „kontraŭnatura“, se nur tiu agado estas konforma al la bezono de la kolektivo, kio estas esenca. Tio rilatas al ĉiuj lingvoj inkluzive, kompreneble, Esperanton.

La fakta socia portanto de la lingvo, do, ne estas la individuo, sed la kolektivo. Tion perfekte komprenis la genio de D-ro Zamenhof. Tial li rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj kaj lasis, ke Esperanto kresku kaj progresu „laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj“. Kaj tio efektive okazis kaj plue okazas.

Sed je tiu ĉi punkto por multaj, ankaŭ por la grandega plimulto de filologoj, ekestas la demando, kiu kaŭzas tiom da konfuzo kaj tiom da miskonkludoj. Se vere la efektiva portanto de la lingvo estas ne individuo, sed iu socia grupo, do kiu socia grupo estas la portanto de la Internacia Lingvo? Ekzistas triboj, ekzistas popoloj, ekzistas nacioj kaj ili havas siajn tribajn, popolajn, naciajn, lingvojn. Sed kie, do, estas — oni demandas — tiu „internacia popolo“, kies lingvo estas la Internacia? Ĝi ne ekzistas kaj sekve ne povas ekzisti tia lingvo en la vera senco de la vorto. Esperanto povas, eble, taŭgi por esprimi en ĝi „la urugvajajn menuojn“ (Prof. Blinkenberg en Montevideo), aŭ esti iu ekzercilo por la cerbo „pli taŭga ol estas la ŝakludado“ (pluraj „amikaj“ lingvistoj en diversaj verkoj), aŭ konveni kiel interesa „hobio“ (flankokupo) simile al kolektado, ni diru, de paserovoj

¹⁵⁾ *Mario Pei, All About Language, London, 1956, p. 14.*

(aŭ prezeraroj, se vi preferas) tra la mondo, sed ĝi ne povas esti vera, vivanta lingvo!

Nu, la tuta konfuzo de tiu fundamente erara starpunkto estas, ke oni pretervidas tre simplan fakton, nome ke la samaj individuoj povas esti apartenantoj de diversaj sociaj grupoj kun propraj lingvaj esprimoj. Se oni ĵetas rigardon al la multnombraj dialektoj (kiuj nomiĝus „lingvoj”, se super ili ne starus la komuna nacia lingvo), oni facile rimarkas, ke la samaj personoj, kiuj kiel aparta regiona socia grupo estas portantoj de la koncerna dialekto, samtempe formas parton de la nacia kolektivo kaj *en tiu kvalito* prezentas la socian fonon de la nacia lingvo. La samaj personoj povas, plue, aparteni al iu profesio, religio, okupo, flanka interesiĝo kaj *kiel tiaj* konsistigas la grundon, el kiu kreskas specialaj lingvoformoj.

La grandega evoluo de ĉiuj ekonomiaj fortoj en la moderna epoko kun la rapidega progresado de la scienco ne nur kaŭzis la kreon de abunda lingvo-materialo kun internacia karaktero, sed ankaŭ ĉiam pli impete puŝas la homaron al multe pli forta integriĝo. Tiu objektiva evoluprocezo devis interalie naski novan senton de efektiva (ne abstrakta, ekzemple nur en filozofia penso) aparteno al la plej vasta socia unuo, kiu samtempe konkretiĝas kiel tia: al la homaro. Kaj la plej pura esprimo de tiu vivanta sento estas la Internacia Lingvo, kiu siavice fortikiĝas ĝin.

Kaj tiel la samaj personoj — certe ankoraŭ ne multnombraj — kiuj pro tio ne ĉesas esti apartenantoj de sia nacia aŭ regiona lingva komunajo aŭ de kiu ajn alia lingva kungrupiĝo, manifestas *plian aspekton* de sia socia personeco: la apartenon al la homaro (kio, kompreneble, ne signifas ke ili, ekzemple, ĉesas esti friponoj, se ili estas fakte tiaj, kiel la grandega plimulto de la esperantistoj en sia honesteco kaj idealismo emas kredi). En *tiu aspekto* ili reale formas tiun *monde* (ne „okcidente” aŭ „oriente”, sed monde) internacian socian forton, sur kiu kuŝas la Internacia Lingvo. El la ĵus prezentita vidpunkto Esperanto, do, ne estas paralela al la dialektoj aŭ al la naciaj lingvoj, nek adekvata al slangoj kaj al similaj lingvoformoj. Esperanto estas unu el la tri lingvoj, troviĝantaj vertikale *unu super la alia* ne el vidpunkto de „kareco” (ili estas same karaj), sed el vidpunkto de la *tri ĉefaj aspektoj*, en kiuj manifestiĝas la socia aparteno de la samaj personoj: al la regiono — la regiona dialekto; al la nacio — la nacia lingvo; al la homaro — la internacia Esperanto.

Helpa aŭ universala lingvo?

Ĉio dirita montras, ke la esprimoj „natura” aŭ „artefarita”, kiam ili estas aplikataj al kiu ajn lingvo, estas absolute maltaŭgaj, science nepravigebaj, konfuzaj kaj erarigaj.

Sed kio pri la esprimoj „helpa” kaj „universala”?

D-ro Solzbacher skribis:

„Komparu kun la fantaziaj ideoj de Lanti, Drezen kaj Lapenna — pri „batalo kontraŭ naciaj lingvoj”, „formortado de la naciaj lingvoj” kaj evoluo „de multlingveco al unulingveco” — la klarajn, modestajn kaj inteligentajn vortojn de Zamenhof, kiu... prezentis la argumenton, ke la uzo de internacia lingvo ne malhelpos, sed helpos la naciajn lingvojn” (A.E., 1957, pp. 56—57)... „La fakto, ke Lapenna radikale forjetas la Zamenhofan ideon de internacia lingvo, kiu neniel kontraŭas la naciajn...” k.t.p. (A.E., 1957, p. 56).

Denove samspeca intermiksado, konfuzado, falsado, kreado de fantoma, neekzistanta personeco. Mi ne skribos ĉi tie pri Drezen kaj Lanti. Iliajn ideojn — cetere malsamajn inter si — mi certe ne akceptas, sed mi ja rilatas kun respekto al personoj, kiuj donis grandegan parton de sia vivo por Esperanto kaj el kiuj unu tre kredeble estis mortigita kaj la alia devis ĉesigi sian vivon en malfacilaj cirkonstancoj. Eĉ pli, mi havas sinceran admiron por Lanti kiel iniciatinto kaj partopreninto de la grandega laboro, kiu rezultigis la elstaran verkon Plena Vortaro, sen kiu Esperanto ne estus ankoraŭ atingita la unuan stadion.

Sed ni vidu kiel aspektas tiu mia „radikala forĵeto” de la Zamenhofa ideo pri internacia lingvo. En 30 jaroj de mia praktika uzado de Esperanto kaj de mia laboro por ĝi mi ne nur NENIAM ESPRIMIS MIN KONTRAŬ LA NACIAJN LINGVOJN, SED TUTE MALE ĈIAM AKCENTIS KAJ AKCENTAS, KE ĜUSTE LA AKCEPTO DE ESPERANTO KIEL KOMUNA INTERNACIA LINGVO PREZENTAS LA SOLAN EBLAN PROTEKTON POR LA NACIAJ LINGVOJ. En miloj da paĝoj, kiujn mi ĝis nun skribis en Esperanto, en centoj da paroladoj mi tuŝis plurfoje tiun demandon kaj mia starpunkto ĉiam estis kaj plue estas, ke la homaro, sub la premo de la fortoj pritraktitaj supre, nepre devas havi lingvon por la ĉiam pli ampleksaj internaciaj rilatoj; ke tiu lingvo povas esti aŭ iu perforte altrudita nacia lingvo, resp. kelkaj tiaj lingvoj en diversaj „zonoj”, kio signifus detruon de la aliaj naciaj kulturoj kaj naciaj lingvoj, aŭ Esperanto kiel esprimo de integriĝo surbaze de egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, de ĉiuj naciaj lingvoj. Analizante, ekzemple, la situacion en 1941 kaj skizante la perspektivojn por la postmilita periodo, mi skribis en la lasta numero de *La Suda Stelo*, senpere antaŭ la etendiĝo de la milito al Jugoslavio, artikolon (poste represitan en *Esperanto Internacia*, julio-aŭgusto 1941), en kiu mi diris konklude:

„Ni, do, vidas, ke la estonta mondo prezentos unu densan reton de ekonomia kaj kultura ligiteco, en kiu ĉiuokaze la popoloj konservos siajn naciajn lingvojn kaj kulturojn.” (kursivo en la artikolo).

En *Retoriko* (p. 52) mi skribis:

„Inter la naciaj kaj la Internacia Lingvo ekzistas nur unu gravega diferenco, nome diferenco de celo, al kiu ili servas: dum la naciaj lingvoj havas la taskon kontentigi la limigitajn bezonojn de pensado kaj de komunikado en naciaj kadroj, la Internacia Lingvo liberigas la penson de la naci-

lingvaj ĉenoj kaj flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio, tra la tuta mondo."

Ĉu tio, do, signifas „radikalan forĵeton” de la Zamenhofa ideo? Zamenhof skribis en la Antaŭparolo al sia verko en 1887 pri Esperanto:

„Ne kontentiĝante je *internacieco*, ĝi devas ankoraŭ fariĝi *tutmonda*, t.e. atingi tion, ke la plejparto de la mondo scianta legi kaj skribi povu libere paroli ĝin.”

La ideo de Zamenhof estis, ke Esperanto estu uzata por ĉiuj internaciaj rilatoj kaj ke la naciaj lingvoj estu uzataj en la naciaj kadroj. Mia starpunkto identas al tiu. Ĝi estis kaj plue estos la gvidprincipo de mia tuta agado por la Internacia Lingvo.

Ĝuste tial mi nomis ĝin ĉiam kaj plue nomas aŭ „Esperanto” aŭ „La Internacia Lingvo”. D-ro Solzbacher skribas kun aprobo pri la uzado de la epiteto „helpa” fare de Prof. Bokarev en prelego farita en la Lingvosciencia Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj. Li eĉ konstatis, ke tiu adjektivo aperis „ne malpli ol sesfoje en la raporto”. Mi nek nombris, nek nombros la „fojojn”, sed mi scias ke Prof. Bokarev (kies laboron mi, cetere, alte aprezas) uzis tiun epiteton kaj ke ĝi estis uzita ankaŭ sur la titolpaĝo de la malgranda lernolibro de N. D. Andrejev, publikigita en Leningrado (1957) en 95.000 ekzempleroj. Tute egale ĉu tiun esprimon uzas Prof. Bokarev, aŭ D-ro Solzbacher (kiel belan „silogismon” oni denove povus fari!) aŭ kiu ajn alia, mi opinias ĝin absolute malkorekta, konfuza kaj erariga. Neniu venas al la ideo nomi la naciajn lingvojn „helpaj”, kvankam ili esence havas la saman pozicion rilate la regionajn dialektojn, kian havas Esperanto rilate la naciajn lingvojn. Kaj se oni sub „helpa” komprenas, ke Esperanto devus esti ia plia, en tiu ĉi okazo fakte nur helpa, lingvo en la internaciaj rilatoj, aldone al la „veraj” „internaciaj” lingvoj, nome al la grandaj naciaj lingvoj uzataj ankaŭ en internaciaj rilatoj, tiam la esprimo estas des pli malakceptinda. La naciaj lingvoj restas naciaj el ĉiuj vidpunktoj eĉ kiam ili estas utiligataj por internacia komunikado kaj tial ili ne povas esti konsiderataj nek nomataj „internaciaj”. Esperanto ne havas la taskon „helpi” al ili en tiu falsa rolo de „internaciaj” lingvoj, sed tute male ludi la solan rolon de efektive vera internacia lingvo: internacia laŭ la interna strukturo, laŭ la celo, laŭ la apliko kaj ĉefe laŭ la socia portanto. Tial Esperanto ne povas esti nomata „helpa”, sed nur la Internacia Lingvo. Tamen, se la uzo de tiu maltaŭga kaj nepravigebla vorto estas la kondiĉo de agado por Esperanto en iu lando aŭ iu medio, se, do, la cirkonstancoj nepre devigas apliki ĝin, estas certe pli bone labori por la Internacia Lingvo prezentante ĝin kiel „helpan” ol entute nenion fari.

Por komplete konfuzi la legantojn, D-ro Solzbacher patose demandas la estintajn estraranojn de UEA: „Ĉu ili akceptis la marksistan-leninistan

tezon pri universala lingvo anstataŭ la naciaj lingvoj?” Kompreneble, tiu esprimo „universala lingvo” devus denove esti mia kaj malantaŭ ĝi devus denove kaŝiĝi difinita politika koncepto. Mi ne opinias, ke la uzo de tiu esprimo „universala” estas en kiu ajn senco tragika, precipe ne, se el la kunteksto klare vidiĝas, ke oni pensas per tio al komuna lingvo por la internaciaj rilatoj. En tiu senco ĝi estas ofte uzata. Eĉ en la *Brita Enciklopedio*. Sed mi mem-NENIAM UZIS TIUN ESPRIMON en mia tridekjara laboro por Esperanto krom se mi kritikis ĝin kiel netaŭgan ĝuste tial, ĉar ĝi povus krei la impreson ĉe la aŭskultantoj aŭ legantoj, ke la celo de la esperantismo estas forigi la naciajn lingvojn. D-ro Solzbacher, do, ne povis trovi tiun esprimon en miaj libroj, broŝuroj, artikoloj. Sed kie li povas ĝin daŭre trovi, estas precize la kovrilpaĝo de lia gazeto, kie oni legas de numero al numero reklamon: „INTRODUCTION TO ESPERANTO THE UNIVERSAL LANGUAGE” (enkonduko al Esperanto, la Universala Lingvo)!!! Kredu aŭ ne, estas precize tiel. Do, nia majstro de logiko bonvolu apliki sian brilan argumentadon kun ĉiuj variacioj pri tiu temo al *Amerika Esperantisto* kaj al ĝiaj redaktoroj, nome al si mem kaj al sia amiko.

La geniaj infanoj

D-ro Solzbacher citis el *Retoriko* kaj el *La Internacia Lingvo* kelkajn ciferojn pri la tre modesta individua vortprovizo kompare kun la ĝenerala vortotrezoro de iu lingvo. Kelkaj el tiuj ciferoj eniris siatempe en la *Nefermitan Leteron* al Stalin kun la celo montri, ke la individua vorta provizo, precize inverse al la aserto de Stalin, prezentas eble 1% de la tuta vortara riĉaĵo de iu lingvo. D-ro Solzbacher skribis pri tio:

„La *Nefermita Letero* al Stalin diras: 'Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la deknaŭa jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn. Meze kleraj homoj posedas kutime 4000—5000 vortojn'. Tiuj ciferoj estas absolute idiotaj. La estraranoj de UEA ne devus havi la rajton ridindigi la Esperanto-movadon per subskribado de tiaj fuŝaĵoj.' (A.E. 1957, p. 59)

Poste li citis parteton el verko de Mario Pei, laŭ kiu grupo da psikologoj venis al konkludo, ke 4-jara infano scias 5.000 vortojn, 6-jara 14.000, 8-jara 26.000, 10-jara 34.000. Laŭ alia kalkulo, 6-jara infano posedus 2.000 ĝis 3.000 vortojn, stulta plenkreskulo 10.000, mezklera 35.000 ĝis 70.000!

Unue ni rigardu iom tiujn fantaziajn ciferojn, tiel senkritike reproduktitajn! Komparu la vortprovizon de tiu abstrakta 10-jarulo (34.000) kun unu el la mezkleraj plenkreskuloj (35.000). Kion montras tiu komparo? Ke nia genia 10-jarulo ne plu devas studi por atingi la nivelon de meza klereco, ĉar li ja posedas ĝin! Poste komparu tiun belan diferencon inter 35.000 kaj 70.000 vortoj de mezkleruloj! Kiam oni donas unu pomon al knab-

eto kaj poste ankoraŭ unu, li komprenas ke li havas la *duoblon* kaj ke li povas fordoni unu al sia fratino. Sed ŝajnas ke la koncernaj psikologoj kaj D-ro Solzbacher kun ili ne komprenas, ke 70.000 estas la *duoblo* de 35.000, nome ke nia sepdek-mil-vortulo povas facile forĵeti nek pli nek malpli ol 35.000 vortojn kaj tamen ankoraŭ resti en la kategorio de mezkleruloj! Sed kio, do, estas 35.000 vortoj. Komprenu bone: ne 35, ne 350, eĉ ne 1.000, sed 35 fojojn mil! Prenu kiun ajn dulingvan vortaron de sur via bretaro kaj vidu kiom da vortoj ĝi entenas, se tio estas indikita. Mi konstatas, ke la plej ampleksa je mia dispo en la nuna momento — la Rusa-Franca de Ŝerba kaj Matuseviĉ kun 842 grandformataj (23x18 cm) paĝoj — enhavas 50.000 vortojn. Vi povos konstati la samon. Vi plue konstatos, ke mezgrandaj bonaj vortaroj enhavas ĉ. 25.000 vortojn, dum multaj t.n. poŝvortaroj entenas ne pli ol 6.000 vortojn.

Kion, do, faros tiu nia genia 10-jarulo (por ne paroli pri la „supra“ mezklera plenkreskulo) kun tiuj mizere malriĉaj vortaroj? — Nenion, ili estas preskaŭ neuzablaj! Kaj evidente: oni ne presigas vortarojn kun 25.000 vortoj en centmiloj da ekzempleroj por plenkreskuloj, eĉ ne por dekjaruloj, sed nur por infanoj sub la sesa jaro kaj por „stultaj plenkreskuloj“! Kaj eĉ ili certe ne trovos multajn vortojn en tiuj vortaroj, ĉar, nature, ankaŭ ilia vortprovizo ne estos samspeca ĉe ĉiu unuope: ekzemple, konkreta 6-jara genia infano kun 14.000 vortoj de, ni diru, franca verkisto certe ne havas precize la samkvalitan vortprovizon kiel konkreta 6-jara genia infano kun 14.000 vortoj de poŝtisto en la montoj de Bosnio. Estas vere bedaŭrinde, ke D-ro Solzbacher ne konis la libron de Usonanino Elizabeth B. Hurlock, *Child Development* (Infan-evoluo), 1956, laŭ kiu, mi ĵus informiĝis, lernanto en unuagrada lernejo disponas pri 20.000 ĝis 80.000 vortoj! Kompata Shakespeare, kiu skribis siajn verkojn nur per 16.000 vortoj! ¹⁶⁾

¹⁶⁾ Unu el la ne tre oftaj vere seriozaj verkoj, pritraktantaj la lingvoevoluo ĉe la infanoj, estas tiu de Prof. C. W. Valentine, *The Psychology of Early Childhood* (La Psikologio de Frua Infanaĝo), publikigita en Londono en 1942. En tiu verko unu tuta ĉapitro estas dediĉita al la ekuzo kaj evoluo de la lingvo ĉe la infanoj (pp. 392—448). Pro manko de spaco estas neeble pritrakti ĉi tie la tutan demandon kaj donante nur ciferojn, sen klarigoj kaj komentoj, oni riskus falsi la seriozecon de la laboro sur tiu kampo. Tamen estas bone rimarkigi, ke infano ofte nur ripetas vorton sen kompreno de la signifo. Kiam, ekzemple, dujara knabeto subite, sen ia ajn kunligo, diras „absolute paĉjo“ (p. 447), tiam evidente li nur ripetas la plurfoje aŭditan esprimon „absolute“, sed ne komprenas ĝin. Sekve, oni ne rajtas aserti, ke li „scias“ la vorton „absolute“, eĉ ne laŭ la plej larĝa kriterio de „socia identigo“. Ĉar en tiu okazo oni povus paroli ankaŭ pri „scio“ de vortoj ĉe papagoj, aŭ eĉ ĉe orangutangoj, hundoj kaj ŝafoj. Aliflanke, ekzemple, la uzo de „sub“, „sur“ kaj „en“ (infano de 2; 2½) montriĝis korekta, kiam temis pri meto de karto „sur, en aŭ sub skatolon“, sed malkorekta kiam la infano mem estis instigata „iri en, sur aŭ sub la seĝon, otomanon aŭ liton“ (p. 439). Ankaŭ en tiu ĉi kazo oni malfacile povus

Parolante pri la scio de vortoj, estas necese interkonsenti pri la signifo de „vorto“ kaj pri tiu de „scio“. Kompreneble, se oni konsideras kiel *apartan vorton* ĉiun fleksion, tiam la nombro estas multe pli granda, tute speciale en forte fleksiaj lingvoj kiel la rusa, la kroata k.a. Sed en tiu okazo oni devas *adekvate* pligrandigi la tutan vortaron provizon de la koncerna lingvo kaj sekve la rilato inter la individua posedo kaj la ĝenerala vortprovizo restos proksimume la sama (ne tute precize, ĉar ne ĉiuj vortoj havas la saman nombron de fleksiaj modifoj). En tiu okazo, kompreneble, rusa aŭ kroata infano „scius“ pli da vortoj ol samaĝa, sammedia kaj same inteligenta angla aŭ usona. Tiu aspekto de la afero povus esti interesa, sed ĝi ne rilatas al la vortprovizo kiel efektiva reflektado de la scio. Por tiu celo kiel „vorto“ povas esti konsiderata nur tio, kio kutime eniras en la vortarojn kiel aparta vorto.

Rilate la signifon de „scio“ oni devus preni kiel kriterion minimume la difinojn donitajn en la samlingvaj vortaroj, ekzemple por Esperanto en la Plena Vortaro. Se oni tiel agus, oni tuj vidus kiel modestega estas la individua preciza kono de la signifo de la vortoj. Ĉiu povas facile konstati tion por si mem. Sed estas eble kontentiĝi ankaŭ per multe pli malsevera kriterio, nome per la kriterio de la plej larĝa *socia identigo* de la vorto, resp. de la ideo, kiun ĝi signas: ke „suno“ estas la plej granda objekto normale videbla sur la ĉielo, ke „pluvo“ estas akvo falanta el la nuboj k.t.p. sen iaj pli detalaj aŭ pli profundaj konoj. Max Müller verŝajne prenis tiun larĝan kriterion, kiam li skribis, ke *kelkloke* angla kamparano ne uzis pli ol 300 vortojn en tiu tempo. Kaj li plue diris:

Bone edukita Anglo... malofte uzas en la konversacio pli ol 3.000 ĝis 4.000 vortojn proksimume kaj elokventaj parolantoj povas atingi la kvanton de 10.000 vortoj je sia dispo ¹⁷⁾.

Anglo, nomita D'Orsay, prezentis antaŭ pluraj jaroj studon, en kiu li konkludis, ke „la uzvortaro de analfabetoj kaj duonalfabetoj ne transpasas 500 vortojn“. ¹⁸⁾ La prezidanto de la *Linguaphone Institute* taksis antaŭ nelonge, ke ordinara (meza)

diri, ke la infano „scius“ la veran signifon de la tri prepozicioj. Alta infano (6-jara), speciale talenta por la lingvo, aŭdinte la vortojn „elipsa frazo“, volis scii kion ĝi signifas. Post kiam li ricevis la klarigon, li diris: „Mi komprenas. Se mi diras: 'Tio ĉi estas dimanĉo', ĝi estas 'lipsa frazo'“. Kiam oni klarigis al li, ke tio ne estas elipsa frazo, ĉar nenio estas ellasita, li respondis: „Jes, estas: 'ne' estas ellasita. Tio ĉi ne estas dimanĉo, estas lundo!“ — Entute, estas necese treege atente trakti la infanan lingvon, prenante en konsideron la specialan karakteron de la infana psiko kaj multajn aliajn elementojn, el kiuj la socia ĉirkaŭaĵo havas unuarangan signifon. Eljetadi multmilajn ciferojn estas, milde dirite, neserioze kaj senrespondece.

¹⁷⁾ M. Müller, verko cit. sub ¹⁾, p. 268.

¹⁸⁾ Mario Pei, *The Story of Language*, London, 1957, p. 112.

persono utiligas ĉ. 1.000 uzeblajn vortojn en sia vivo kaj malofte transpasas 1.200 vortojn.¹⁸⁾

Kvankam Mario Pei, ŝajne, opinias tiujn taksojn tro malaltaj, tamen li ne esprimas pri ili difinitan opinion. En ĉiu okazo tiuj taksoj estas multe pli realecaj ol la fantaziaĵoj pri la „geniaj infanoj“.

En la plej grandaj nuntempaj vortaroj de la naciaj lingvoj estas kolektita la tuta vorta materialo. Tiuj vortaroj estis farataj dum jardekoj, kelkfoje dum multaj generacioj, fare de centoj da specialistoj, kaj estas daŭre kompletigataj. La plej evoluintaj lingvoj posedas ĉ. 400.000 vortojn. La grandega Oxford-Vortaro de la angla entenas — laŭ Mario Pei — ĉ. 500.000. Li ŝajnas al mi treege optimista, kiam li diras: „Estas dube ĉu iu individuo konas pli ol unu kvinonon de tiu nombro“. Certe tia individuo ne ekzistas. La grandega nombro de vortoj respegulas la multflankan diversecon de la socia strukturo, preparolita supre, kaj tial M. Pei prave diras:

„Centmiloj da vortoj, kvankam ili aperas listigitaj en la grandaj vortaroj, apartenas al specialaj sciencaj, profesiaj aŭ fakaj parolmanieroj (*parlances*), kaj ne estas uzataj eĉ ne rekonataj de la meza parolanto. Ĉiu kampo de moderna aktiveco havas sian propran specialigitan vortaron, kiu estas familiara nur al tiuj, kiuj estas okupataj en la kampo. Ekzistas speciala vortaro de medicino, alia de psikologio, alia de botaniko, alia de muziko...“¹⁹⁾

Kaj tio estas la efektiva starpunkto de Mario Pei pri tiu demando.

Senkonsidere al la opinio de Mario Pei, aŭ de kiu ajn alia, certe la vortoj vere komunaj al ĉiuj membroj de la lingva komunajo, inkluzivante, do, ankaŭ la plej malklerajn tavolojn de normalaj plenaĝuloj — kaj ĝuste la plej malkleraj tavoloj tiurilate ludas la decidan rolon — estas ne pli ol 1 % de la tuta lingva vortprovizo. Tiu takso estas eĉ treege optimisma, ĉar ĝi signifas, ke eĉ le plej malkleraj personoj posedus ĉ. 4.000 vortojn, dum, laŭ mia opinio, 4.000 ĝis 5.000 vortoj reprezentas la mezajn uzatan vortprovizon de mezklara individuo. „Ke oni povas efektive esprimi sin interne de vortaro de 1.400 ĝis 1.600 vortoj — skribis al mi nia eminenta lingvisto Prof. W. E. Collinson — pruvis Michael West per sia *Essential English Dictionary* en kiu la anglaj difinoj sonas al la Anglo tute nature, ne kiel la fuŝita esprimaro de *Basic English*“.

Kiuj ciferoj, do, estas „absolute idiotaj“, kiel ĝentile esprimas sin nia bonedukita kavaliro?

La Nefermita Letero

D-ro Solzbacher daŭre, dum la tuta serio, revenas al la *Nefermita Letero al Stalin*. Mi ne intencas skribi pri la praveco de tiu energia kontraŭ-stalinisma starpunkto de UEA kaj SAT en la defendo de Esperanto. Kiu interesiĝas, tralegu la leteron en la revuo *Esperanto Internacia*, junio '52, pp. 163—165.

¹⁹⁾ Mario Pei, verko cit. sub ¹⁸⁾, p. 112.

Ĉi tie nur tri citaĵoj de D-ro Solzbacher kaj tri faktoj:

(1) En la Nefermita Letero estas dirite:

„Tio plue pruvas, ke la vorta materialo, kiu estas fakte komuna al ĉiuj membroj de iu lingva komunajo, inkluzivante do ankaŭ la plej malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol 1 procento de la tuta vortprovizo de la koncerna lingvo. Ĉio alia apartenas al la apartaj ne nur klasoj, sed ankaŭ profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj, kiaj estas la sporto, ludoj k.s.“ (kursivo de I. L.).

Jen kiel D-ro Solzbacher „interpretas“ tiun parteton de la letero:

„Ĉu do vere ekzistas 'klasoj' de kemiistoj, dentistoj, juristoj kaj eble eĉ de filatelistoj kaj ŝakludantoj en la socio?“ (A.E. 1957, p. 156.)

Kiu, do, skribas tiajn arlekenajojn, ke kemiistoj, dentistoj, juristoj estas „klasoj“?

(2) D-ro Solzbacher skribis (pri tiu letero):

„Fakte tamen — neeviteble — preskaŭ neniu ekster la Esperanto-movado donis al ĝi seriozan atenton“ (A.E. 1957, p. 57).

La vero estas, ke la Nefermita Letero estis presita ĉu komplete, ĉu parte en multaj nacilingvaj gazetoj, aŭ favore komentariita en aliaj, ekzemple en la plej elstara franca gazeto „*Le Monde*“ (26-VI.1952). La vero estas, ke multaj radio-stacioj, inkluzive de la londona BBC, disaŭdigis ĝin en pluraj naciaj lingvoj. La vero estas, ke per tiu energia kaj serioza paŝo UEA la unuan fojon post multege da jaroj montriĝis en la mondo kiel atentinda kultura faktoro kaj socia forto.

(3) D-ro Solzbacher daŭre asertas, ke mi estas „la aŭtoro“ kaj ke la aliaj tiamaĵ estraranoj nur „blinde akceptis kaj subskribis tion, kion D-ro Lapenna prezentis al ili“ (p. 58). Li eĉ ricevis leteron de „unu el la tiamaĵ estraranoj de UEA“ (kial ne diri la nomon?), en kiu tiu sinjoro interalie skribis: „En tiaj diskutoj ne decidu la grado de inteligenteco aŭ de faka sperto. Mi mem estis kontraŭ la ideo de Nefermita Letero al... Stalin. Sed Profesoro Lapenna per sia konata volforto kaj parolkapablo decidigis la ceterajn anojn...“ (Kia giganto de intelekta potenco kaj morala forto estas tiu „iama estrarano“ kaj kia reklamo por mia „volforto kaj parolkapablo“, kiu sukcesas, eĉ sen „inteligenteco aŭ faka sperto“, konvinki tiun giganton agi kontraŭvole!!! Estus vere necese, ke li eliru el sia modesta anonimeco kaj publike malkovru sian nomon, por ke tiuj, kiuj ne rekonas lin laŭ tiu gesto, ne pensu, ke eble povus temi pri kiu ajn alia tiama estrarano).

La vero estas, ke post pluraj instigoj mi faris la unuan skizon de la letero; ke tiu skizo estis sendita la 25-an de marto 1952, do preskaŭ tri semajnojn antaŭ la Estrara Kunsido, al ĉiuj estraranoj por konsidero; ke ĝi estis pritraktata dum eble du horoj en la kunsido mem; ke post kelkaj ŝanĝetoj ĝi estis unuanime akceptita de la Estraro.

Tiu decido de la Estraro estis poste aprobita de la Komitato. Nek EANA — tiam ankoraŭ aliĝinta asocio — nek ĝia komitatano iam ajn faris kiun ajn rimarkon. Ankaŭ ne D-ro Solzbacher, al kiu siatempe, la 30-an de majo 1952, estis sendita la teksto kaj kiu persone ĉeestis la U.K. en Zagreb (1953) kaj en Kopenhago (1956). Se entute io estis kritikinda, la kritiko devis esti farita en la Komitato, kiu estas la sola organo kompetenta por juĝi pri la agado de la Estraro. Sed ŝajne nenio estis kritikinda. Male estis ricevitaj nur gratuloj, ekzemple tiu de s-ro Montagu C. Butler (nur por memorigo!) de la 11-a de junio 1952, en kiu li skribis: „Mi tre forte gratulas vin pri via „Statistiko” en la nuna „Esperanto”, kaj ankaŭ pri la letero de UEA kaj SAT al Stalin. Ambaŭ ŝajnas al mi gravaj dokumentoj, kaj tre utilaj”.

Sed D-ro Solzbacher trovis, ke por lia celo estas pli utile bone miksi ĉion, misciti kaj misinterpreti antaŭ nekonata nombro da neinformitaj personoj, anstataŭ diri klare kion li pensas tie, kie oni povas diskuti la aferon kaj, se li ne diras la veron, facile tion pruvi al li per dokumentoj, kiel tio okazis en Kopenhago, kiam li kaŝglitis el la salono de la Komitata Kunsido (vidu supre).

Superflue diri, ke mi hodiaŭ, same kiel en 1952, subskribas ĉion, kio troviĝas en tiu letero.

★

Lingvistiko kaj Biblio

Tenante en unu mano sian venenigan ponardon de fipolitikaj falsaĵoj, D-ro Solzbacher plurfoje sinŝirme levis per la alia la Biblion. Tion mi ne deziras tuŝi. Ne pro D-ro Solzbacher, sed pro la respekto, kiun mi havas por la religiaj sentoj de sinceraj kredantoj, inter kiuj mi fieras havi multajn personajn amikojn.

★

Konfeso

Fine, por tiuj, kiuj post mia publika kaj ne senrezulta laboro por Esperanto dum tri jardekoj ankoraŭ ne komprenas mian starpunkton, mi eksplacite rekonu mian „kulpon”. Jen en kio ĝi konsistas:

Mi scias, ke la homaro iras kaj devas iri al sia unueco, se ĝi ne volas detruigi. Mi esperas, ke ĝi trovos la vojon al sia ĉiam pli alta integriĝo surbaze de egaleco kaj justeco, sen plua superflua sangado, sen rasa, nacia aŭ kiu ajn alia superregado de unuj kaj subigado de la aliaj. Mi estas certa, ke tia integriĝo ne estas ebla sen la Internacia Lingvo. Mi fidus je la homeco. Kaj tial mi estas Esperantisto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Poul Thorsen.

Tiuj...

... poetoj

— Tiuj poetoj estas terure egocentrikaj. Senhonte ili verkas pri si mem, pri propraj sentoj, faroj, eĉ nefaroj. Simpla statistiko pruvas la memokupatecon. Ekzistas dana indekso pri 40.000 danaj poemoj. Terura amaso — sed ankoraŭ pli terura ideo nur konsideri la unuan linion, en alfabeto vico, de ĉiu poemo. Tiel ekestas plej kuriozaj statistikaj rezultoj:

Ne malpli ol 3000 danaj poemoj komenciĝas per la vorto MI! 4 komenciĝas eĉ per la vortoj: *Mi estas laca!*

Tiel ni havas statistikan pruvon, ke unu dekmilono el ĉiuj poemoj estas faritaj de lacaj poetoj. Almenaŭ se la koncernaj poetoj diris la veron. Nur restas do esplori, kiom da poetoj estis lacaj ne konfesante tion en la poemo; tamen kiel statistike atingi tion?

Sed por esti pli serioza: Ne sen intereso estas tiu uzado de MI. Ĝi ja ne nur povas havi ritmajn kaŭzojn. Sendube en aliaj lingvoj okazas simile (Heinrich Heine: *Ich weiss nicht was soll es bedeuten*, William Wordsworth: *I wandered lonely as a cloud*). — La dana poëtino Tove Ditlevsen klarigis tion en tre interesa maniero:

Tiu formala MI efektive plej ofte estas nur fikcio: Ĝi indikas iun konfidencan etoson inter poeto kaj leganto, kiun ĝuste celas la poeto. Oni tion vidas, se oni pli profunde studas la strofojn ol nur ilian unuan (!) linion. Tiam montriĝas, ke tiu MI ofte estas identa kun tiu de tute alia persono ol la poeto! Tiam eĉ povas montriĝi, ke vira poeto identigas sin kun virino, kiel ekz. ĉe Johannes V. Jensen pri la gravedulino:

*Mi portas en la mamoj ŝvelaj
printempon dolĉan, timeme.*

*La propra infaneto muta
baraktas subkore, treme.*

Cetere ankaŭ kiam MI efektive signifas mi, estus tro rigora postulo al poeto enfermi en tirkestojn verkojn, kiuj temas pri la sentoj de li mem. Poeto bezonas kontakton, kiel ĉiuj homoj bezonas. Li mortos kiel poeto, se li sentas, ke neniu aŭdas, legas, reagas, ĉu ĝoje, ĉu kolere. — Kiel diris Kalocsay:

*Poeto sen popolo,
ho animprema scio,
ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko . . .*

Sed por ankoraŭ reveni al la mirindaj observoj per la dana poemindeksego: Unu tuta kolono enhavas la vorton MAJO unualinie de la koncernaj poemoj. Tamen unu kaj duona prezentas la vorton AŬTUNO, mirinda pesimismo! — Tute ne, ĉar feliĉe aperas PRINTEMPO en ne malpli ol 5 kolonoj.

Plue mirante ni trovas du kolonojn pri *la tago*, sed ses pri *la nokto*. — Ĉiu rajtas fari konvenajn aŭ nekonvenajn konkludojn tiurilate, ĉu statistikajn, ĉu moralajn. Almenaŭ oni rajtas konkludi, ke poetoj konsistigas kuriozan popolon, minimume same strangaj kiel homoj aliaj estas.

. . . recenzistoj

— Milda kritikisto ne ĉiam apartenas al la plej bonaj. Ofte estas pli bona severulo laŭ arta vidpunkto, se li nur estas *aferema*. Ne sufiĉas ja konstati; oni citu pruvojn — kaj antaŭ ĉio oni *gvidu la legontojn*, paroli al ili pli ol al aŭtoro kaj eldonisto.

Kompreneble estas tute nedigne ne legi recenzotan verkon. Tio tamen proveble okazas! — Tiel nur eblas „recenzi“ kompilante aliajn recenzojn aŭ kopiante la kutiman informtekston donitan de la eldonejo. Tamen ekz. en la eltranĉa libro de eldonejo KOKO troveblas dekoj da tiaj „recenzoj“. — Cetere por nova, negranda eldonejo estas konsiderinda ŝarĝo 50-obla dissendo de du ekzempleroj, precipe se ili nur kaŭzas la aluditan mekanikan procedon. — Kaj kial cetere ĉiam *du* ekzempleroj? Kiu ricevas la duan? Kiu kavaliro supre de nia movado pretas rompi lancon kontraŭ la unika dogmo, ke „unuopajn ekzemplerojn ni nur mencias“?

Tro multaj recenzoj tute ne juĝas laŭ vidpunktoj de esp-literaturo. Ili prefere juĝas pedante laŭ nombro de preseraroj, paperspeco, margena larĝo, formato, bindo kaj foje finiĝas per kvazaŭ hazarda frazo: Cetere la libro ankaŭ enhavas bonajn poemojn!

Kelkaj recenzistoj estas tro bonvolemaj. Ili nur recenzas por la aŭtoro, al kiu ili simpatias, kaj kiu

eble eĉ estas ilia amiko. Tial ili nur konas laŭdajn vortojn.

Aliaj laŭdas, kvankam ili ne konas la aŭtoron, sed por ili estas decida, ke la verko entute aperis en la internacia lingvo. Tial ĝi estas laŭdenda!

Tria grupo nur volas diskuti la lingvon. Ili estas ĝisstrate lingvokonsciaj, kaj inter ili baraktas la ĉiamaj vekriantoj pri tro multaj t.n. neologismoj.

Bonfartige estus baldaŭ eltrovi alian nocion pri tiuj vortoj. Ekz. *Trista* aperis en 1910, *despera* en 1912 — fakte ili baldaŭ estos arkaismoj! Zamenhof mem enkondukis centojn da vortoj ekster la fundamento, kaj tamen tiu neologisma debato ŝajnas eterna. — Laste mi vidis argumenton kontraŭ la vorto *dupo* (= facile trompebla homo): Ĝi estu tute ne allasebla, ĉar en la pola lingvo ĝi signas la iomete nedecan korpoparton plej postan...

Estas tute certe, ke jam troviĝas en la netuŝebla, sankta fundamento dekoj, eble centoj da vortoj pli malpli decaj en aliaj lingvoj. Nenio estas farebla tiurilate, absolute nenio. Ankaŭ en naciaj lingvoj ni trovas nedecojn el vidpunkto de aliaj lingvoj — tamen ni ilin trankvile elparolas, sen ruĝiĝo, neniam eĉ ekhavante la ideon *forigi vorton* el tiu alia lingvo. Nur kelkaj ekstremaj *esperantistoj* havas tian ideon. — Sed vane! Vortojn oni ne povas „elpreni“ nek subpreni. En ĉiuj lingvoj aperadas vortoj, kiujn oni malpermesas, sed ili konsterne persistas!

Zamenhof kiel ĉiam agis tute saĝe donante la konsilon libere enkonduki fremdvortojn bezonatajn (la 15a regulo), nur ke oni nenion forprenu el la fundamento. Tiel estu. Praktiko, selektado, konkurenco, ne malpermesoj decidu pri la sorto de enkondukitaj vortoj.

Kaj por rekte reveni al la recenzistoj: Kial estas, ke tiel ofte ili plendas pri vortoj, kiuj estas klarigitaj en glosaro de la koncerna libro? Kial estas, ke fakuloj rajtas uzi centojn da neologismoj, dum la poetoj apenaŭ kelkajn dekojn? Modesta opinio: La ĉefproblemo ne estas, ĉu uzi, sed ĉiam klarigi, glosi fenomenojn ekster Plena Vortaro.

La plej harstarigan recenzon, kiun mi iam legis temis pri *Kalocsay: Ezopa Saĝo*. Ĝi apenaŭ traktis la verkon, nur bedaŭris, ke Kalocsay revenis al la esp-movado, ĉar li ĉiam uzis tro da neologismoj! — Kaj kio estas eĉ pli serioza afero: La recenzinto „priplendas la eldonon de tiaj verkaĵoj, firme konvinkita, ke la ĉefa tasko de Esperanto ne estas literatura.“

Esperanto ne estas nek estu literatura lingvo! Apenaŭ ĝi estu lingvo — nur ia kodo? — Ĉiu rajtas tian absurdan opinion. Ĉiu ignoranto rajtas tiel modeste taksi unu el la plej grandaj, spiritaj eltrovaĵoj de la homaro, sed enigmo restas, kial elekti ĝuste tian homon kun tiaj vidpunktoj ĝuste por recenzi la literaturon de Esperanto! Ĉiurecenze frapi la propran buŝon — terura sorto!

Memnon


Teksto: M. Boulton

Muziko: F. Merrick

Andante (♩ = ĉirkaŭ 60)



p



Statuo, ŝtono en dezerto Sur brila sablo brulsoifa.



H. N. LTD SYMPHAX 764

Mi staras morta, sen-sig-nifa: Ĉe la piedoj, nur la-cer-to estas kun-

ul - o kaj kon - solo.

En spaco sen vi - debla verdo Mi sta-ras, monument de perdo

Gra-ni-ta, trista en izolo, Sen homa koro

H.H. L'P 'SYMPHAK' 764

aŭ ka - pablo. Kaj ŝton - iĝ - inta per do -

loro Mi staras sub kruela gloro De brula suno sur la

sa - blo. Sed ŝtono kiu vundojn sentas Per mia

propr - a sango ruĝa En sablo - ŝtorm turmenta, muĝa.

(sempre P)

H.M. LTD 'SYMPHAX' 764

Mi - sta - ras blinda ni - si - lentas .

lunga Sed

8. Ped (sempre)

kiam ŝtormas ventaj vi - poj Tra mia

korpo sen es - pe - ro Dum

sun - lev - ig - o aŭ ves - per - o Mi

The first system of music consists of three staves. The top staff is a vocal line with lyrics: "sun - lev - ig - o aŭ ves - per - o Mi". The middle staff is the piano accompaniment, and the bottom staff is the bass line. The music is in 8/8 time and features a complex, rhythmic accompaniment with many beamed notes.

kant - as tra la ŝtonaj lip - oĵ.

The second system of music consists of three staves. The top staff is a vocal line with lyrics: "kant - as tra la ŝtonaj lip - oĵ." The middle staff is the piano accompaniment, and the bottom staff is the bass line. The music continues with the same complex, rhythmic accompaniment.

Ne mi, ne mi sed senkom-

The third system of music consists of three staves. The top staff is a vocal line with lyrics: "Ne mi, ne mi sed senkom-". The middle staff is the piano accompaniment, and the bottom staff is the bass line. The music continues with the same complex, rhythmic accompaniment.

pat - a kaj strang - a vento lipojn

The fourth system of music consists of three staves. The top staff is a vocal line with lyrics: "pat - a kaj strang - a vento lipojn". The middle staff is the piano accompaniment, and the bottom staff is the bass line. The music continues with the same complex, rhythmic accompaniment.

H. N. LTD 'SYMPHAX' 764

mov - as La akr - a vento kiu blov - as El lando

nigr - a nekon - at - a. lunga

(sempre col red.)

lunga lunga

lunga *

* Mem ĝis nedubebla silento.

Tadeusz Banaś

DRATO

La malamo de Montecchi kontraŭ Kapuletti ŝajnas naiva flirto kompare kun la sento, kiu de jaroj ligis du ĝenevajn horloĝistajn firmaojn: „Johano Miller” kaj „Antonio Movado”. Tamen la senperan kaŭzon de la vundograta malamo ne memoras hodiaŭ eĉ la plej maljunaj laborantoj de ambaŭ domoj. Ekzistas koncerne tion du legendoj; unu diras, ke antaŭ okdek jaroj Antonio Movado forpelis kun tiel nomata batita buŝaĉo junan Johanon Miller, kiu koketis energie, iom agresive, kun lia bone dotita solfilino Iveta — la alia la naskiĝon de la konflikto transmetas en alian tempon kaj rakontas, ke la heroino de la dramo estis ĝuste Gerda Miller, al kiu „la napola alvagingo” Movado, rememore pri ĉarme travivitaj momentoj, lasis ĝenan donacitaĵon kun peĉkoloraj okuloj kaj haroj, kaj mem trans Alpoj forkuris al Garibaldi, por jam neniam reveni en la belegan landon de Tell kaj Winkielried. Kiel estis vere — neniuj scias kaj neniam esploras, ĉar en ambaŭ firmaoj tiu ĉi temo apartenas al la malpermesitaj kaj la cetero de la ĝeneva loĝantaro havas pli gravajn ĉagrenojn.

Tamen la devon al la reciproka malamo ambaŭ komercdomoj obeas ĝis la hodiaŭo samfidele kiel Solvejg al Peer Gynt — tiom, ke tio jam alprenis iom burokratigitajn formojn.

Ĉiujare la unuan de decembro, la tagon de la sankta Eligio, la patrono de la oraĵistoj kaj horloĝistoj, la venĝoflamo ardigas la korojn de ĉiuj laborantoj de la kverelantaj firmaoj, inkluzive la firmestrojn kaj pedelojn. Tiun ĉi tagon „Johano Miller” pere de speciala sendito transdonas al la firmao „Movado” la lastan superbajon de sia laborejo, ĝis nun vualitan per la plej profunda sekreto, kun dolĉa espero ke la okuloj de la posedanto de la firmao „Movado” elfalos pro admiro, aŭ venena sango mortigos lin.

Reciproke la ĉefo de „Johano Miller” ricevas tiun ĉi tagon de la firmao „Movado” donacon, kiu en liaj vejnoj cirkuligas galon ĝis la venonta sankta Eligio.

Tiel estis jam de jaroj — neniuj scias de kiom, ĉar eĉ sepdektrijara Roberto Zweig rakontas, ke estante dekdujara li alportis al la firmao „Movado” la unuan en la mondo horloĝon streĉatan ne per alosileto, sed per fikse muntita streĉilo — kaj ĝi ne estis ja la unua donaco. Sata je venĝo kaj triumfo li revenis al firmao profundiĝinta en nigran funebro, ĉar intertempe Johano Miller ricevis belegan novan Movado-vechorloĝon. Kiam kvin jar-

ojn poste li alportis horloĝon, montrantan krom horoj, minutoj kaj sekundoj la ŝangojn de la lunfazo, reveninte li trovis la ĉefon sveninta apud la tempomezurilo, montranta la signojn de la zodiakaj konstelacioj.

Kaj tiel kun varia bonŝanco kaj satisfakcio ĉiu jare pridonacas unu la alian la nerepacigeblaj antagonistoj. Pri la fonto de la kolizioj oni delonge forĝesis, plej verŝajne oni eĉ ne konas kaj ne vidis propraokule unu la alian, sed respektas la tradicion sanktigitan de la jaroj.

Antaŭhieraŭ estis same. Antonio Movado jam serioze pensis lasi la ĉiuokaze multekostan kaj nervozigan kutimon, kiam matene sendito kunportis al li malgrandan skatoleton kun letero. En la skatoleto kuŝis ora maldiketa dratvolvaĵo, kaj en la letero sigelita per la firmaa stampo kaj rekomenda numero li legis:

„Nia firmao kuraĝas en la tago de nia Patrono sendi al Vi, Estiminda Sinjoro, kvindek metrojn da ora drato. Ni permesas al ni rimarkigi, ke tiu ĉi drato estis de niaj laborantoj farita el unu gramo da oro 18-karata. Ni esprimas profundajn sindonem- kaj estimosentojn — Johano Miller”.

En la firmao „Movado” sekvis io, kompare kun kio la tertremado estas plaĉa somertempa aventuro. Sed vespere Johano Miller tenis en la mano malgrandan oran dratvolvaĵon kaj sekvis per la sangumitaj okuloj la skribaĵon de la firmao „Movado”.

„Kun admiro kaj envio ni rigardis la draton faritan de la laborantoj de la P. T. Firmao. Ni ekzamenis ĝian pezon, longecon kaj orprovon — tutvere ĝi pezas unu gramon, longas kvindek metrojn kaj la oro enhavas 18 karatojn. Ni esprimas respekt- kaj admirasentojn — Antonio Movado.

Post Scriptum: Ni afable petas rigardi la draton per lupeo, ĉar niaj laborantoj sukcesis laŭ ĝia tuta longeco trabori truon”.

el la pola tradukis

Jerry Grum

Noto pri la aŭtoro: Tadeusz Banaś estas unu el tiuj polaj humoristoj, kies verketojn ĉiam kun plezuro legas resp. aŭskultas perradie la amantoj de la malgranda literatura formo. Aldoninde estas, ke Tadeusz Banaś tre simpatie rilatas al Esperanto.

Odo al Najtingalo

John Keats (1795-1821)

La kor' doloras, kaj obtuzo stringas
La sensojn, kvazaŭ mi ĝis lasta guto
Trinkis dormigan drogon, aŭ eksinkas
Al Lethe-flu' post sorbo de cikuto:
Ne pro envio pri feliĉa vi,
Sed pro ekstaz' je via ĝojoviglo, —
Ke vi, driad' kun flirt-flugila sorĉo
 En' iu harmoni'
De verd' arbara kaj ajura nigro,
Himnas someron per facila gorĝo.

Ho, nun glutadi vinon, kiu kuŝis
Kolde matura en profundo kela,
Kvazaŭ kampar' kaj Flora jam ĝin tuŝis,
Danco, provenca kanto, ĝoj' sunhela!
Ho, por pokalo de la varmo suda,
Plena de l' flameflusa Hipokreno
Kun perlaĵ blazoj en sparkanta pluro
 Kaj buŝa punc' postgluta.
Trinkadi, migri de la mondosceno,
Kaj kun vi drivi al arbar-obskuro.

Fordrivi for, solviĝi, kaj forgesi,
Kion vi eĉ ne lernos inter frondoj:
Kiom lacego povas nin opresi
Ĉi tie, kie ĝemas homaj rondoj;
Kie hargrizon skuas degenero,
Juno paliĝas, kaj sin spektre ĉerkas;
Kie ekpenso mem jam estas zorg' aŭ
 Eĉ surda malespero,
Kie okuloj de la Belo velkas,
Kaj Am' rezignos tiujn depost morgaŭ.

For! for! al vi mi fuĝos, sen sankcio
De Bakho kaj panteroj; sed en soro
Laŭ nevidebla flug' de Poezio
Malgraŭ la cerbaj stulto kaj langvoro,
Ĉu jam kun vi? Do nokto nun teneras,
Kaj Lun-Reĝino sidas jam sur trono
Kun siaj stelaj silfoj ĉirkaŭantaj;
 Sed tie ĉi malhelas,
Krom kiam de ĉielo lumfantomo
Filtrigas tra la verdaj vojoj antraj.

La florojn ĉe l' piedoj mi ne vidas,
Nek kia estas branĉa aromato,
Sed en balzama nokto sin perfidas
La dolĉoj, kiujn dotas ĉi monato
Al herbo, bosko, kaj fruktarbo kruda;
Blanka kratago kaj eglanterio;
Viojoj velkaj sub folikiteloj:
 Kaj maja bel' atuta:
Embria roz' kun rosa sekrecio —
Zuma je muŝoj dum somervesperoj.

Aŭskulti en mallumo! Mi tre ofte
Glitemis al brakum' de Morto lula,
Flatante lin per amaj rimoj softe,
Ke li min prenu al la sfer' nebula.
Kaj nun por morto ŝajnas ja l' okazo:
Ekĉesi ĉe l' noktmezo sendolore,
Dum vi elverŝas elokventon vian
 En kia trilekstazo!
Vi kantus plu, sed mia aŭd' ignore
Pri via rekviem' surdadus tiam.

Sed ne por morto vivas vi tretite
Sub mil generacioj ĝis sufoko;
Ĉar nuna voĉo flutis retrocite
Al reĝo kaj regat' en praepoko:
Eble la sama kanto, kiu trilis
Tra l' kor' de Ruta, kiam nostalgie
Ŝi ploris inter fremda greno, sola;
 La sama, kiu psilis
Magiajn vitrojn super maro, kie
Ŝaŭmadis ĝi en fea lando fora.

Fora! La vorto mem funebre tonas
Tirante min de vi al la rutino.
Adiaŭ! Fantazio ne imponas
Tiom forloge — elfa trompulinol
Adiaŭ do! la tristaj notoj ondas
Preter proksimaj kampoj, trans rivero,
Laŭ montdekliv'; ĝis transa valo migras,
 Kaj ombrojn sondas.
Ĉu estis ili songo aŭ himero?
Post tiu kant' ĉu dormas mi, aŭ viglas?

el la angla trad.

John Francis

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Aperis en eldono de UEA la „Angla Antologio“, bel-aspekta, flavkolora kvazaŭ oraĵo, grandformata, bindita 320-paĝa libro. Bezono kaj ornamo de ĉiu esperantista biblioteko. La centro de UEA havis dum multaj jaroj sian sidejon en Anglujo, tamen ne tiam aperis la Angla Antologio, kvankam kritikemuloj rimarkis, ke en tiu tempo UEA-centro estis ĝisoste brita. La Angla Antologio aperis nun, kiam la Centro de UEA troviĝas en Nederlando, kio pruvas, ke tiu nia plej forta internacia organizaĵo estas ĝisoste internacia.

Ĉiu esperanta libro, estu ĝi eĉ broŝureto, signifas brikon en konstruo de la movado: sed antologioj estas kolonoj. Kun aparta goĵo ni ĉiuj salutis aperon de la Angla Antologio, ĉar dum sufiĉe longa tempo la movado ne riĉiĝis per bona antologio. Kaj la angla estas vere bona laŭ ĉio: aspekto, enhavo, redaktado, lingvo. Ĝi estas la plej nova gemo en ĉeno de antologioj en Esperanto. Redaktis ĝin du redaktoroj: William Auld la poezian parton kaj Reto Rossetti la prozan. Ambaŭ redaktoroj agis ankaŭ kiel tradukintoj. Auld apud Dinwoodie kaj Francis tradukis kaj poeziaĵojn kaj prozaĵojn, dum Reto Rossetti nur poeziaĵojn. La versaĵojn tradukis, apud la menciitaj, Foote kaj la franco Waringhien. La tradukintoj de la proza parto estas Capp, Venture, Ockey, Jervis kaj Banham. Entute 11 tradukintoj. Inter ili unu franco, tre konata, eminenta verkisto kaj lingvokonanto Gaston Waringhien. Versajne la aliaj 10 estas ĉiuj britoj, sed ekzistas eĉ ne unu noto pri la tradukintoj. Kompreneble, ke ĉiu scias, kiuj estas Auld, Francis, Rossetti, ĉar la nomoj de tiuj niaj verkintoj estas vaste konataj, sed la aliajn ne tiel konatajn oni povas nur supoze opinii britoj...

La enkondukan studon pri la angla literaturo faris nia poetino Marjorie Boulton tre bone, tre trafe, koncize sed informoplene en vigla stilo. Sur nuraj 12 paĝoj ŝi bonege prezentis la karakteron de la angla literaturo de ĝiaj komencoj ĝis la 19a jarcento. La Antologio, nome, enhavas verkojn de la verkistoj, kiuj vivis inter la 11a kaj 19a jarcentoj. La verkojn de la novaj kaj nuntempaj verkistoj estas en plano eldoni en aparta volumo.

En la Antologio estas prezentitaj verkoj, poeziaj kaj prozaĵ, de 63 verkistoj, 44 poetoj kaj 19 prozistoj. Kelkaj poetoj estas tre bone reprezentitaj, eĉ per 9 poemoj, kiel William Blake. La Antologio komenciĝas per poemo „La marvaginto“ de nekonata poeto, kiu vivis antaŭ la 11a jarcento, en traduko de William Auld. Kvankam mil jaroj dividas nin de la tempo kiam ekestis tiu poemo, ĝi ne estas fremda al ni, kontraste proksima. La tuta materialo en tiu antologio estas lerte elektita. Eniris verkoj aŭ fragmentoj de la verkoj, kiuj povas esti proksimaj al psiko de la hodiaŭa homo...

La gigantoj de la angla poezio estas prezentitaj per fragmentoj de siaj verkoj. John Milton per parto de lia „Paradizo

perdita“ en bonega traduko de John Francis. De Shakespeare aperis la mondfama „balkonsceno“ el la dramo „Romeo kaj Julieta“ en majstra traduko de Reto Rossetti. Komparinte la anglan originalon kun tradukoj kroata kaj esperanta, denove la centan fojon konstatiĝis, ke esperanta traduko estas multe pli proksima al la angla originalo ol la kroata, alie tre bona traduko, sed slavaj lingvoj ege diferencas de la angla kaj ne posedas mirindan econ kiel Esperanto adaptiĝi al ĉiu lingvo. Jen la versoj de Shakespeare en esperanta vesto:

Julieta:

Preskaŭ matenas; vin mi volus peli,
sed ne pli for ol birdon de bubino,
kiu petole lasas ĝin forsalti
el sia mano, kiel en katenoj
mizera karcerulo, kaj tujposte
retiras ĝin al si per silkfadeno,
pro amo domaĝante la liberon.

Romeo:

Mi volus esti via birdo.

Julieta:

Jes,
mi ankaŭ ĝin dezirus sed, tre eble,
mi vin sufokus, dorlotante vin.
Nu, bonan, bonan nokton, kara mia!
Disiĝo tiel dolĉas en ĉagreno,
ke diros mi „Bonnokton“ ĝis mateno.

Si foritas.

Romeo:

Viajn okulojn lulu songtrankvilo!
Ho, se min benus sama songazilo!
Al mia konfespatro tuj mi iros,
la helpon petos kaj feliĉon diros.

En la proza parto la redaktoroj devis elekti fragmentojn de la verkoj, ĉar kompreneble, ne eblis presi tutajn dramojn, romanojn, novelojn. Ĉie ili elektis partojn, kiuj prezentis ian tuton. Sed kelkaj verkistoj estas prezentitaj per kompletaj nelongaj prozaĵoj, kiel John Milton, Daniel Defoe — la fama aŭtoro de „Robinzono“ —, Samuel Johnson, k.a....

Nur rekomendi tiun Antologion al la esperantista popolo estas malmulte, ĝi meritas pli ol nuran rekomendon, sed ni nenion alian povas fari. Jes, eble nur ion: danki kaj gratuli al la tradukintoj, redaktoroj kaj eldoninto pro tiu enorma riĉiĝo de nia literaturo.

(Radio Zagreb)

Prezo: 10 gld. (40 steloj)

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando

SE TIU ĈI ELDONAĴO PLAĈAS AL VI

bonvolu montri ĝin al ĉiuj esperantistoj kiujn vi konas, por ke ankaŭ ili havigu ĝin al si.

Aĉetu

BELARTON

por viaj geamikoj en nepagipovaj landoj. Vi ege feliĉigos ilin!

Prezo:

2,75 gld. (11 steloj) por ind. membroj de U.E.A.

3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj de U.E.A.

MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO



Henrik Ibsen:

PEER GYNT

Drama poemo kun komentario kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld. afranko 0,40 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109, Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

LA TEATRAĴO DE LA 43-a:

REAPERANTOJ

Majstroverko de HENRIK IBSEN en traduko de Oscar Bünemann, ludota dum la Universala Kongreso en Mainz.

Per ĝia aĉeto vi subtenas la funkciigon de Internacia Teatra Trupo Esperanta.

Prezo: 0,75 gld.

MENDU ĜIN ĈE U.E.A. !!!

ANTAŬ MAINZ REAPEROS

RETORIKO

KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTA PAROLARTO

DE

IVO LAPENNA

DUA ELDONO REVIZIITA KAJ KOMPLETIGITA

320 paĝoj

Unu el plej elstaraj verkoj de la originala Esperanto-Literaturo de eminenta sciencisto kaj oratoro

Verko kiu troviĝu en la hejmo de ĉiu esperantisto

Eldono de la aŭtoro.

Prezo: tole bindita, JE ANTAŬMENDO: 9,— gld. (36 steloj)

broŝurita „ „ „ 7,50 gld. (30 steloj)

MENDU ĜIN ĈE U.E.A.

AŬ ĈE LA AŬTORO